# Heleco

**Pres-organo de:**
**Astura Esperanta Asocio**

**Numero 89** — **Novembro 2013**






Heleco

Numero 89 Novembro 2013

**Astura Esperanta-Asocio**

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info

**Astura Esperanto-Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

| Enhavo . | Paĝo |
|---|---|
| ESPERANTO.ES Interretaj novaĵoj de HEF | 3 |
| 72-a Hispana Kongreso de Esperanto | 4 |
| 86-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda | 5 |
| 98-a Universala Kongreso de Esperanto | 6 |
| Poezia Angulo | 7 |
| 21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo | 8-9 |
| Kuirante kun Pilar | 10 |
| En la duonjarcenta jubileo de la 2a Vatikana Koncilio | 11 |
| Koncilioj tra 17 jarcentoj | 12-14 |
| La koncilio de la 20a jarcento | 15-16 |
| La Eklezio de la Koncilio | 17-18 |
| Malfermo al la mondo… dubinde! | 19-21 |
| Koncilia teologio pri la Eklezio | 22-23 |
| Mistakso de la Eklezio far la Koncilio | 24-26 |
| Institucio esence hierarkia | 27-29 |
| Neprokrastigebla solvo | 30-31 |
| Kial fiaskis la 2-a Vatikana Koncilio? | 32-34 |
| 50 jaroj da stagnado | 35-37 |
| Iu eklezia reformo ankoraŭ ne fin-plenumita | 38 |
| Jen kiamaniere Ratzinger detruis la popolan eklezion en Latin-Ameriko | 39-40 |
| Lasta intervjuo al la Kardinalo Martini | 41 |
| Hans Küng kaj sia ampleksa teologia verkaro | 42-45 |
| Legante pri la 2-a Vatikana Koncilio | 46-47 |
| Iomete malrespekte (humura paĝo) | 48 |

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85

## Renovigo de la retejo de HEF

La retpaĝaro de Hispana Esperanto-Federacio spertas dum tiu ĉi periodo rimarkindan renovigon.
Komence de somero oni ŝanĝis la servilon, al alia kun pli granda amplekso kaj kapablo, interalie por gastigi la Bitotekon, kiu bezonas sufiĉe grandan spacon pro sia amplekso. Ankaŭ la rapideco kaj mastrumado pliboniĝis.
En septembro ŝanĝiĝis la baza ŝablono de la retejo. Kvankam la aspekto ne radikale malsamas disde la antaŭa, ĉefa trajto estas ke la nova ŝablono montriĝas pli adaptita al porteblaj telefonoj kaj tabulkomputiloj, kaj pli simpla.
Fine de septembro oni atingis novan mejloŝtonon: la plurlingvigon de la retejo. Nun HEF disponas de diversa materialo prezentanta Esperanton kaj la asocion en la kataluna, galega kaj eŭska lingvoj.
Dum venontaj semajnoj oni funkciigos internan spacon por membroj de la asocio. Ankaŭ estas planata la lanĉo de reta bulteno de HEF, por informi ne nur la anojn, sed ankaŭ aliajn esperantistojn kaj la publikon ĝenerale. Ĉiuj interesatoj jam povas aldoni sian nomon kaj adreson en la apuda formularo.
Ankaŭ okazos modifoj en la specialaj paĝoj gastigataj en esperanto.es, kiel la Granda Vortaro de De Diego, la Bitoteko, kaj ankaŭ tiuj de lokaj asocioj kaj de la hispana junulara societo.
Dume, se vi spertas ian teĥnikan problemon, aŭ se vi deziras komenti aŭ sugesti, ne hezitu skribi al la HEF-retejestroj ĉe la adreso: esperanto@esperanto.es.

## Numero 0 de la Bitbulteno de HEF

Hispana Esperanto-Federacio lanĉis sian retan bultenon. Tiu landa E-asocio inaŭguras per tiu ĉi sendo novan manieron de komunikado, kiun ĝi esperas utila por ĉiuj ricevantoj, esperantistoj aŭ (ankoraŭ) ne. La celo estas ke ĝi taŭgu kiel informilo pri Esperanto, ĉu en Hispanio, ĉu en la cetero de la mondo, kiel rimedo por diskonigi la HEF-aktivaĵojn, kaj ankaŭ kiel komunikilo inter la esperantistoj kaj la organizaĵoj membroj de la Federacio aŭ kiuj iel rilatas al ili.
Tiu Bulteno, al kiu oni donis la nomon BITBULTENO, laŭ la formulo kiun jam oni utiligis por nomi la Bitotekon de tiu E-organizaĵo, komplementas la ceterajn komunikilojn de la Federacio, kaj speciale ĝian longtradician revuon (*"Boletín"*), kaj la retejon esperanto.es. Ĝi ne celas ilin anstataŭigi, kaj ankaŭ ne konkuri kun aliaj komunikiloj. Ĝi fokusiĝos en la aktivaĵoj okazantaj en la medio de la Federacio, kaj ĝenerale en la esperantista movado en la areo de Hispanio, sed ne ekskludas aliajn novaĵojn kiuj povas interesi la homojn scivolemajn pri Esperanto, sed kiuj ankoraŭ ne ĝin mastras, aŭ la esperantistojn interesatajn en tio kio okazas en hispaniaj aŭ hispanlingvaj medioj.
La Bitbulteno ne sekvos establitan periodecon, kaj estos elsendita kiam la intereso de la informoj tion fiksu. Oni provos teni ian ekvilibron inter akurata informado, sen nenecesa trosendado.
HEF faras alvokon al la legantoj, por ke ili ĝin helpu pri la redaktado. Ĉiu novaĵo kun intereso por la menciitaj medioj, estos bonvena. Vi povas skribi al la adreso letero@esperanto.es, sendante tekstojn, fotojn kaj alian interesan materialon.
Fine, HEF petas senkulpigon se tiu ĉi unua numero alvenis ĉe vi, kaj vi tute ne interesiĝas. Ni inkludis inter la unuaj ricevantoj ne nur la anojn de la Federacio, sed ankaŭ aliajn personojn kiuj iam rilatis kun ĝi. Se vi ne plu deziras ĝin ricevi, aŭ se vi deziras modifi la kondiĉojn de subskribado, vi povas sekvi la instrukciojn aperantajn en la malsupra parto de la mesaĝo, aŭ vi simple povas skribi al la citita adreso letero@esperanto.es.





















## 72a Hispana Kongreso de Esperanto

La 72a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Zaragozo de la 3a al la 5a de majo ĉi-jare sub la devizo «Lingvo kaj sento». Partoprenis en ĝi proksimume cento da gesamideanoj, inter ili la eŭska centjaraĝulo Eduardo Larrouy. Organizis la Kongreson, kune kun HEF (**Hispana Esperanto-Federacio**), la Aragona Esperanto-Asocio ***Frateco***.

La kongresa programo estis konstituita de la kutimaj aranĝoj de tiutipaj esperantistaj renkontiĝoj, t. e. kombino de kulturaj kaj distraj programeroj: prelegoj, kunsidoj, solenaĵoj... Samtempe kultura kaj distra, estis la vizito, en kiu ciceronis Jorge Camacho, al la ***Aljafería***, araba kastelo-palaco de la 11-a kaj 12-a jarcentoj**.** Inter la kulturaj aktoj estas menciinda la prelego de Antonio Marco Botella pri la esperanta versio de **Don Kiĥoto**, kiel omaĝo al ĉi ties tradukinto Fernando de Diego.

La poezio ludis gravan rolon en la kongresa programo. Antonio Valen prelegis pri la poezio de Kolomano Kaloĉajo. Alia grava pripoezia prezentado estis tiu de Jorge Camacho, konktrete pri sia propra verkaro, originale verkita en Esperanto kaj laste eldonita sub la titolo «**En la Profundo**». Ankaŭ Miguel Fernández pritemis sian esperantlingvan verkaron «**Poezio, armilo ŝarĝita per futuro**», tradukaĵo el progresema, plejparte politike revolucia poezio, ĉefe el hispania deveno: Blas de Otero, Miguel Hernández, Gabriel Celaya, Marcos Ana, García Lorca kaj multaj aliaj.

Resume, la Kongreso estis kroma deca elmontro de la penlaboro de la hispana esperantistaro en ĉi tiu epoko ne tre favora por la afero de nia Internacia Lingvo.





































# 86a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda

**Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT),** estas esperantista asocio en kiu membras personoj el la tuta mondo apartenantaj al diversaj tendencoj de maldekstraro: liberecanoj, komunistoj, ekologiistoj, liberpensuloj, sennaciistoj… Tiu organizaĵo kongresas ĉiujare; en 2013 la kunveno estis en Madrido, kun la partopreno de pli ol 100 ĉeestantoj, sub la devizo ***Esperanto: taŭga ilo por sociaj luktoj***.

Kiel kutime ĉe SAT-kongresoj, matene okazadis la Ĝeneralaj Kunsidoj de la organizaĵo, malfermitaj al ĉiuj gekongresanoj. Kaj krome estis kunsidoj de la frakcioj ekologia, sennaciista, komunista, liberecana, la Vegetara Sekcio kaj la Poresperanta Fako. Vespere estis distraj kaj kleraj programeroj: koncertoj teatraĵoj… kaj socipolitikaj debatoj. Estis turismaj vizitoj al Toledo, Avilo kaj Segovio.

Pri la kultura flanko de la kongreso menciindas la koncerto de Jomo, kiu daŭris tutan vesperon; kantis parto de la koruso ***Interkant'***, gvidata de Franjo Leveque, kaj unu el la altaj punktoj estis la apero de la koruso Solfónica. Miguel Fernández deklamis el sia nova libro ***Poezio: armilo ŝargita per futuro***. Oni montris la filmon ***Mondcivitanoj*** kontraŭ polica ĉikanado de senlegitimilaj enmigrintoj. La filmo montras kaj diversmaniere reflektas la situacion de enmigrintoj en Hispanio.

Sendube estas sufiĉe konata ke la ***Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*** estas eldonaĵo de SAT. Ĉi tiu SAT-Kongreso en Madrido decidis ke la Plenum-Komitato de la organizaĵo studu kiel kaj kiam en plaj oportuna maniero malfermi la enhavon de tiu vortaro por libera uzado en ***Interreto***. Oni proponis plenan “liberigon” de la datumoj, sed ankaŭ ekzistas la ideo pri konservo de la kopirajto kaj malmultekostaj PIV-eldonoj en iuj landoj.

La kongresa Deklaracio, interalie, atentigis pri la malekvilibriĝo de la tuttera ekologia sistemo, kaj pri la neceso ŝanĝi ne nur ekologirilatajn homajn kondut-manierojn, sed ankaŭ la socian sistemon mem al tia, kia ebligas enradikigon de daŭripovaj, ekologie respondecaj praktikoj; ankaŭ, instigis al disvolviĝo de la 15M-movado en Hispanio kaj ties pacema postulado de la rajto mem decidi pri la socia estonteco.
































La ĉi-jara kongreso de **UEA** okazis, de la 20a al la 27a de julio, en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko. La kongresa temo estis: ***Insuloj sen izoliĝo por justa komunikado inter lingvokomunumoj***. Alta Protektanto de la Kongreso estis la islanda prezidento Ólafur Ragnar Gimsso, kiu donis salutmesaĝon en la solena inaŭguro. La okazado de la Kongreso estis sufiĉe diskonigita en la lando pere de la informiloj: ĵurnaloj, televizio, radio…

Prof. Mark Fettes el Kanado estis elektita kiel la nova prezidanto de **Universala Esperanto-Asocio** en la unua kunsido de la Komitato. En tiu posteno li estas sukcedanto de Probal Dasgupta, kiu gvidis la Asocion ekde la jaro 2007. Estis renovigo ankaŭ de la komitato de la Universala E. Asocio. Krom tiu kunveno de UEA estis ankaŭ la sesioj por debatado de la kongresa temo kaj la kunsidoj de Eŭropa Komisiono de UEA kaj Junulara Sekcio de UEA.

Kaj, kiel estas kutimo en ĉiuj universalaj kongresoj de esperanto, la renkontiĝo de geesperantistoj el la tuta mondo estis okazo por kunvenado de la diversaj esperantistaj asocioj, inter kiuj ni povas mencii la sekvajn: Eŭropo Demokratio Esperanto, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, Universala Medicina Esperanto-Asocio, Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Kristana Esperantista Ligo Internacia, Eŭropa Esperanto-Unio, Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, Komisiono Meza Oriento kaj Norda Afriko, Esperanta Jura Asocio, Amerika Komisiono, Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj, Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj… Estis ankaŭ multaj konferencoj kaj aliaj kleraj kaj distraj aktoj. Menciindas, fine, la Ekumena Diservo kaj Oratora Konkurso, KER-ekzamenoj (novaj UEA-ekzamenoj, konstruitaj laŭ la aŭtoritata t.n. Eŭropa Referenckadro). Louis Christophe. Zaleski-Zamenhof, nepo de la iniciatinto de Esperanto, sendis salut-mesaĝon al la Kongreso.

Por vidi la tekston de la kongresa rezolucio kaj pli detalan informon pri la Kongreso oni povas konsulti la ret-paĝojn de UEA:
http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html











# Poezia angulo

## Tamen lia destino estos... la morto!

Jen la homo, trankvila kaj feliĉe vivanto,
kaj pri siaj problemoj, ĉiutage pensanto,
plena de espero, entuziasme aganto.
**Tamen lia destino ĉiam estos...la morto.**

Pri tio kaj plie, fervora entreprenanto,
li konstante de sia familio amanto,
por la bono de la homaro li batalanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Tiu estas sama vojo por homa kredanto,
kaj sen eraro por homo kredon rifuzanto,
jen realo por homo diverse opinanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Por nenio utilas al lerta bankposedanto,
eĉ ne validas al li, kiel lerta rabanto
neniam plu la mono estos lia servanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Eble, la homo hipotekita, indignanto,
pensas, mi estas viktimo, kiel suferanto.
tiu malfeliĉo, ne estos lia savanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos la...la morto.**

La homo konstante de la paco soifanto,
ankaŭ senrimede estos eterna dormanto,
kaj li, pro propraj eraroj kondamnanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Eĉ simpla masonisto en trabaro pendanta,
ĉiam en danĝero, jen alia laboranto,
pri varmo kaj malvarmo konstanta rezistanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Kaj vi ventremulo, ĉiam avare manĝanto.
pri manĝado, preskaŭ neniam estas satanto
kaj konstante li forgesante al malsatanto.
**Tamen, lia destino** ĉiam **estos...la morto.**

Li kiu pri tiu mono ĉiam sopiranto.
lia avareco igas lin la atestanto,
de mizera peno por malfeliĉa vivanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Kaj kion pri la kuracisto, vera aganto,
ĉiam preta savi vivon al agonianto,
malfeliĉa kuracisto, ĉiam fiaskanto,
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

La patrino por siaj filoj, vera luktanto,
kaj la patro pri tio, taŭga kunlaboranto,
patrino kaj patro ĉiu estas esperanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

La homo al morto estas plena abonanto,
la sorto estas lia vera akompananto,
neniam estas eventuala fiaskanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Militisto estas edukita mortiganto.
li ĉiam instruita por estis detruanto,
ankaŭ oni diras, li estas pacdefendanto.
**Tamen lia destino ĉiam estos...la morto.**

Jes, estas homo, konsiderata bonfaranto,
ĉiam de la homaro, li estas defendanto,
kaj de la bonaj agoj, li estas konkuranto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos... la morto.**

Pri politikisto, ofte estas mensoganto,
kaj li estas konstante, la sincera trompanto,
kun kritikoj, ofte evidenta babilanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos ... la morto.**

Virino bela juvelo, kiel promenanto,
rigardata de viro, avida deziranto,
virino tre ofte estas bela provokanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Viro pri virino, jen konstanta adoranto,
kvankam tre ofte, li estas vera mistraktanto,
anstataŭ amanto, li fariĝas mortiganto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

La bonajn rilatojn de la vivo defendanto,
ĉiam al familio li estas apoganto,
estas vivo, kiun celas ĉiu progesanto.
**Tamen, lia destino ĉiam estos...la morto.**

Ĉiam adorata homo, la futbal-ludanto,
li, en la socio estas grava influanto,
li sin konsideras en la ĉielo sidanta.
**Tamen, lia destino ĉiam estos... la morto.**

Vanteco, mono, avareco, ĉiu kulpanta,
envio, egoismo, saman vojon iranta,
jes, ĉiu, li, ŝi, en saman sakon entenanta.
**Tamen, lia destino, ĉiam estos...la morto.**

**Luis Serrano Pérez**

## 21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

### Lloret de Mar, de la 6-a ĝis la 12-a de oktobro - 2013



Kelkaj entuziasmaj katalunaj esperantistoj organizas ĉiujare allogan E-Semajnon ĉe la marbordo de Mediteraneo. Ĉiam ĝi okazas alterne norde kaj sude de Barcelono. Ĉi-foje la bela urbo Lloret de Mar gastigis tiun-ĉi eventon. Lloret estas unu el la plej vizitataj turismaj centroj de la "Costa Brava"- Sovaĝa Marbordo. En la pasinteco ĝi dependis de la konstruado de ŝipoj, fiŝkaptado kaj agrokulturo. La kampojn anstataŭis modernaj hoteloj laŭlonge de la strando. Ni loĝis en la plej granda, en la hotelo "Don Juan" kun 869 ĉambroj. Ĝi estis plene okupata. Por niaj aktivaĵoj ni disponis pri granda salono.
La aranĝon partoprenis 136 esperantistoj el 15 landoj. Venis pluraj novuloj, kiuj asertis partoprenon denove venontjare. La plej aĝaj estis 95 kaj 97-jara bone parolantaj geesperantistoj el Sant Cugat del Vallés. Tie okazis la unuaj du E-Semajnoj iniciatitaj de S-ino Trini Garcia Corbach. Kun nostalgio ŝi rememoris tiujn eventojn.
La inaŭguran ceremonion ĉeestis la urbestro de Lloret S-ro Romà Codina i Maseras. Li afable bonvenigis nin dezirante sukcesan restadon. Inter elstaraj personoj troviĝis Barbara Pietrzak el Pollando, kiu salutis nome de UEA. Tuj posttagmeze ŝi prelegis pri la gazeto Heroldo de Esperanto menciante ĝiajn iamajn redaktorojn. Ŝi ĉefe omaĝis kaj substrekis la grandan laboron kaj meriton de Ada Sikorska Fighiεra por Esperanto. Barbara ankaŭ iom rakontis pri la E-movado en Pollando kaj ĉefe pri la Pola Retradio, kies elsendojn ŝi efike prilaboras kaj prezentas.
De Paŭlo Branco ni eksciis pri la funkciado de Eŭropa Unio. Li, kiel kompetenta persono, pro siaj funkcioj en diversaj institucioj de EU detale priskribis la nuntempan situacion en Bruselo.
Wolfgang Günter en siaj prelegoj "Kulturo de daŭropoveco" parolis pri neceso de la malpliigo de produktado kaj konsumado por pli digna vivo de ĉiuj. Krom aliaj gravaj punktoj li atentigis pri klimatŝanĝiĝo kaj ties malbonaj konsekvencoj por estontaj generacioj.
De la geedza paro Buŝs el Latvio ni eksciis pri la fama litova pentristo kaj komponisto Mikolajus Konstantinas Ĉiurlionis. Ilia dua prelego temis pri la tri Baltaj landoj. Samtempe ili invitis partopreni la 50-an jubileon de BET (Baltaj E-Tagoj) okazonta venontjare en Latvio.
Nia kara organizanto, poeto kaj pensemulo Luis Serrano Pérez dediĉis sian ampleksan prelegon al "La Agrokulturo". Temis pri influo de agrokulturo al la homa vivo ekde la pratempo ĝis nun. Li emfazis la fakton, ke sen agrokulturo ne povas ekzisti la vivo. En lia interveno kaj debato "Ĉu la E-movado kontentige progresas" estis iom malfacile konvinki lin pri daŭra progresado malgraŭ tio, ke ne okazas tiom da klubaj aktivaĵoj kiom en la pasinteco. La moderna epoko alportas novajn rimedojn, eventojn kaj aliajn aktivaĵojn.
Rodica Todor el Rumanio instruis Esperanton al la partoprenantoj de diversnivelaj scioj. En la E-kurso fluparolantoj plenumis donitajn taskojn dum ŝi okupiĝis pri komencantoj. Rodica kuraĝigis kaj lerte gvidis ilin al progreso. Kun granda entuziasmo ŝi sukcesis kontentigi ĉiujn grupojn.
La premio de Ada Sikorska Fighiera estis ĉi-foje atribuita al S-ino Alicja Lewanderska-Quednau pro ŝia efika laboro por Esperanto. Kiel kutime okazis ekskursoj. Ŝipe ni direktiĝis al la proksima urbeto Tossa de Mar, kie ni supreniris (kelkaj - per urba trajneto - aliaj piede) al kastelo por ĝui belan panoramon. Restis tempo por promeno tra stratoj kaj kafumado. Dum alia duontaga ekskurso ni vizitis la maran muzeon en Lloret kaj ekkonis ĝian historion. La tuttaga ekskurso estis tre aprezata. Ĝi gvidis nin al Girona, kie ni vizitis la malnovan kvartalon, vidis la katedralon kaj poste ni daŭrigis tra montareca pejzaĝo ĝis la ĉemara urbeto Cadaqués. Iuj el ni promenis ĝis la urbeto Portlligat por vidi la domo-muzeon de la fama pentristo Salvador Dalí.
Dum vesperaj programeroj ni dufoje "interkonatiĝis" ĉe vintrinkado. Ŝercoj, kantoj kaj poemoj animis tiujn vesperojn. En alia vespero la edzino de Luis, Maria Ferigle, per DVD prezentis la operon "La Traviata". Ne mankis folklora vespero kun havanaj kantoj de la jam konata ensemblo "Montjuit" kaj la fama trinkaĵo "Cremat", per kiu finiĝis en gaja kaj neforgesebla etoso la 21-a E-Semajno.

Liba Gabalda




Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



# Kuirante kun Pilar



## Blank-ĉokolada fluidaĵo

### INGREDIENCOJ

100 gramoj da blanka ĉokolado plus kromaj kvar uncoj por la interno de la fluidaĵo.

2 ovoj.

50 gramoj da butero.

1 sup-kulero da faruno.

30 gramoj da sukero.

### ELLABORADO

1-e. Antaŭhejti la fornon je 260 gradoj.
2-e. Hejti la 100 gramojn da ĉokolado kaj la 50 gramojn da butero dum unu minuto kaj duono je 500 vattoj.
3-e. Miksi la ovojn kun la sukero kaj la faruno.
4-e. Aldoni la fanditan ĉokoladon kaj miksi ĉion.
5-e. Ŝmiri la unu-personajn muldojn per iomete da butero kaj pulvore disŝuti sur ilin farunon.
6-e. Verŝi la miksaĵon en la muldojn plenigante ĝis triono el la ujo. Meti ĉokolad-uncon en ĉiun muldon kaj plenigi la ujojn per la cetero el la miksaĵo.
7-e. Baki la enmulditajn fluidaĵojn dum 7 al 8 minutoj kaj servi ilin tuj post la elfornigo.

# En la duon-jarcenta jubileo de la 2a Vatikana Koncilio



La 2a Vatikana Koncilio de la RomKatolika Eklezio estas, eĉ por multaj personoj ligitaj al tiu Eklezio, tre malbone konata afero. Do, la plej grava evento en la vivo de tiu institucio dum la tuta 20a jarcento estas, por iuj, nekonata, kaj por aliaj, forgesita, kaj por plejparto el la homoj, nekomprenita.
En la historio de la eklezia institucio la koncilioj, ekde tiu de Niceo, en la jaro 321, estis grava faktoro en la evoluo de la ideoj kaj la ritaro de la kristanismo. La lastaj koncilioj, ekde la 16a jarcento, estis kontraŭ-reformismaj, kaj nur tiu 2a Vatikana havis alian karakteron. La fakto ke ties disponoj estas reale ignorataj signas la krizon kiun nun traspertas la Eklezio kaj la koncepto mem de "koncilio".
Temante pri tiu ekumena koncilio de la 20a jarcento kaj la maniero kiel estis/as rifuzita, eĉ se ne oficiale, de la institucio mem kiu realigis ĝin, povas utili ekzameni kiel estus la modelo de Eklezio kiun la Koncilio volis kaj kiamaniere la institucio kaj ties gvidantaro devis, kiel memdefenda reago en sia deziro plu resti kontraŭreformisma, falsi la signifon de la disponoj de la Asembleo kaj eviti ties aplikadon.
Per la sekvaj ĉapitroj de ĉi tiu eseo ni travivos aŭ tramemoros la kernon de tiu kontraŭdiro kaj la fiaskon de tiu eklezia "perestrojko". Kompreneble, la termino "perestrojko" en ĉi tiu kunteksto estas komparo kun simila fiasko de reformisma intenco entreprenita en alia movado, tiu de la sovetunia sistemo antaŭ pli ol 20 jarojn.
La perestrojkaj procezoj fiaskas laŭ du manieroj. La unua estas kiam la proponita reformo rezultas nuligita de la institucio mem kiu entreprenis ĝin. Tio okazas kiam la povo en la institucio falas sub la kontrolo de kontraŭreformismaj fortoj de la kolektivo. En la sovetia sistemo fiaskis tiamaniere la reformista intenco iam entreprenita de Ĥruŝĉov. La alia fiasko-maniero okazas kiam la reform-movado fariĝas nekontrolebla kaj preterpasas la originan celon ruinigante la institucion aŭ sistemon kiun oni pretendis reformi. Al tiu fiasko-formo apartenis, en la sovetia sistemo, la Perestrojko aŭ Glastnosto de Gorbaĉov. En la Katolika Eklezio, la fiasko de reformismo de la 2a Vatikana Koncilio apartenas al la unua modelo. Ĉu la reakcia reago de la papoj Johano-Karlo la 2a kaj Benedikto la 16a anoncas la ruiniĝon de la kaduka institucio gvidita de ili kaj kreas la kondiĉojn por ke tio realiĝos?
Sendube la kristanismo plu ekzistos dumlonge kaj tio estos bone por la homaro, sed la institucioj kiuj nun enkarnigas ĝin, la Eklezio Katolika kaj aliaj, devos malaperi, ĝuste por la bono de la homaro, kaj esti anstataŭitaj de aliaj pli justaj kaj malpli koruptaj kristanaj organizaĵoj.
Temante pri la Rom-Katolika Eklezio konkrete, la korupton, ties efektivigantojn kaj profitantojn, kaj la metodon uzitan por ties efektivigado, ni pristudos per ĉi sekva raporto. La menciita pristudo postulos oftajn postrigardojn al la multjarcenta historio de la Eklezio kaj ĉi ties antaŭaj koncilioj. Tio sufiĉe oportunas nun ĉar ĉi-jare, krom la 50-jaran datrevenon de la 2a Vatikana Koncilio, oni povas jubilei ankaŭ la 17an jarcenton de la Eklezio, se oni konsideras kiel la komenciĝon de la Eklezio la Edikton de Milano per kiu la romia imperiestro Konstantino rajtigis la kristanan religion. Tiam, ja, komenciĝis la procezo de instituciiĝo de io kio ĝis tiam estis nura religia movado. Reale, la temaro de ĉiuj ekumenaj koncilioj plus multenombraj lokaj koncilioj kaj sinodoj centriĝas en la tri elementoj kiuj konstituas la esencon de la institucia karaktero de la Eklezio: la dogmaro, la ritaro kaj la hierarkio, t. e., tri elementoj kiuj havas neniun rilaton kun la instruo de Majstro Jesuo el kiu ĉiuj kristanaj eklezioj pretendas esti sekvantoj.
Eble la pristudado de tiu historia procezo helpos la sincerajn sekvantojn de tiu Majstro kompreni kiel ni alvenis al la komplika labirinto al kiu kondukis nin la doktoroj sidiĝintaj sur la katedro de Jesuo de Nazaret.

# Koncilioj tra 17 jarcentoj











Kiam, la 11an de oktobro de la jaro 1962 okazis la solena malfermo de la 2a Vatikana Koncilio, la RomanKatolika Eklezio havis en sia historio multajn tiutipajn Asembleojn, kvankam, oficiale, nur al proksimume dudeko da ili rekonas nun la Kodo de Kanon-Ĵuro la karakteron de ekumenaj koncilioj. La unua estis tiu de Niceo en 321, kelkajn jarojn post la permesigo de la kristanismo far Konstantino. Fakte, estis tiu imperiestro mem kiu kunvokis la koncilion. La papo aŭ episkopo de Romo intervenis nenion en la afero: tiam li ne gravis pli ol la ceteraj episkopoj.

Tiu Nicea Koncilio estas fama pro tio ke en ĝi oni difinis la unuan dogmon, tiun de la dieco de Jesuo-Kristo, kaj oni deklaris herezon la kontraŭan tezon, tiun de la episkopo Ario kaj ties sekvantoj. La arianismaj episkopoj estis demetitaj el iliaj episkopaj seĝoj kaj ekzilitaj laŭordone de la imperiestro, kaj oni formulis la unuan kredon kiel simbolon de ortodokseco. La afero de la arianismo ne finiĝis rezulte de la Koncilio de Niceo. Kvankam en tiu Asembleo estis aprobita la teologia formulo proponita de Konstantino mem, la opinio de tiu imperiestro ŝanĝiĝis poste kaj li decidis apogi la arianojn kontraŭ la ĝistiamaj ortodoksuloj. Same arianfavora estis la teniĝo de de la sekvinta imperiestro Konstancio, filo de la antaŭa. Do la polemiko pri la dieco de Kristo daŭris laŭlonge de la tuta 4a jarcento kaj estis aliaj koncilioj en kiuj oni intencis, vane, atingi la unuecon de la kristanoj pri la afero. Aperis novaj kristanaj tendencoj, iuj intermezaj aŭ kompromisaj inter la kontraŭaj teniĝoj. Kaj kelkaj koncilioj aprobis arianajn aŭ duon-arianajn tezojn. La ĉefa el tiuj koncilioj estis tiu de Antioĥio en la jaro 341.

En la aprobo de la diversaj teologiaj tezoj estis grava faktoro la apogo de la romiaj imperiestroj. La interkontraŭantaj ekleziaj partioj konkuradis klopodante la imperiestran subtenon. La episkopoj de la tezoj deklaritaj herezaj en la koncilioj perdis sian rangon kaj suferis ekzilon kiam ili ne submetiĝis al la kredoj difinitaj kiel ortodoksaj far la koncilioj. Ne mankis episkopoj, kaj eĉ romia papo kiu oportunisme akceptis la arianajn dogmojn kiam la imperiestro Konstancio postulis tion. La influo kaj decidkapablo de la cezaroj estis pli evidenta en la koncilioj de Konstatinopolo (jaro 381) kaj Efezo (jaro 431). En la unua el ĉi lastaj estis definitive kondamnita la arianismo ĉar la tiama imperiestro, la hispana Teodozio, sin tenis favora al la kontraŭa tezo. Tiu sama koncilio deklaris dogmon ankaŭ la diecon de la Sankta Spirito. La Koncilio de Efezo proklamis la dogmon de la **Θεοτόκος** ***Theotokos*** (Di-naskintino), t. e. di-patrineco de la patrino de Jesuo, kontraŭ la episkopo Nestorio kaj ties sekvantoj, kiuj estis persekutataj de tiam.

Tio ĝis nun vidita montras al ni iujn el la originaj pekoj de la tiam naskiĝanta Eklezio, el kiuj la institucio ne liberiĝis ankoraŭ, komence de la 21a jarcento p. K.: la dogmemismon (la emo difini dogmojn devige kredendajn) kaj la cezarismon (la emon uzi la povon kaj la perforton por altrudi religiajn kredojn kaj devojn).

Aliaj pekoj de la eklezia institucio, hereditaj ankaŭ de multaj el la eklezioj kaj sektoj apartiĝintaj el ĝi laŭlonge de 17 jarcentoj, estas la ritismo aŭ kultismo (la emo centrigi la religiecon en la kulto: praktikado de ritoj, ceremonioj, sakramentoj…), kaj la hierarkio (la laŭranga strukturiĝo de la eklezianoj en gradoj kaj ordinoj). La koncilioj de Mezepoko kaj postaj pli okupiĝis pri tiuj temoj ol pri krederoj. Ni iomete trarigardos tiun koncilian procezon, sed antaŭe ni devas mencii ke kiam la aprobita dogmaro atingis ian stabilecon la Eklezio ellaboris sian interpretadon de la koncilialara historio kaj kreis la koncepton de "Ekumena Koncilio" por asigni ĝin al la koncilioj kiuj aprobis la dogmojn fine venkintajn, kaj neis tiun karakteron de "oficiala" aŭ "ekumena" al la koncilioj kiuj estis aprobintaj tezojn arianajn aŭ de iu alia el la movadoj kiuj fine estis deklaritaj "herezaj". Same, kaj tial ke en iu el la lastaj koncilioj oni deklaris la senerarecon de la papoj de Romo, estis necese falsi la historion por kaŝi la fakton ke kelkaj romiaj episkopoj, en diversaj epokoj, estis aprogintaj iun aŭ alian el la krederoj poste fiaskintaj.

La Koncilio de Kalcedonio (jaro 451) deklaris ke en Jesuo estis nur unu sola persono –dia-. La kreda labirinto fariĝas pli kaj pli komplika. La ĝistiama ortodokso asertadis ke en Jesuo estis du naturoj: dia kaj homa, kaj ke li havis ne nur homan korpon sed ankaŭ homan animon (krom dia naturo) kaj nun Kalcedonio postulas ke estas nur unu persono. Eble la konciliaj patroj komprenis tion ĉar ili, kaj post ili ĉiuj ortodoksaj papoj kaj episkopoj kondamnas kaj ĵetas anatemon kontraŭ ĉiuj kiuj ne akceptas tion sendiskute.

Tiu sama koncilio de Kalcedonio fiksis normojn pri la ordinacio de sacerdotoj kaj episkopoj, kaj komencis distingi la papon de Romo super la ceteraj episkopoj. Ĝis tiam la papoj ne multe elstaris sur la cetero el la episkoparo. En la unuaj koncilioj ili estis nek kunvokintoj nek ĉeestantoj, kaj ili devis akcepti la konciliajn disponojn truditajn de la imperiestroj, veraj ĉefroluloj de tiuj Asembleoj. Sed poste la imperio dividiĝis kaj ties okcidenta parto baldaŭ dekadencis kaj fine falis sub la premo de la barbaraj popoloj. En Konstantinopolo plu estis koncilioj sub la aŭtoritato kaj la influo de la tieaj imperiestroj sed en okcidento, malaperinte la imperiestra aŭtoritato, la rolo de la papoj de Romo fariĝis pli kaj pli grava. Iompost-iom kreskis la aŭtoritato de la papoj en la religia tereno sur la kristanigitaj landoj de Okcidento kaj ili eĉ alprenis iujn politikajn funkciojn antaŭe plenumitajn de la cezaroj. De tiam, kaj ĝis nun, la papoj uzas kiel eksteraj signoj de sia povo purpurajn vestaĵojn kaj la titolon ***Pontifex Maximus*** (Plejalta Pontifiko) antaŭe uzitaj de la romiaj imperiestroj, kaj ekde la jaro 752 al 1870 la papo estis suvereno de ampleksa itala teritorio, la t. n. **Papa Ŝtato** aŭ **Eklezia Ŝtato**.

La Koncilioj de Konstantinopolo, ekde la dua, en 553, ĝis la sesa, en 870, estis agnoskitaj de la Eklezio en Okcidento. Sed poste okazis en tiu urbo pluaj koncilioj kiuj validas nur por la Orientaj Eklezioj. Tiam jam estis definitive disigitaj ambaŭ branĉoj de la iama romi-imperia Eklezio. En la katalogo de la Ekumenaj Koncilioj agnoskitaj de la Rom-Katolika Eklezio, preskaŭ ĉiuj okazintaj dum la dua jarmilo estis sub la aŭtoritato de la Papo. Dum la daŭro de malpli ol unu jarcento, ekde 1123 al 1215, okazis ne malpli ol kvar el tiuj ekumenaj koncilioj en la Baziliko de Laterano, kiu estas la katedra sidejo de la papoj kiel episkopoj de Romo.

La unua el la Lateranaj koncilioj okupiĝis, ĝuste, pri iu konflikto (tiu de la "investiduroj") de politika kaj religia konkurenco inter la rom-katolika papo Kaliksto la 2a kaj la germana imperiestro Henriko la 5a, per kiu ambaŭ suverenoj interdisputis la rajton nomumi episkopojn. Tiu konflikto ilustras du realaĵojn: unue, ke la religio kaj ties hierarkio estis fakta povo en la socio kaj tial la civilaj aŭtoritatoj emis kontroli la organizajn rimedojn de tiu povo; kaj due, ke la religia hierarkio ambiciis ne nur konservi la religian povon sed ankaŭ plenumi la politikajn funkciojn, kiuj, en multaj lokoj, akompanis la episkopan rolon. Ja, en Germanio la episkopoj estis samtempe princoj de la regionoj kiuj estis iliaj diocezoj.














La ceteraj Lateranaj koncilioj, same kiel tiuj kiuj sekvis: Unua de Liono (1245), Dua de Liono (1274) kaj Vienne (1311-1312) havis kiel komunan econ la zorgadon de la Eklezio pri siaj interesoj kiel monda institucio (hierarkio, kulto, cezarismo…), ne pri la antaŭeniro en la progreso de la Dia Regno: plifortigi la aŭtoritaton de la papo, kondamni kontraŭpapojn, batali kontraŭ la interna korupto de la propra institucio (simonio), establi formulojn por la celebrado de la sakramentoj kaj fiksi ĉiujaran devigon ricevi iujn el ili: konfesio, komunio…, persekuti internajn grupojn kiel la templanoj, begardoj kaj skurĝiĝantoj, ne tute kontroleblaj de la Eklezia aŭtoritato, kaj ĉefe, persekuti eksterekleziajn kristanojn: kataroj, albigensoj, valdenanoj… Ĉi ĉiujn oni translasadis al la civila aŭtoritato por ilin puni. La Inkvizicio estis kreita en la jaro 1184, kaj tiam estis la epoko de la kruc-militoj predikitaj de la Eklezio.

Speciale interesaj estis la koncilio de Konstanco (1413-1418) kaj tiu de Bazelo-Feraro-Florenco (1431-1445). En iuj historiaj verkoj ambaŭ koncilioj estas konsiderataj kiel unu sola. Reale, la periodo inter 1413 kaj 1445 estis serioza provo de memreformo de la Eklezio, provo kiu fiaskis. La korupto en la institucio estis enorma, kaj ankaŭ la internaj bataloj. Estis la epoko de la t. n. “Skismo de Okcidento”. En 1413 ekzistis en la Okcidenta Eklezio ne malpli ol tri papoj samtempe. Unu el ili havis sian pontifikan sidejon ĝuste en nia lando, konkrete en Penjiskolo. La emo pri eklezia reformo kaj reunuiĝo (ankaŭ kun la kristanoj de Oriento) estis enorma inter la kristanoj de Okcidento, kaj la iniciato kunvoki koncilion por tion solvi venis de la episkoparo, ne de la papoj. Fakte nur du el ili konsentis akcepti la disponojn de la koncilio. Kiam ĉi tiu kunvenis ĝia unua dispono estis eksigi la tri papojn kaj elekti novan. Plej grava decido de tiu koncilio estis konstituiĝi kiel konstanta Asembleo, t. e., senĉesa koncilio, kun la papo submetita al ĝi kiel nura funkciulo. En tiu eklezia sistemo, kiu ricevis la nomon de “konciliismo” la koncilio estus kvazaŭ Parlamento kaj la papo restus kvazaŭ konstitucia reĝo. Komence la afero funkciis, kaj kelkaj sinsekvaj papoj de tiu periodo alĝustiĝis al tiu skemo. Kiam en 1431 la koncilia Asembleo kunvenis en Bazelo, tio ne estis konsiderata kiel nova koncilio sed kiel dua sesio de la antaŭa por entrepreni, ĉi-foje, la reunuiĝon kun la kristanoj de Oriento. Tiu reunuiĝo ne tiel estis sukcesa kiel la de Okcidento, sed la plej grava fiasko estis ke en la konciliaj sesioj reprenis la kontronlon de la Eklezio la plej tradiciaj fortoj de la institucio, favoraj al la monarkisma povo de la papo. En Florenco, lasta sidejo de tiu koncilio, oni metis finon al la konciliismo kaj oni konsekris la absolutisman povon de la Pontifiko de Romo.

Tiu intenco de reformo entreprenita de interne de la Eklezio fiaskis ĉar la reformistoj eraris en la elektado de la celo. Vere, la koncilianoj de Konstanco ne estis veraj reformistoj: ili dekretis la mortigon de Jan Hus kaj la inkvizician persekutadon al ties sekvantoj. Ili eraris pensante ke la Eklezio estis malsanulo kiu devus estis kuracata, sed la realo estis ke tiu institucio ne estis malsanulo sed la malsano mem, la malsano kiun suferas la kristanismo ekde la kvara jarcento. Tiu reformo-intenco entreprenita de interne de la Eklezio fiaskis sed la tereno restis fekundigita por ke poste aperu reformo-intencoj entreprenitaj de ekstere de la institucio: luteranismo, kalvinismo, anglikanismo… La nova skismo de Okcidento estis pli profunda kaj longdaŭra ol tiu de Mezepoko, kaj persistas ankoraŭ.

La postaj koncilioj de la Rom-katolika Eklezio: 5a Laterana (1512-1517), Trento (1545-1563) kaj Unua Vatikana (1869-1870), restis antaŭ-destinitaj esti kontraŭ-reformismaj. Oni dekretis kontraŭ la reformistaj movadoj kaj kontraŭ ĉiu intenco fari ŝanĝojn en la institucio kaj malgrandigi la povon de la klerikaro. La lasta el tiuj koncilioj, la 1a Vatikana, estis speciale fatala. Tiu Eklezio dumlonge instalita en la feŭdisma sistemo sin tenis malamike kontraŭ ĉiuj fruktoj de la ideo-evoluado: liberalismo, modernismo, socialismo… kaj krome plifortigis la povon de la papo, kiu estis deklarita ne-erarebla. Tia estis la historio kaj la situacio de la Rom-Katolika Eklezio kiam la papo Johalo la 23a kunvokis la koncilion.



# La koncilio de la 20a jarcento

Sendepende de aliaj konsideroj pri la graveco de la Dua Vatikana Koncilio, unue oni devas rimarkigi la singularecon de la fakto mem ke la koncilio okazis. Kial estas singulara tiu fakto? Ja, koncilioj estis multegaj en la historio de la Eklezio, do, unuavide devas ne esti strangaĵo la okaziĝo de iu kroma tiutipa Asembleo. Sed tamen, jes ja, la kunvoko de nova ekumena rom-katolika koncilio en la dua duono de la 20a jarcento estis surpriziga neatenditaĵo. Oni devas klarigi ĉi tion.

Memorindas ke dum la jaroj 1869-1870 okazis la antaŭa koncilio, la Unua Vatikana. Kaj tio, kio pli distingis tiun Asembleon estis la absolut(ism)a povo de la papo. Tiu koncilio deklaris kiel dogmon la senerareblon de la papo. Krome oni formulis en tiu Asembleo la kunligon de la instruo-povo kun la jurisdikcia povo de la Plejalta Pontifiko sur la tuta Eklezio. Tio signifas ke, laŭ tiu koncilio, la plena jurisdikcia povo enestas en la Papo, la tuta aŭtoritato kaj la vereco de la Eklezio estas parto de la aŭtoritato kaj la vereco de la Papo. Tiele, sub la influo de tiu doktrino, la papo Pio la 10a (hodiaŭ, sanktulo de la Eklezio), jam en la 20a jarcento, esprimis la penson: ***Kiam la Papo parolas, estas Kristo kiu parolas; kiam la Papo instruas, estas Kristo kiu instruas***. Kelkajn jarojn antaŭe Johano Bosko (ankaŭ li sanktulo de la Eklezio), diradis: ***La Papo estas Dio sur la Tero***. Tiu doktrino estis diskonigita en la seminarioj, en la priteologiaj verkoj, en la predikoj al la katolikoj… ĝis la tagoj kiam komenciĝis la 2a Vatikana Koncilio.

Nu, se la Eklezio estis tiamaniere organizita, por kio estas necesa la kunvoko de nova koncilio? Se la papo havas la tutan aŭtoritaton necesan en la Eklezio por ĉion decidi, kial la koncilio kaj kiu estus ĝia rolo? Laŭ la eklezia teorio pri la karaktero de la koncilioj, ĉi tiuj estas kunveno de ĉiuj episkopoj por kundecidi kun la papo pri ĉiutipaj ekleziaj aferoj, kaj laŭ tiu sama doktrino ankaŭ la koncilioj estas neerareblaj. Do, la sola fakto kunvoki koncilion signifas pridubi la menciitan doktrinon pri la neerarebleco de la papo kaj ĉi-ties absolutisma povo.

Krome, se ni memoras ke la unuaj koncilioj, tiuj de la 4a jarcento, estis nek kunvokitaj nek prezidataj de la episkopo de Romo, sed de la romiaj imperiestroj, kaj ke tiuj koncilioj, laŭ la eklezia doktrino, estis, ankaŭ ili, neerareblaj, la logika sekvo estas ke la povo en la Eklezio povas esti plenumata diversmaniere, ne nur laŭ la maniero kiun disponis la Unua Vatikana Koncilio.

Ĉio-ĉi evidentigas ke kiam la Papo Johano la 23a kunvokis la koncilion, fakte, li agnoskis ke la regadpovo en la Eklezio ne estas koncentrita en la Roma Pontifiko, kaj ke la respondeco alfronti la problemojn kaj la situaciojn kaj decidi la koncernajn disponojn estas komuna afero de la tuta eklezia membraro, ne nur de aŭtokrata reganto.

Alia afero estas la konsidero ke, laŭ la vojo kiun la eklezia institucio entreprenis dekomence, la disvolviĝo de la eklezia funkciado neeviteble kondukas al la senelira vojo en kiu nun enkotiĝas tiu organizaĵo. Oni povas esti indulgaj kun la papo Johano pri tio ke li ne kapablis vidi tiun realaĵon, kaj ĉiukaze taksi favore al li la fakton ke li komprenis ke la papo sola ne sufiĉas por gvidi la institucion. Verdire, tiu konvinko de Johano la 23a ne estis tiam, nek estas nuntempe, komuna al ciuj ekleziaj altranguloj. Kelkajn jarojn post la 2a Vatikana Koncilio, la nova Kodo pri Kanon-Ĵuro deklaras ke la Roma Pontifiko estas la unika kiu povas kunvoki koncilion, prezidi ĝin, transloki ĝin, suspendi ĝin, aprobi ĝiajn dekretojn, decidi la aferojn kiujn la koncilio povos pritrakti kaj eĉ fiksi la regularon al kiu ĉiuj devas submetiĝi.

Do, la koncilio, eĉ se ĝi nomiĝas "ekumena", estas, laŭ la valida eklezia leĝaro, en la manoj de la papo. Kaj tio ne estis la praktiko de la Dua Vatikana Koncilio mem; ĉi ties dokumentoj estis aprobitaj, dekretitaj kaj starigitaj de la papo kune kun ĉiuj episkopoj. Do, tiu posta leĝaro kiu lasas ĉion en la solaj manoj de la Pontifiko, fakte, estas kvazaŭ interna puĉo en la Eklezio kontraŭ la propraj normoj de la Eklezio.

Jen tiu estas iu unua aspekto, kvankam ne la sola, de la labirinto en kiu enmerdiĝas la institucio.



**Pio la 9a**

Giovanni Maria Giambattista Pietro Pellegrino Isidoro Mastai Ferretti, papo ekde 1846 al 1878.

Estis la lasta papo kiu ĝuis surteran povon ĉar en la procezo de la itala reunuiĝo la Eklezia ŝtato estis konkerita de la reĝo Viktoro Emanuelo.

Tio influis negative sur li laŭsence ke, estinte sufiĉe liberala je komencîĝo de lia pap-regado, li fariĝis poste tre reakcia.

Li kondamnis ĉiujn modernajn movadojn kaj ideojn: liberalismo, naturalismo, racionalismo, socialismo, komunismo, libereco de penso kaj opinio, laikismo, kaj eĉ la elektra lumo.

Li kunvokis la 1an Vatikanan Koncilion, kiu plifortigis la papan povon kaj deklaris la dogmon de la neerarebleco de la papoj. Tiu dogmo estis altrudita al multaj episkopoj kiuj ne konsentis pri la afero. Alia dispono de la koncilio estis asigni al la papo jurisdikcion sur ĉiuj episkopoj.

Antaŭ tiu koncilio li jam estis aginte aŭtokrate proklamante la dogmon de la Senmakula Koncipiteco. Unuafoje en la historio iu dogmo estis proklamita ne de koncilio sed rekte de la papo.



**Leono la 13a**

Vincenzo Gioacchino Raffaele Luigi Pecci, papo ekde 1878 al 1903.

La 25 jaroj de lia pap-regado signifis ian klopodon alproksimigi la Eklezion al la realaĵo de la moderna mondo. Lia politika realismo kaj diplomatia kapablo sukcesis meti finon al la malamikeco de la germana imperia reĝimo rilate al la katolikoj, kaj metis finon ankaŭ al la interfrontiĝo de la franca Eklezio kun la Tria Respubliko. Tamen, daŭre persistis la malbona rilato de la Vatikano kun la itala ŝtato, heredita el la antaŭa pap-regado, rezulte de la detruo de la politika povo de la papoj en Italio.

Leono la 13a famiĝis pro lia enciikliko ***Rerun novarun*** (Pri la novaj aferoj**),** publikigita en 1891, per kiu li bedaŭris la subpremadon de la multegaj malriĉuloj far malgranda riĉularo. Per tiu dokumento li ankaŭ postulis por la laboristoj justajn salajrojn kaj rajton organizi sindikatojn, kvankam li, en la tradicia linio de sia antaŭanto, daŭre rifuzadis la socialismon kaj montris ian malestimon pri la demokratio. Li konsideris neevitebla la ekonomian malegalecon en la homa socio.



**Pio la 10a**

Giuseppe Melchiorre Sarto, papo ekde 1903 al 1914.

Tiu ĉi papo, male ol siaj du antaŭantoj, kiuj estis nobel-klasaj, havis humilan familian originon.

Lia papa etapo karakteriĝis pro la rigideco aplikita en la batalado kontraŭ la laikismo kaj la modernismo.

Aparta atento meritas la ideologia aŭ doktrineca kampanjo en la interno mem de la katolikismo: oni promociis la instruadon de la katekismo jam ekde la infanaĝo. De tiam kaj ĝis nun, la katekismoj estas lerniloj de dogmaro, ritaro kaj normoj de la Eklezio; estus senutile serĉi en ili la mesaĝon de la Evangelio.

Alia karakteraĵo de la epoko de ĉi tiu papo kaj liaj du antaŭantoj estis la pliintensigo de la alieniga devoteco al la t. n. Sankta Virgulino. Ekde la proklamo de la dogmo de la Senmakula Koncipiteco far Pio la 9a, oni promociis troe la preĝadon de la Rozario kaj aliajn aspektojn de la marianisma kulto. Nur tiuj, kiuj bone konas la Evangelion, povas kompreni kiom multe malproksimas el ĝia spirito tiu devoteco, kiu povas esti taksata kiel idolatrio.

# La Eklezio de la Koncilio



Kelkaj el la verkoj pritemantaj la 2an Vatikanan Koncilion reliefigas la kontraston inter la ekzistinta Eklezio antaŭ tiu koncilio kaj la Eklezio kiun la koncilio volis por la estonteco. La esenco kaj karaktero de la antaŭkoncilia Eklezio estas bone priskribita en la dokumento titolita ***Skemo de la Dogma Konstitucio de la Eklezio***. Tiu dokumento estis ellaborita de iu komisiono de naŭ teologiistoj ligitaj al la **Kongregacio por la Doktrino de la Fido**, t. e. la eklezia organo antikve konata kiel **Sankta Inkvizicio**. La menciitan dokumenton oni ellaboris dum la periodo inter la 15a de januaro de 1959, kiam Johano la 23a anoncis sian intencon kunvoki la koncilion, kaj la 11a de oktobro de 1962, dato de la solena inaŭguro de tiu Asembleo, kaj oni ellaboris ĝin ĝuste destine al la Koncilio por ties debatado.

Nu, gravas indiki ĉi tie ke la menciita ***Skemo*** estis rifuzita de la Koncilio. Do, konante la enhavon de tiu dokumento oni povas scii kiun Eklezio-tipon ne volis konservi la Dua Vatikana Koncilio. La studo de tiu rifuzita dokumento permesas koni la ĉefan zorgon, kiu ĝin inspiris, kio estis: ***certigi la eklezian aŭtoritaton kaj identigi ĝian institucian aparaton kun la kristana legitimeco***. Ĉar tia estis la ĉefa zorgo de la teologiistoj ellaborintaj la dokumenton destine al la Koncilio, tiu teksto utilas por informi nin pri la maniero kiel vidis sin mem la antaŭkoncilia Eklezio: iu socio ĵure organizita kaj aŭtoritate gvidata.

Verdire, la konciliaj episkopoj, edukitaj en la eklezia sistemo, ne neis al la institucio la aŭtoritaton kaj la rajton dikti sian propran leĝaron, sed tamen ili estis sufiĉe klarmensaj por kompreni ke la aŭtoritato kaj la ĵurkapablo, eĉ se la Eklezio rajtas posedi ilin, ne estas la ĉefa celo de la institucio sed nur iloj por plenumi ĝian veran rolon.

Nun ni atentu pri tio ke, kiam la teorio subkuŝanta en tiu teksto asertas ke la Eklezio, tia kia ĝi estas, kun ties aŭtoritato kaj hierarkio, estis fondita de Jesuo-Kristo, oni estas certigante ke estas Dia volo la malegaleco ekzistanta inter la eklezianoj. Tiele prezentita la Eklezio, la nepra sekvo de tiu teorio estas ke en la Eklezio iuj devas esti submetitaj al aliaj, iuj ordonas kaj aliaj obeas. Kaj krome, se la naturo mem de la Eklezio estas ĝia hierarkia kaj ĵura konstitucio, rezultas ke nur la Rom-Katolika Eklezio rajtas nomiĝi «Eklezio», ĉar nur tiu Rom-Katolika Eklezio plene alĝustiĝas al la kondiĉoj de legitimeco kiujn ĝi mem difinas. Sub tia premiso, maleblas ĉiu ajn dialogo kun aliaj kristanaj eklezioj. Estas konata la eklezia aserto ke ne estas savo for de la Eklezio. La ***Skemo*** estis inspirita de tiu stranga ideo.

La doktrino de tiu dokumento pri la episkoparo evidentigis ke ĝi pli esprimas la zorgon de la tradicia Eklezio pri la ĵuraj aspektoj de la aŭtoritato de la hierarkio, la rajto, la leĝoj ol pri la unuiĝo de la personoj en komunumeco surbaze de Jesuo kaj la Evangelio. Tial en la ***Skemo*** oni tre insistas pri la submetiĝo de la episkopoj al la papa povo en la plenumado de iliaj funkcioj. La teologia argumento kiun oni prezentas por pravigi tion estis ke la papo estas la fonto de ĉiu jurisdikcio en la Eklezio, kaj laŭ tiu teorio la povo regi kaj ordoni aŭtoritatece venas al la episkopoj, ne el la ordin-sakramento kiun ili ricevis, sed tra papa delegado, kaj ke la episkopoj kaj ĉiuj eklezianoj sub ili devas submetiĝi al la papo kaj obei lin en ĉio, ĉar li estas la fonto kaj esprimo de la Dia volo en la Eklezio. Tiele prezentita la afero, la interrilatoj en la institucio estas regulata nur de normoj, leĝoj kaj povogradoj, ne de kunsento en la projekto de Jesuo por frat-komunume vivadi laŭ lia mesaĝo.

Tia estis la antaŭkoncilia karaktero de la Eklezio, tia estis la Eklezio kion oni volis recepti al la Koncilio, kaj tia estas la Eklezio nuntempa spite al la decidoj de la Koncilio. La plej klara sekvo de ĉi tiu maniero koncepti la institucion estas la emfazo plivalorigi la rolon kaj la gravecon de la eklezia instru-monopolo, la doktrin-aparato de la instituciо, ĉefe la instrua rolo de la papo kaj la episkopoj. Oni starigas en la ***Skemo*** rigidan distingon inter la «instruanta» Eklezio kaj la «instruata» Eklezio. En la institucio estas malmultaj instruantoj, la episkopoj kaj iliaj kunlaborantoj la pastroj, kaj estas la plimulto el la eklezianoj kiuj ricevas la instruon kaj submetiĝas. Tio estas, temas pri la ideo kiun Pio la 10a esprimis per sia encikliko ***Vehementer nos*** kiam, en la jaro 1906, li reagis kontraŭ la disiĝo de la Ŝtato kaj la Eklezio en Francio. Jen la esprimo de tiu doktrino en la enciklika teksto:



Post la Koncilio, la Vatikana Kurio rehavis la kontrolon de la eklezia aparato kaj iom-post-iom nuligis, fakte se ne oficiale, ĉiujn konciliajn disponojn.

***Nur en la hierarkio enestas la necesaj rajto kaj aŭtoritato por promocii kaj gvidi ĉiujn al la sociaj celoj. Rilate al la popolo, ĝi havas neniun devon krom lasi sin gvidi kaj humile sekvi siajn paŝtistojn.***

Sed laŭ la doktrino de la ***Skemo*** ne ĉiuj, kiuj ordonas kaj instruas rajtas same; kiel okazas en ĉiu homa socio, en la hierarkio estas rangoj, kaj la interrangaj rilatoj konkretiĝas en gradoj je povo, aŭtoritato, obeo, submetiĝo…, kaj, kompreneble, en la pinto de la tuta eklezia povo estas la papo, ĉar estas li kiu reprezentas la personon de la Majstro Jesuo por la tuta Eklezio. La pontifiko de Romo estas, laŭ tiu doktrino, la plejsupera majstro de la vero por la tuta Rom-Katolika Eklezio, kaj precipe al li apartenas la funkcion kaj la rajton gardi, defendi kaj senerare proponi la doktrinon pri la savo por ĉiuj kristanoj.

En tia maniero prezenti la aferon, la aŭtoroj de la ***Skemo***, enkarnigante la teniĝon de la inkvizicia aparato de la Eklezio, al kiu ili apartenis, estis falante en la kontraŭdiron iri kontraŭ la propra doktrino de la Eklezio en kio rilatas al la funkcioj kaj la povoj de la episkoparo. Tio estas, en ilia deziro potencigi kaj plifirmigi la povon kaj la aŭtoritaton de la papo, ili subvalorigis la rolon de la episkopoj, kaj tial ili tuŝis iun aferon kiu estis polemika en la ekleziaj strukturoj jam de antaŭ multaj jardekoj antaŭ la Koncilio. Tial, la koncilia Asembleo provizis al la tutmonda katolika episkoparo la eblecon manovri por rehavi la funkciojn kaj la privilegiojn de ilia rango. Tio eksplikas kial la ***Skemo*** estis rifuzita, kiel koncilia labor-dokumento, fare de la episkoparo kunveninta en la Vatikana Asembleo. En sia momento ni vidos kiel, post la Koncilio, la Vatikana Kurio rehavis la kontrolon de la eklezia aparato kaj malfaris ĉion faritan de la Koncilio.

La ***Skemo de la Dogma Konstitucio de la Eklezio*** pritemis aliajn aferojn, ekzemple la interrilatojn de la Eklezio kaj la ŝtatoj. En ĉiuj ili perceptiĝas la sama spirito, la doktrino de la tradicia instru-aparato de la Eklezio, ĉefe ekde la mezo de la 19a jarcento. Fakte, en tiu dokumento superabundis citaĵojn de la papaj enciklikoj kaj diskursoj dum tute mankis mencioj al la biblia dokumentaro kaj la grandaj teologiistoj tiel antikvaj kiel modernaj. Do, la Eklezio difinita de tiu teksto baziĝis sur du kolonoj: la povo kaj la leĝo. T. e. la papa povo aganta en la Eklezio kaj en la mondo pere de iu leĝaro al kiu ĉiuj eklezianoj devas submetiĝi.

Restas klare ke tiutipa Eklezio, antaŭkoncilia, sed denove restarigita post la Koncilio, ne estas la Eklezio kiun deziris la Koncilio. La Asembleo desegnis alitipan Eklezion kies spirito kaj karaktero estis esprimita en la konciliaj dokumentoj. Laŭ la eklezia teorio, la koncilioj estas suverenaj kaj neerareblaj, kaj ankaŭ iliaj disponoj estas leĝaro obeenda en la Eklezio. Kaj tamen en la realo ne okazis tiele. La ĉefa kaŭzo de la fiasko de la reformo dezirita de la Koncilio troviĝas en la limoj fiksitaj je la komenco mem de la Asembleo. La Koncilio estis kunvokita sub la kondiĉoj ke ĝi devos ne tuŝi la dogmaron kaj la hierarkion. Ĉi lasta kondiĉo estis fatala por la posta disvolviĝo de la reformistaj planoj. Lasinte netuŝitan la hierarkian strukturon kun ties influo sur la pov-aparato de la institucio restis stare iu faktoro kiu povus nuligi, fakte se ne oficiale, ĉion deciditan de la trijara Koncilio. Kiam la Vatikana Kurio reprenis sian kontrolon de la institucio povis aranĝi la aferon por iom-post-iom restarigi la Eklezion de Pio la 10a.




Inter la abunda materialo verkita pri la 2a Vatikana Koncilio oftas la laŭdado al la papo kiu kunvokis ĝin, la Papo Ronkalli, Johano la 23a. Iu el la verkoj pritemantaj tiun ekumenan asembleon, menciante ties kunvokadon, temas pri la "profeta intuicio" de la Papo Ronkalli. Temante pri ĉi tiu pontifiko, fariĝis fama kaj kutima la epiteto "la bona Papo Johano". Tiu titolo, unuavide, ŝajnas indiki ke subkonscie oni neis la kvalifikon de "bona" al la antaŭaj papoj.

Vera historiisto devas estis pli objektiva kaj eviti laŭdadon kaj mallaŭdadon kiuj implicus nerealan juĝon. La papo Johano la 23a estis ne malpli influita ol siaj antaŭintoj kaj sukcedintoj de la eklezia rango kiun li havis kaj de la religiaj skemoj de sia medio. Same kiel la ceteraj papoj de la lastaj jarcentoj, li konsideris sin mem viculo de Kristo kaj surtera peranto de Dio. Kaj li kunhavis kun la klerikaro de sia Eklezio politikan poziciiĝon favoran al la kapitalismo kaj kontraŭan al la socialismo kaj komunismo. Li ĵetis ekskomunion kontraŭ Fidel Kastro kiam ĉi tiu konkeris la povon en Kubo kaj entreprenis socialistan revolucion en tiu lando. Dume, la Vatikana ŝtato estrita de li havis amikecan rilaton kun la hispana reĝimo de la diktatoro F. Franko. Fine, la Papo Johano la 23a tute konsentis kun la malracia kredaro de tuta paparo, episkoparo, pastraro kaj ŝafaro de lia Eklezio.

Tion dirite, oni devas ĝuste pritaksi lian decidon entrepreni procezon de renkontiĝo de la Eklezio kun la reala mondo. Ĉar tiu estis, kaj daŭre estas, la reala problemo de la institucio: prezenti la Eklezion tiamaniere ke ĝi estu vera respondo al la profundaj postuloj de la homaro, ke la Eklezio establu dialogadon kun la mondo, dialogadon en kiu la institucio devus ne nur instrui, sed ankaŭ lerni. Ekde la 18a jarcento la Eklezio subtenis malamikecajn rilatojn kun la moderneco. La Klerismo, en la tereno de la ideoj, kaj la Franca Revolucio, en la politika tereno, estis traŭmato por la religio ĝenerale kaj por la Eklezio konkrete. De tiam, la institucio estrata de la papoj sin vidis perdanta la centran pozicion kiun ĝis tiam ĝi estis ĝuanta en Okcidento, ĉar laŭ la postuloj de la moderneco, la religio ne plu povus kuratori, ordoni kaj (mal)permesi tion, kion la personoj devus pensi kaj tion, kion la regantoj devus fari aŭ ne. La klerikaro pensis tiam ke estis necese rekonstrui la perditan ordon, kaj por tion atingi, oni intencis uzi la ideojn de la plej tradicia katolikismo. Do, ilia celo estis rekonstrui la politikan socion helpe de la religio, kaj postuli kompletan obeon al la papo. Laŭ tiu mensa skemo estis eraro ke la homa racio memstaru antaŭ la religio, kaj oni konsideris ke la filozofio situiĝas en ŝtupo sub la teologio, t. e. ke la homa racio devas submetiĝi al la religia fido. Sed, kiel sciate, la ideoj de la moderneco, ekde la epoko de la Klerismo, ne akceptas tian skemon. Tial la katolika klerikaro tradicie kontraŭstaras la modernan mondon, kaj asertas ke la papo ne povas, kaj devas ne, repaciĝi kun la progreso kaj la modernismo.

Tiu pensmaniero plu regis en la ekleziaj medioj dum la 20a jarcento. Pio la 12a, la antaŭinto de la Johano la 23a, altrudis la filozofion de Sankta Tomaso kiel la sole validan por la ekleziaj studoj kaj la seminarioj. Kompreneble, iu institucio kun tiaj ideoj, malfacile povas dialogi kun la mondo kaj la nuntempa kulturo. La ĉefaj dokumentoj elirintaj el la Koncilio: ***Lumen Gentium*** kaj ***Gaudium et***

***Spes***, montras kiom multe la Ekumena asembleo volis reagi kaj distanciĝi el la tradicia katolikismo kiu volis sin plualtrudi per la ***Skemo*** proponita por la koncilia debatado.

Sed ni ne perdu la perspektivon pri la ŝanĝo-ebleco de la Eklezio de la papoj. La Koncilio havis iujn dekomencajn memlimigojn, kiuj konstituis veran steriligilon por ĉiu ajn decido kiun la Asembleo alprenus. Unue, la tradicia dogmaro restis netuŝita; tio fermis la vojon al iu tipo je reformoj kaj plu restigis la institucion en pozicioj kontraŭ la scienco kaj la racio. Due, ankaŭ la hierarkia strukturo estis dekomence deklarita kiel netuŝebla; tio restigis stare iun elementon kapablan repreni la kontrolon de la institucio kaj nuligi ĉiujn konciliajn disponojn.

Ŝajnas ke ĉi tio identigas iun gravan kontraŭdiron de la Eklezio entrepreninta la Koncilion. Ĝi, ja, daŭre konsideras sin mem mastron kaj inspiron de iu civilizacio. Ni memoru ke iu encikliko de Johano la 23a, la papo de la Koncilio, titoliĝis, kaj titoligis la Eklezion, ĝuste, ***Mater et Magistra***, t. e. «Patrino kaj Instruistino». Sed dume tiu institucio estis, de antaŭ proksimume du jarcentoj, merĝita en konfuzo pri la evoluo de la okcidenta socio. Dum la 18a jarcento la Eklezio perdis la intelektulojn, dum la 19a jarcento ĝi perdis la laboristojn, kaj dum la 20a jarcento estis perdanta la junularon. La gvidantaro de tiu Eklezio ne kapablis kompreni tiun fenomenon kaj volis koni la kialon. Jen la esenco de la kontraŭdiro, la institucio kaj ties gvidantaro konsideris sin mem ĉioscian, inspiritan de Dio, neerareblan…, kaj dume ĝi konstatis ke ĝi estis erarinta kaj ne konis la kaŭzon… nek la solvon.


Ronkalli, la papo de la Koncilio, kunhavis kun la cetera klerikaro de sia Eklezio ĉi ties neracian kredaron kaj deformitan pritakson de ilia propra rolo en la mondo.

Tiaj kontraŭdiroj helpas nin kompreni la patologian karakteron de la religio, de ĉiuj religioj. Estas konstatita fakto ke la religioj posedas povon kiun la ŝtatoj, kaj eĉ la grandaj potencoj, kun ĉi-ties tuta forto kaj armilaro, ne povas efektivigi. Kompreneble, tiu povo de la religioj ne efikas sur ĉiuj homoj senescepte, kaj sur iuj personoj la efiko ne daŭras por ĉiam. Sed la efiko, kiam ĝi okazas, ne postulas la uzadon de la armitaj fortoj kiuj garantias la efektivigadon de la povo de la politika aŭtoritato. Por efektivigi la religian povon sufiĉas instali ideojn en la menso de la personoj, kaj tio ĝenerale okazas pere de edukado, kiel eble ekde la plej frua aĝo.

Post la semado de la religiaj ideoj en la homan menson, la afero funkcias per si mem. Tiamaniere oni fabrikas la talibanojn, la krucistojn, la zelotojn, ĉiutipajn fanatikulojn. Nu, tiu religia povo super la homoj kapablas igi ke inteligentaj homoj agadu malsaĝe, kaj ke bonkoraj homoj kondutu perversece. Kaj la homoj subinflue de tiu povo sincere pensas ke ili devas agadi tiamaniere kaj defendi sian kredaron ĉar tio estas agrabla al Dio kaj necesa por sia persona savo. Ĉi tio funkcias tiamaniere same inter la ordinaraj homoj kiel inter la elstaraj kiel, ekzemple, la ekleziaj altranguloj. La papo Pio la 12a en la jaro 1950 deklaris per iu encikliko ke la darvina teorio pri la evoluo de la specoj povus priskribi ekzakte la biologian originon de la homa vivo, sed nur du jarojn antaŭe, la 16an de januaro de 1948, li mem estis defendinta la historian karakteron de la tri unuaj ĉapitroj de la ***Genezo***, t. e. la biblia rakonto de la kreado de la mondo fare de Dio laŭlonge de ses sinsekvaj tagoj.

Kelkaj homoj sukcesas venki, pere de intelekta disciplino, la antaŭjuĝojn instalitajn en la menson pere de misformiga instruo, sed en multaj personoj tiu procezo ne sukcesas aŭ eĉ komenciĝas neniam. Kio okazis en la menso de Pio la 12a dum la dujara periodo inter ambaŭ kontraŭdiraj pozicioj pri la darvina teorio? Nu, tutsimple, eble dum tiu tempo li legis la verkaron de Darvino, io kio, cetere, estis malpermesite fari al la katolikoj laŭordone de la Eklezio mem.

Simile okazis en aferoj rilate al moralo kaj doktrino. Krom la modernismon, la Eklezio de la 19a kaj 20a jarcentoj kondamnis ankaŭ sociekonomiajn teoriojn kiaj la socialismo kaj la komunismo. Papoj de tiu dujarcenta periodo solene deklaris ke la komunismo estas esence malbona kaj malpermesis al la katolikoj la apartenon al komunistaj partioj. Ili ŝajne ne estis konantaj, aŭ

estis forgesintaj la instruon de la Mastro Jesuo, el kiu ili pretendis estis sekvantoj, kiu iam diris:

> ***Kiu havas du tunikojn, tiu donu al la nehavanto; kaj kiu havas manĝaĵon, tiu faru tiel same. (Luko, 3 : 11)***

Ne hazarde dum multaj jarcentoj tiu Eklezio malpermesis traduki la bibliajn tekstojn al lingvoj komprenataj de la ordinara popolo.

Tiuj ekzemploj kaj multaj aliaj kiujn oni povus prezenti montras al ni du aferojn: unue, la patologian karakteron de la religioj kun ties kapablo deformi la homan objektivecon, kaj la kontraŭdiron de institucio, kia la Rom-Katolika Eklezio, kiu pretendas estis mastrino kaj instruistino de la socio kaj la mondo sed tamen bezonas lerni el ĉi tiuj por korekti siajn proprajn erarojn.

Nu, estis tiutipa institucio la Rom-Katolika Eklezio kiu sin pretis por malfermiĝi al la moderna mondo. Sendube estis volo entrepreni tiun malfermiĝon sed mankis kapablo efektivigi la planon. La enorma pezo de 17-jarcenta tradicio balastĝenis la movkapablon de tiel ampleksa organizaĵo kaj la reformo rezultis ne-realigebla. Apriore oni ne povas certigi la rezulton de entreprenata procezo, sed ĉi-kaze ni temas pri sperto efektive realigita. Per la sekvaj ĉapitroj ni trastudos la disvolviĝon de tiu fiasko kaj intencos eltiri instruon pri ĉi ties kaŭzoj.



**Benedikto la 15a**

Giacomo Paolo Battista della Chiesa, papo inter 1914 kaj 1922.
Li apartenis al iu patricia familio de Ĝenovo. Ekde lia ordeniĝo kiel pastro en 1878, li rapide progresis en la Eklezia kariero: en 1882 li rolis kiel nuncio en Madrido, kaj kvin jarojn poste li estis promociita al la Sekretariaro de la Vatikana Ŝtato. En 1907 li estis nomumita ĉefepiskopo de Bolonio kaj en majo de 1914 Pio la 10a nomumis lin kardinalo. Nur tri monatojn poste, forpasinte tiun papon, Giacomo estis elektita por sukcedi lin kaj alprenis la nomon “Benedikto la 15a”.
La unuaj kvar jaroj de lia papa regado estis signitaj de la Unua Monda Milito. Li tre aktive klopodis meti finon al la milita konflikto, kiun li difinis kiel “la memmortigo de la civilizita Eŭropo”. Lia neŭtraleco altiris al li la malestimon de ĉiuj batalantaj potencoj, sed post la finiĝo de la milito ĉiuj taksis pozitivajn liajn porpacajn klopodojn. En multaj aspektoj li estis iu papo tre malsimila ol liaj antaŭintoj, ekzemple, li metis finon al la malpermeso al la italaj katolikoj partopreni en la politika vivo de la lando. En 1922 li mortis okaze de epidemio de gripo.



**Pio la 11a**

Achille Damiano Ambrogio Ratti, papo ekde 1922 al 1939. Li naskiĝis en familio de malalta burĝaro en la itala regiono de Lombardio.
Jam ekde la epoko de lia pastreco li distingiĝis pro sia granda erudicio pri filozofio, teologio, matematiko...
Dumtempe li rolis kiel profesoro de teologio kaj hebrea lingvo en la Universitato de Milano. En 1919 li estis nuncio en Polujo kaj en 1921 oni nomumis lin ĉefepiskopo de Milano kaj kardinalo. Sekvintjare, post la morto de Benedikto la 15a li estis elektita papo.
Lia pap-regado koincidis kun la periodo inter la mondmilitoj, la revolucio en Meksikio, la plifirmiĝo de la sovetia reĝimo naskiĝinta el la rusa revolucio, la naskiĝo kaj venko de la faŝismo en Italio kaj Germanio, la hispana civil-milito... ĉiuj ĉi fenomenoj, kaj aliaj, kiuj rompis la skemon de la mondo kiun la Eklezio volus konservi kaj mastri, kaj rilate al kiuj la institucio devis poziciiĝi. La teniĝo de la Eklezio kun tiuj realaĵoj estis diversa kaj ofte kontraŭdira.
Per la interakordo de Laterano la eklezia institucio normaligis la situacion kun la itala ŝtato tiam subgvide de Mussolini.



**Pio la 12a**

Eugenio Maria Giuseppe Giovanni Pacelli, papo inter 1939 kaj 1958. Li naskiĝis en Romo en etnobela familio. Antaŭ lia elekto kiel papo li rolis kiel nuncio en Germanio kaj iĝis tre sperta pri la aferoj de tiu lando, eĉ la nazia reĝimo.
Eble lia elekto kiel papo en 1939, kiam estis finiĝanta la hispana civilmilito per la venko de la faŝismo, kaj estis baldaŭ komenciĝonta la Dua Mond-Milito kun verŝajna venko de la eŭropaj faŝismoj, celis pretigi eklezian liderecon kapablan trakti kun la eble venkonta faŝismo.
Sed la milita rezulto ne alĝustiĝis al tiu prognozo. Venkis la burĝaj demokratioj kun kiuj Pio la 12a ne simpatiis kaj la komunistaj reĝimoj kiujn li plenkore abomenis. Do, dum la 13 jaroj post la milito li devis vivi kaj agadi kiel papo en mondo kiu ne kongruis kun siaj politikaj preferoj kaj diplomatiaj kapabloj.
En 1950, preskaŭ unu jarcento post la proklamo de la absurda dogmo de la Senmakula Koncipiteco de la Virgulino far Pio la 9a, Pio la 12a proklamis alian, same absurdan dogmon, tiun de la Ĉielenpreno de Maria, kompreneble, ankaŭ ĉi-foje sen la interveno de iu ajn koncilio.

# Koncilia teologio pri la Eklezio



Dum la konciliaj debatoj, baldaŭ konkretiĝis du bazaj ideoj pri la Eklezio, pri la est-maniero kaj la funkciado de la institucio: la Eklezio kiel ***komunio***, t. e. la komunumo de la sekvantoj de Kristo (t. e. tiuj kiuj kunhavas konfidon je Jesuo, pretendas imiti lian vivmanieron kaj partoprenas en samaj sakramentaj signoj), aŭ la Eklezio kiel organizaĵo strukturika sub ***hierarkio*** (t. e. la komunumo de personoj kiuj akceptas saman hierarkian aŭtoritaton kaj submetiĝas al ĉi ties leĝoj). La kontraŭdiro inter ambaŭ konceptadoj de la naturo de la institucio ne estis nura teoria alternativo sed havis konkretan aplikon kiam oni intencas difini kiel devas esti la regado aŭ demarŝado de la organizaĵo: la eklezia reg-strukturo, la uzado de la aŭtoritato, la demarŝado de la povo, la eklezia estr-aparato, kaj sekve, la rolo de la papo. La polemiko fariĝis vere akra, kvankam la afero ne estis konata de la publiko.

La afero fariĝis vere komplika kiam la germanaj episkopoj kuraĝis starigi la demandon: Kiu estas la vera rolo de la hierarkio en la Eklezio? Ili trafe prezentis la kernon de la problemo asertante ke la atento en la Eklezio pli devas adresiĝi al la tuta eklezia asembleo ol al ĉi ties hierarkio; ĉi lasta ekzistas serve de la komunumo, ne male. La ĉefaĵo estas la ensemblo de la sekvantoj de Jesuo-Kristo, kaj nur poste oni povas prikonsideri la rolon kaj funkcion kiu povas havi iu ajn hierarkio serve de tiu komunumo kaj la manieron efektivigi tiun funkcion.

Konstraŭstaris tiun pozicion la ĉefepiskopo Pietro Parente, asesoro de la **Kongregacio por la Doktrino de la Fido** aŭ **Sankta Ofico** (nuntempaj nomoj de la iama Inkvizicio), kiu defendis la ideon kiu pri ĉi tiu temo estis esprimita en la ***Skemo de la Dogma Konstitucio de la Eklezio*** prezentita por la koncilia debatado. Li senĉese emfazis la superecon de la papa unuarangeco, io kio en la teksto de lia interveno aperis ne malpli ol 19-foje. Krome, en tiu teksto oni tre insistis pri la dependeco de la episkopoj rilate al la papo, kaj oni faris apologion de la aŭtoritateca valoro de la eklezia instru-aparato kaj la rajto de la Eklezio kiu, laŭ tiu teorio, estas super la povo de ĉiu ajn civila aŭtoritato.

Do, tiu interfrontiĝo pri du modeloj de Eklezio starigis la demandon: Kiun karakteron havu la eklezia institucio, ĉu sakramentan, aŭ ĵuran? Laŭ la respondo kiun oni donus al tiu demando, estas evidente ke se oni pravigus la unuan alternativon rezultus ke la Eklezio estus sufiĉe simila al tio kio formiĝis ĉe Jesuo kiam ĉi tiu estis anoncanta la Dian Regnon. Sed la dua alternativo prezentas instiucion ĉirkaŭ iu povo kiu ofte degeneras al aŭtoritatismon, ĉar tiutipa institucio estas elpensita pli por certigi la povon de la regantoj ol la rajtojn de la regatoj.

Nu, la Koncilio devis decidi pri tiu afero, kaj laŭ la ***Dogma Konstitucio pri la Eklezio***, aprobita la 21an de novembro de 1964, la Eklezio estis difinita, unue, kiel ***mistero***, due, kiel ***sakramento***, kaj tri, kiel ***Dia popolo***. Do, esence, la intenco de la Koncilio prezentante tiun tri fundamentajn konceptojn estis aserti la eklezian karakteron de ***komunumo***. Notindas ke, tial ke por pravigi ĉi tiun doktrinon oni argumentis surbaze de la bibliaj

skribaĵoj, iuj koncilianoj bedaŭris ke oni ne pli ofte uzus la enciklikojn de la papoj. La plej elstara episkopo bedaŭrante pri tio estis kardinalo Ottaviani, prefekto de la **Sankta Ofico**. Oni komprenas tiun preferon: la papaj enciklikoj de la 19-a kaj 20-a jarcentoj emfazas la gravecon de la aŭtoritato kaj la hierarkio dum en la bibliaj skribaĵoj oni trovas abundajn dokumentojn favore al la egaleco en la Eklezio. Estas klare ke la poziciiĝo favore al tia aŭtoritato respegulis la volon kaj la inklinon de la vatikana kurio.

Sed la Koncilio, la kunveno de la tutmonda katolika episkoparo, komencis deklarante ke «la nuntempaj kondiĉoj aldonas al la devo de la Eklezio plian urĝon, por ke ĉiuj homoj, unuigitaj nun pli intime per ĉiuspecaj sociaj, teknikaj kaj kulturaj interrilatoj, atingu ankaŭ la plenan unuiĝon en Kristo». Temi pri ***unueco*** estas, antaŭ ĉio, temi pri ***egaleco***. Diferencoj generantaj konfliktojn, kaj disiĝon ne respondas al la Dia volo, kaj tiele ne kongruas kun la Eklezio kiun volis la Koncilio. Krome, tiu Asembleo decidis difini la Eklezion kiel ***sakramento***. La koncilia dokumento ***Lumen Gentium*** deklaras tiurilate: «La Eklezio estas en Kristo kiel sakramento aŭ signo kaj instrumento de la intima unueco kun Dio kaj la unueco de la tuta homa specio». Poste, en la sama dokumento oni difinas la Eklezion kiel «la komunumo de ĉiuj kredantoj kiuj konsideras Jesuon la aŭtoro de la savo kaj principo de unueco kaj paco, videbla sakramento de la unio por ĉies savo». Do, se laŭ la Koncilio, la Eklezio volis prezentiĝi kiel institucio promocianta kaj stimulanta ĉion necesan por la tuthomara unuiĝo, estus necese ke ĉi tiu institucio organizu sin mem laŭ tiu spirito de unueco, kiu implicas egalecon. Do, estas nefidela al la Koncilio kaj al la spirito kiu inspiris ĝin ia eklezio kiu organizas sin kaj funkcias tiamaniere ke la unueco kaj la egaleco inter ĉiuj ties membroj fariĝas neeblaj. Kiel sciate, la termino ***sakramento*** signifas signo, simbolo, videbla realaĵo por komuniki ion ne-videblan. Tio signifas ke la difino sakramento, aplikita al la Eklezio volas indiki ke tiu institucio devas aperi kiel videbla realaĵo de la unuiĝo kun Kristo kiun ĝi pretendas komuniki al la mondo. T. e. ke ĉiu persono perceptu pere de kaj dank' al la Eklezio la instruon pri unueco kiu celas pretersuperi ĉiun disiĝon, perforton, kaj subpremadon inter la homoj. Do, kiam la homoj vidas ke en la Eklezio okazas ĉiuj misagoj kiujn la spirito de unueco kondamnas, la kristanoj devas sin demandi kion ili estas farantaj. Jesuo estis tre ege tolerema kaj respektema kun la senkleruloj, la malriĉuloj, la pekuloj kaj la marĝenitoj de sia epoko. Li estis maltolerema nur kun la netoleremaj, la fanatikuloj kiuj surbaze de la religio sin konsideris pli bonaj ol la ceteraj. Jen la modelo aŭ kriterio de la unueco kiun Jesuo proponas.

Alia difino pri la Eklezio, kiun la Koncilio disponis, estis la esprimo: «Dia popolo». Tuta ĉapitro de la dokumento ***Lumen Gentium*** estis dediĉita al ĉi tiu temo, kio atestas pri la graveco kiun la episkopara Asembleo atribuis al ĝi. Jam en la tekstoj de la **Nova Testamento** oni difinas kiel «Dia popolo» la kristanan komunumon. En la **Skemo** de la preparo de la Koncilio oni mencias unue la hierarĥion kaj nur poste temis pri la «Dia popolo». Sed la Koncilio renversis tiun rangigon kaj antaŭmetis la koncepton de «Dia popolo» konsiderante ke ĉi tiu estas la ĉeftemo dum la hieraĥio estas nur instrumento ĝiaserve. Ekzistas la hierarkio por la Eklezia komunumo, ne inverse. Tiamaniere oni metis definitivan finon al tiu antikva teologio kiu asertis ke la hierarkio estas la unuaranga, la esenca kaj decida en la Eklezio dum la eklezia membraro, fakte, ne estas pli ol klientaro de la hierarĥio. Ĉi tiun instruon estis diskonigante la antaŭkonciliaj verkoj. La pastroj eliradis el la seminarioj plenkonvinkitaj ke ili estis la ĉefaj konstituantoj de la Eklezio. La episkopoj kaj pastroj estis kiuj sciis pri la religiaj aferoj kaj kiuj devis kaj povis decidi tion kion la senrangaj eklezianoj devus fari aŭ ne. La cetero el la kristanoj devus nur akcepti tion kion oni diradis al ili kaj plenumi ĉion ordonitan al ili. Sufiĉas tralegi la **Kodon pri Kanonika Juro** por konstati ke tiu leĝa eklezia dokumento daŭre restas inspirata de la antaŭkoncilia teologio aŭ hierarkiologio. Oni diras en la intraekleziaj medioj, kvankam la afero ne fariĝis publika, ke la Papo Ratzingero (Benedikto la 16-a) ordonis al la episkoparo ke en ĉi ties dokumentoj oni evitu la mencion de la esprimo «Dia popolo» temante pri la eklezia membraro. Li mem estis ekzemplo pri tiu praktiko: en sia encikliko ***Spe salvi*** (Espero pri savo) en kiu aperas 26-foje la vorto «Eklezio», eĉ ne unufoje aperas la esprimo «Dia popolo»; en la encikliko ***Caritas in veritate*** (Vera karitato) la termino «Eklezio» aperas 63-foje kaj la esprimo «Dia popolo» nul-foje; kaj fine, en la ĉefa en siaj enciklikoj, la ***Deus caritas est*** (Dio estas karitato), temante pri la ensemblo de la katolikoj, oni uzas ne malpli ol 93-foje la vorto «Eklezio» dum tute ne aperas la esprimo «Dia popolo». Vere estas ke okazis simile ankaŭ en la enciklikoj de la antaŭaj papoj, ellaboritaj en la antaŭkoncilia epoko sub la influo de la antikva teologio; nur en la encikliko ***Populorum Progresio*** aperas dufoje tiu esprimo, kiun oni volas prefere eviti tial ke ĝi iamaniere elvokas subjekton kiu povus aspekti inda je iuj rajtoj kaj ilin postuli.




La specialistoj esplorintaj la fiaskon de la Koncilio reformi kaj renovigi la Eklezion atribuas egan gravecon al la fakto ke la episkopoj partoprenintaj la Asembleon kaj aprobintaj ĉi ties dokumentojn estis plenkonvikitaj ke se ili renovigus la teologion de la Eklezio, tio, kaj pro tio, okazigos la renovigon de la eklezia institucio. Ja, plejparto el la konciliaj episkopoj kaj teologoj pensis ke, sendube, tiu institucio estus pli kohera kun ties origina inspiro, kun la Dia plano kaj la ideo de Jesuo, se la teorio pri la Eklezio, t. e. la prieklezia teologio estus ŝanĝita laŭ la Evangelia spirito.

Vere estas ke la pridoktrina debatado dauris plejparton el la konciliaj sesioj, ĉar la episkopoj plendediĉiĝis al la disputado de teologiaj doktrinoj. Ili pensis ke la estonteco de la Eklezio dependus de tio. Tamen, oni konstatas nun, post la pasado de duonjarcento, ke tiutipa diskutado estis senutila, ĉar la ŝanĝo-ebleco tute ne dependis de teorioj pri la naturo kaj karaktero de la institucio. La esenco de la Eklezio ne estas ĝia teoria aŭ teologia rilato kun la Evangelio, sed ĝia organiza formo. La institucio, ĉiuj homaj institucioj, kvankam ili naskiĝas por la plenumado aŭ atingo de iu celo, ne estas difinataj kaj karakterizataj laŭ tiu celo, sed laŭ la organiza funkciado kiun ili asignas al si men. En la Katolika Eklezio, sendepende de la ekleziologia teologio kiun ĝi havus, ties funkciad-maniero daŭre kaj plu restas difinita de la tradicia kaj konservativa **Kanonika Juro**, kiu estis ellaborita jam en la 11-a jarcento kaj validas ankoraŭ nuntempe.

Tiu **Kanonika Juro**, kiel sciate, koncentris la tutan povon de la institucio en la figuron kaj la personon de la Papo de Romo. Jen la problemo. Kaj tiu problemo ne estis alfrontita, eĉ ne konsiderita, de la Koncilio. Resume, la ekleziologio estas parto de la teologio kiu devus ne esti esprimata per nuraj ideoj, eĉ se tre pravaj kaj ortodoksaj. Se krome ĝi ne konkretigas la normojn kaj funkciad-manieron de la institucia organizo, la ekleziologio restas ne-kompleta kaj subdanĝere de devojiĝoj direkte al nedeziritaj rezultoj. Ĝuste tio eksplikas tion kio okazis post la koncilio. En la praktiko de la eklezia funkciado la reg-povo daŭre estas koncentrita en la papo mondskale kaj en la episkoparo je loka nivelo.

Sed la problemo de la maniero kiel efektiviĝas la regado de la Eklezio estas pli grava ol tiu de la monarkisma povo de la papo kaj la episkopoj ĉar inter la Pontifiko de Romo kaj la tutmonda episkoparo troviĝas la stranga elemento de la kurio, la dikasterioj, kiuj estas kvazaŭ la ekleziaj ministroj, t. e. la ensemblo de la veraj demarŝantoj de la aferoj de la institucio kaj veraj kontrolantoj de la povo en la Vatikano. Menciindas ke la ***Lumen Gentium***, unu el la du ĉefaj konciliaj dokumentoj kaj kiu estas tiu kiu teologie teoriumas pri la institucio, mencias eĉ ne unufoje tiun gravan reg-organismon de la kurio. Nur alia malpli grava dokumento, la dekreto ***Christus Dominus***, kiu pliklarigas la duarangan rolon de la episkoparo, iomete mencias la kurian ministraron kaj faras tion, en la 9-a kaj 10-a paragrafoj, nur por malaprobi ĝin kaj indiki ke tiu ento devas esti reorganizata.

Tamen, kvankam oni atribuas al la Papo Paŭlo la 6-a sinceran volon kaj intencon apliki la disponojn de la Koncilio, dum la longdaŭra pap-regado de tiu Pontifiko la afero tute ne pliboniĝis, sed tute male: anstataŭ malpliiĝi la nombro da dikasterioj, ĝia nombro plialtiĝis kaj ĝia povo fariĝis pli granda super la tuta

Eklezio, eĉ super la episkoparo kaj la kardinaloj. Eĉ pli grave: la povo de la kurio kaj la maniero efektivigi ĝin preterpasis eĉ tion kion disponas la reakcia **Kodo de Kanonika Juro** kiu, ja, apenaŭ mencias tiun organismon. Ja, oni povas diri ke la kurio kaj eĉ ĉio rilate al ĝi estas kontraŭ-konstitucia, kvazaŭ interna konstanta puĉo en la Eklezio. Ĝia nura mempravigo estas roli kiel demarŝanta ento de la totala kaj absolutisma povo de la papo, sed en la realo tiu regado efektiviĝas marĝene, dorse, de la papo kaj foje eĉ kontraŭ la scio kaj la volo de la Plejsupera Pontifiko. Resume: tiu kuria burokrataro agadas nome de la papo sed tute sendepende de ĉi tiu. Atestas pri tio la prifinancaj skandaloj okazintaj en la Vatikano dum la pap-regadoj de Johano-Karlo la 2-a kaj Benedikto la 16-a, kaj eble ankaŭ la tiea rezisto esplori kaj puni la pedofilajn deliktojn de la religiuloj. Sed ne nur tiuj specialaj kazoj de deliktoj kaj skandaloj klamas kontraŭ la agado de la kurio, sed eĉ –kaj ĉefe– la normala funkciado de tiu organismo argumentas kontraŭ la ekzistado mem de tiu reg-aparato. Ĉar, anstataŭ la laŭdogma strukturo: –papo kaj episkopara kolegio– aperas nova, fakta kaj nenormala strukturo: papo, kurio kaj episkoparo. Tiele la kurio rezultas kiel kontrolanto de la episkopara kolegio kaj kun aŭtoritato super ĉi tiu. Ja, ĉiuj episkopoj en la mondo konscias pri tia realaĵo, ĉar, fakte, estas la kurio tiu kiu decidas la nomumon de la episkopoj, tiu kiu kontrolas ilin kaj atentigas ilin kiam ĝi tion konsideras oportune laŭ ĝia kriterio, kaj eĉ eksigas kaj translokigas ilin se necese. Kaj, laŭteorie, la kurio povas fari ĉi-ĉion laŭleĝe ĉar la sola kanono rilate al tiu organismo en la **Kodo de Eklezia Juro**, t. e. la kanono 360, diras ke la kurio "efiktivigas sian funkcion nome de la Pontifiko de Romo kaj kun ĉi ties aŭtoritato". Evidentas ke la funkciuloj de tiu reg-organismo povas facile fali, kaj fakte falas ofte, en la tenton preni decidojn kaj disponojn sur la tuta eklezia membraro (eĉ la episkoparo) tiamaniere ke la destinitoj de tiuj disponoj ricevu ilin kvazaŭ temus pri pontifikaj ordonoj, t. e. disponoj kies ŝanĝo ne eblas kaj eĉ estas ne-apelacieblaj.


Oni devas insisti pri tio ke tiu nenormala ento de la kurio, eĉ se ĝi agadas, laŭteorie, nome de la papo, fakte ĝi estas aŭtonoma povo kiu povas funkcii kaj fakte funkcias kontraŭ la planoj kaj la volo de la pontifiko mem. Dum la procezo de verkado de ĉi tiu eseo, laŭlonge de la jaro 2013, okazis la demisio de la papo Benedikto la 16-a kaj estis elektita nova papo. Pri ĉi tiuj eventoj ni temos en la lasta ĉapitro, sed nun decas ke ni atentigu pri la fakto ke inter la eblaj kialoj de la demisio de la papo, ne malmultaj specialistoj pri vatikanaj aferoj menciis ke la pontifiko, kun sia tuta absolutisma povo, ne povis batali kontraŭ la ĉio-pova kurio kaj rezignis sian taskon por ke pli vigla homo alfrontu tiun problemon. Iuj el tiuj spertuloj pri ekleziaj aferoj eĉ sugestis ke la vivo mem de la papo estis subdanĝere en tiu batalo kontraŭ la aparato de la reala povo en la Vatikano. Ne eblas certe scii kiom da vero estas en tiutipaj spekulacioj, sed ni devas ne forgesi ke, kun kurio aŭ sen kurio, la pov-ekzercado en la Eklezio estas absolutisma. Ĉu tiu povo kuŝus en la manoj de la papo aŭ ĉu la kurio kontrolas ĝin nome de la pontifiko, la tuta membraro de la Eklezio havas nenian rajton kontraŭ tiu povo. Kaj ĉi tiu realaĵo, kaj ne la Evangelio de Jesuo Kristo estas la vera esenco de la eklezia institucio kaj, ŝajne, fakta kialo de ĝia ekzistado. Eble interesas pripensi ĉu por plenumi la aferon de Kristo, proklami lian evangelian mesaĝon kaj labori por la konstruado de la Dia Regno en la mondo estas necesaj organizaĵoj kiaj la nun konataj eklezioj kun ĉi ties hierarkioj. Sed tiu studo, eĉ se tre interesa, ne estas la celo de ĉi tiu raporto. Ni ekstartu el la supozo ke la sekvantoj de Jesuo, ja, volas agadi por la menciitaj celoj, organizitaj en sociaj strukturoj de iu ajn tipo, se ili, ni, ne trovas alian manieron aranĝi la aferon. Tiu deziro povus pravigi la ekzistadon de la eklezioj, la Rom-Katolika kaj aliaj. Sed, tion supozite, ĉu nepre devas esti, tia kia ĝi estas, la organiza strukturo de la katolikoj? Daŭre ekzamenante la **Kodon de Kanonika Juro** ni trovas ke la 331-a kanono diras ke la povo de la papo en la Eklezio estas "plejsupera, plena, tuja kaj universala", krome, "li povas ekzerci ĝin ĉiam laŭvole". Kaj la kanono 333-a aldonas en ties Tria paragrafo, ke "ne eblas apelacii kontraŭ iu sentenco aŭ iu dekreto de la Pontifiko de Romo". Krome la kanono 1404-a deklaras ke "la papa sidejo povas esti juĝita de neniu". Do, evidentas ke la rajtoj de la eklezianoj valoras nenion antaŭ tiaspeca aŭtoritato: iu ajn sentenco aŭ dekreto de la papo, aŭ de la kurio lianome, nuligas ĉiun ajn rajton. Nu, ĉu tiutipa aŭtoritato ne estas tio, kio tradicie estas konata kiel "absolutisma monarĥio"?

Sed ĉi tio, kio estas tre klara en la tereno de la juro, ne estas tia en la teologia tereno. Jen la kerno de la kontraŭdiro delonge nesolvita en la Eklezio: ne estas kongruo inter la eklezia juro kaj la eklezia teologio. Kaj tio fariĝis pli grava kiam la Koncilio renovigis la teologion pri la Eklezio kaj ne renovigis la eklezian organiz-manieron. En kio rilatas al la funkciado de la institucio, la Koncilio lasis ĉion same kiel ĝi estis antaŭe. Konkrete, la Koncilio lasis netuŝitaj du aferojn: la povon de la papo kaj la ekzistadon de la kurio tia kia ĝi estis antaŭe.

El ĉio-ĉi rezultas ke la Katolika Eklezio estas socia ento en kiu la ideoj iras tra iu vojo kaj la realo tra alia vojo. En la tereno de la ideoj oni senĉese mencias altajn idealojn: sindonemo, servemo, solidareco, amo… Sed en la realo altrudiĝas la volo de homoj kiuj agadas laŭ iliaj interesoj kaj ambicioj. La teologio ellaborita de la Koncilio metis la Dian Popolon super la hierarĥio kaj ĉi ties povo, sed la organiza sistemo de la Eklezio restis, fakte, samkiel antaŭ la Koncilio. En la teologiaj ideoj plejrangas la Dia Popolo, sed en la reala vivo daŭre plejrangas la hierarĥia povo kontrolita kaj demarŝata de la vatikana kurio. Evidentas ke la Koncilio, fakte, havas nenian


realan influon sur la Eklezio kaj ĉi ties funkciado. En la ekleziaj skribaĵoj kaj priteologiaj libroj oni multe citadas la konciliajn dokumentojn. Ĉi-jare, memorante la 50-jaran jubileon de la 2-a Vatikana Koncilio oni organizas, en la parokejoj kaj aliaj ekleziaj medioj, multajn aktojn, prelegojn… pri tiu evento kaj citante la konciliajn dokumentojn ***Lumen Gentium***, ***Gaudium et Spes***… Sed en la realo de la funkciado de la eklezia institucio ĉio-ĉi utilas nenion, ĉar la Eklezio en ĝia interna strukturo ŝanĝiĝis neniom. Restis iuj eksteraj ŝanĝoj relative gravaj (en la liturgio k. a.): la meso jam ne plu estas celebrata en la latina lingvo, la sacerdoto jam ne plu celebradas ĝin dorse al la popolo, plejparto el la klerikaro survestas laikajn kostumojn… Sed, verdire, ĉio-ĉi influas malmulte sur la funkciado de la Eklezio, sur la teologia penso de la institucio, sur la maniero preni disponojn vere decidajn por organizi la eklezian agadon en la socio kaj la nuntempa kulturo.

Kaj tamen, multaj kristanoj perceptas ke la kulturo kaj la socio rapide ŝanĝiĝas dum la Eklezio stagniĝas. Eĉ se la publikaj aperoj de la papoj vekas amasan atenton kaj ĉeeston, la realo estas ke multaj personoj silente forlasas la Eklezion. La 2-a Vatikana Koncilio, la ĉefa evento de la Eklezio en la 20-a jarcento estas ne-konata kaj ne-komprenata de multaj personoj. La Eklezio troviĝas en la plej profunda krizo de ĝia historio. Ĉiu juĝu pri la graveco de tiu fakto, sed la afero gravas malmulte por tiuj kiuj komencas kompreni kaj percepti la diferencon inter Kristanismo kaj Eklezio, inter la vera influo de la Spirito de Kristo en la mondo kaj la institucio kiu pretendas esti esprimo de tiu influo.



**Johano la 23a**

Angelo Giuseppe Roncalli, papo inter 1958 kaj 1963.
Deveninta el humila familio. Li naskiĝis en 1881 kaj estis ordenita pastro en la jaro 1904. Li rolis kiel delegito de la papo en Bulgario (ekde la jaro 1931) kaj en Turkio kaj Grekujo dum la Dua Mondmilito. Fine ankaŭ en Francio de 1944 al 1953. Tiujare li estis nomumita kardinalo kaj poste Patriarko de Venecio.
Lia aĝo eble favoris lian elekton kiam la kardinaloj, malakorde pri la elektoto voĉdonis kolegon pri kiu oni opiniis ke ne vivus dumlonge kaj restos kiel transira papo kiu decidos nenion gravan. Tamen li surprizis ĉiujn kunvokante koncilion por la aktualigo aŭ modernigo de la Eklezio. Lia reformemo igis lin subpolemika en la Eklezio; kelkaj laŭdegas lin kaj aliaj abomenas pri li.
Li famiĝis pro lia rompo kun la ceremoniemo de lia antaŭulo; ĉiam li montriĝis afabla kaj familiara kun ĉiuj personoj.
Li mortis, en 1963, antaŭ la finiĝo de la Koncilio.



**Paŭlo la 6a**

Giovanni Battista Enrico Antonio Maria Montini, papo ekde 1963 al 1978. Li naskiĝis en 1897 en familio de kampara nobelaro de Lombardio.
Sacerdoto ekde 1920, doktoriĝis tiujare pri Kanonika Juro.
Lia sola sperto kiel peranto de la papo eksterlande estis lia nuncieco en Polujo en 1923. Li laboris dum iom da tempo en la vatikana Ŝtata Sekretarieco. En 1931 li rolis kiel profesoro pri historio en la Pontifika Akademio por diplomatoj. En 1954 li estis nomumita ĉefepiskopo de Milano.
En 1958 li estis unu el la unuaj kardinaloj nomumitaj de Johano la 23a.
Post la morto de tiu papo Montini estis elektita papa kaj alprenis la nomon Paŭlo la 6a.
Li decidis daŭrigi la Koncilion kunvokitan de lia antaŭulo, kaj aplikante la disponojn de tiu Asembleo li stimulis la ekumenajn rilatojn kun la eklezioj ortodoksaj, anglikana kaj luterana. Tamen dum lia longa papregado komencis esti bremsata la aplikado de la disponoj kaj reformoj de la Koncilio.



**Johano Paŭlo la 1a**

Albino Luciani. Lia pap-regado daŭris nur 33 tagojn, ekde la 26a de aŭgusto al la 28a de septembro de 1978.
Li estis, ĝis la nuntempo, la lasta papo el Italio.
Li devenis el humila familio. Pastro ekde 1935, de 1937 ĝis al 1947 li rolis kiel vicrektoro de la Gregoria Seminario de Belluno. Tie li gvidis instruadon, interalie, pri dogma kaj morala teologio, Kanonika Juro kaj religia arto.
En 1958 li estis nomumita episkopo de Vittorio Veneto. En la jaro 1962 li partoprenis en kvar sesioj de la 2a Vatikana Koncilio. En 1969 Paŭlo la 6a nomumis lin Patriako de Venecio, kaj kvar jarojn poste oni ordinis lin kardinalo.
Elektita papo post la morto de Montini lia pontifika etapo estis la maplej longa el la 20a jarcento kaj unu el la plej mallongdaŭraj el la historio de la Eklezio. En tiel kurta tempo li donis signojn voli ŝanĝi la rigoran protokolon ligitan al la figuro kaj la persono de la papo, sed ĉio fuŝiĝis pro lia frua forpaso.

# Institucio esence hierarkia



Por pli bone kompreni kial duonjarcenton post la Koncilio la organizo de la Eklezio plu estas same kiel ĝi estis antaŭ tiu evento oni devas prikonsideri ke la problemo kuŝas sur la maniero kiel devas esti konceptata la eklezia "strukturo". Klarigendas la diferenco inter "strukturo" kaj "organizo". La strukturo de iu ajn organizo estas la elementoj kiuj garantias la konsiston de la ensemblo. En la kazo de la Eklezio la teologoj asertas ke ĝia strukturo estas la hierarkio, t. e. la episkopoj kiel sekvantoj de la apostoloj. Dume la organizo estas la konkreta formo de funkciado de la institucio, kiu povas ŝanĝi laŭ la okazo kaj la situacio. La episkopa strukturo de la Eklezio povas esti organizata laŭ diversaj, malsamaj manieroj, kaj ĝuste tio okazis dum la historio de la eklezia institucio. Dum la unua jarmilo de nia erao ĉiu episkopo estris iun komunumon aŭ lokan eklezion, kiu estis elektinta lin. Ekde la 11-a jarcento plifortiĝis en la Eklezio la povo de la papo kaj liaj konsilantoj. La eklezia strukturo estas la sama kiel ĉiam sed la organizo tre ŝanĝiĝis.

Sed la ĉefa problemo de la Eklezio ne estas la maniero kiel funkcias ĝia organizo sed kiel oni devas koncepti ĝian strukturon. Ĉar se la organizo ŝanĝiĝas laŭ la interesoj de la centra "strukturo", tio okazas tial ke tiu strukturo povas aranĝi la aferoj laŭ sia plaĉo kaj intereso. Tiurilate oni povas formuli jenan demandon: La eklezia strukturo, t. e. la episkoparo, havas ĉu sakramentan aŭ juran bazon? Laŭ la dokumentoj de la lasta Koncilio la episkoparo havas sakramenta bazon, ne nur juran. Tamen multaj aferoj demarŝitaj en la Eklezio funkcias kvazaŭ la fundamenta bazo de la episkoparo estus nur jura, kaj tute ne sakramenta. Por la teologoj studintaj ĉi tiun realaĵon, ĉi tio havas sufiĉe gravajn sekvojn. Kiel sciate, en la komencaj kristanaj komunumoj ekzistis iaj responsuloj kiuj, iamaniere, povas esti konsiderataj la tiama esprimo de la posta kaj nuna episkoparo. Verdire, oni ne konas la realan karakteron kaj la diferencojn inter la episkopoj kaj la presbiteroj menciitaj en la malfruaj skribaĵoj de la Nova Testamento. Fine de la dua jarcento p. K. la episkopoj estis konsideritaj sukcedantoj de la apostoloj kaj lideroj de la lokaj komunumoj. Tiele restis la afero dum kelkaj jarcentoj, sed oni ne ellaboris ian teorion aŭ teologion pri la episkopeco. Kaj okazas ke ankoraŭ nuntempe ne estas ellaborita tia teologio.

Tiu manko klarigas la historian procezon de la eklezio. Nur en la 12-a jarcento komencis la teologio pristudi la ordinan sakramenton, kaj ĉi tiu estis albordita ne ekde la flanko de la episkopeco sed de la pastreco (sacerdoteco). Laŭ tiu vidpunkto la episkopo estus nura pastro kun hierarĥia jurisdikcio sur aliaj pastroj. Tiu skemo nutras la ideon de nura jura karaktero de la episkopeco. Kaj en tiu hierarkia skemo la papo estus plejsupera episkopo kun jura hierarĥia jurisdikcio super la tutmonda episkoparo kaj pere de ĉi tiu ankaŭ sur la tuta pastraro kaj eklezia membraro. Tiun skemon apogis la grandaj teologoj de Mezepoko: Petro Lombardo, Aleksandro de Haleso, Tomaso de Akino, Alberto Magno… sed oni devas preciz-

igi ke la teorio estis ellaborita de la papo Gregorio la 7-a kaj ĉi ties teologoj. La argumentado por subteni tiun teologian doktrinon baziĝis sur faktoj kiuj poste evidentiĝis falsaj, t. e. iuj supozitaj dekretoj de la jaro 313 (jaro de la fama Edikto de Milano far la imperiestro Konstantino) malkovritaj en la jaro 850. La dokumentoj rezultis esti falsaĵo kaj tamen sur ili baziĝas la tradicia aserto ke "la tuta povo en la Eklezio devenas de la papo".

Nu, rilate al la afero ĉu la episkopeco havas sakramentan bazon aŭ nur juran, oni devas klarigi ke la respondo ĝis nun neniam estis klara en la Eklezio. Kaj la 2-a Vatikana Koncilio pludaŭrigis la ambiguecon ĉar en ĝia dokumentaro estas konfuziga kontraŭdiro pri la temo: Unuflanke, en la dokumento ***Lumen Gentium 21,3*** oni rotunde asertas ke la episkopeco plene asignas la ordinan sakramenton, sed tuj sekve, la sama dokumento, en la sama paragrafo, aldonas ke la oficoj regi kaj instrui kiujn la episkopoj ricevas "ne povas esti praktikataj se ne estas en konsento inter la kapo kaj la membraro de la episkopa kolegio". Tio estas, la episkopoj povas regi kaj instrui nur akorde kun la papo. La paragrafo ***22,3*** de la sama dokumento plu insistas pri la neceso de la papa konsento por ke la agado de la episkopoj estu valida. Kompreneble, ĉi tio pridubigas la sakramentan karakteron de la episkopeco kaj plifirmigas la juran karakteron de hierarkia submetiĝo al la Pontifiko de Romo. Laŭ tiu teksto, la ensemblo de la episkopoj de la mondo devas kunagadi kun la papo de Romo, sed, ekstartas la demando: kiamaniere konkretiĝas la praktikado de tia kunagado? Jen ĉi tie estas vera problemo ĉar en la funkciadmaniero de la Romkatolika Eklezio la kunagado ne konkretiĝas en la eklezia strukturo sed en la eklezia organizo, t. e. la tutmonda episkopara kolegio kunvenas nur okaze de ekumena koncilio, do, dum la interkoncilia tempo-daŭro, kiu povas esti tre longa, la reale funkcianta povo kuŝas nur sur la papa sidejo, kiu realigas ĝin pere de sia funkciularo: la vatikana kurio. En tiu kunteksto la sakramenta karaktero de la episkopeco estas nura senenhava deklaro dum la reala praktiko estas la jura aspekto de la hierarkia submetiĝo de la tutmonda episkoparo al la disponoj de la papo konkretigitaj kaj demarŝitaj de la kurio. La Eklezio, laŭ la 1-a ĉapitro de la ***Lumen Gentium***, konsideras sin mem "sakramento aŭ signo kaj instrumento de la intima unio kun Dio", sed en la praktiko ĝi daŭre funkcias kiel jura socio, submetita al la papo kaj reguligita de la **Kodo de Kanonika Juro**. Tio eksplikas la nunan streĉitecon kaj kontraŭdirojn interne de la institucio. La eklezia propagando emfazas la sakramentan strukturon kaj la komunan senton sed fakte ĉio funkcias per normoj, dekretoj, kanonoj kaj leĝaj malpermesigoj. Je dioceza nivelo la submetiĝo al la koncerna episkopo estas same kiel la episkopa submetiĝo al la vatikana aŭtoritato.


**Gregorio la 7-a (1073-1085). Li iniciatis la ellaboradon de teologio kiu atribuas al la papoj la plejsuperan povon en la Eklezio. Poste, la teologoj de la 12-a jarcento donis formon al tiu doktrino, kiu plu validas ankoraŭ nuntempe.**

La Koncilio difinis la Eklezion kiel ***ia hac societate hierarchie ordinata***, (iu socio hierarĥie organizita). Rimarkinde, la tria ĉapitro de la ***Dogma Konstitucio pri la Eklezio*** jam ne plu taksas la institucion kiel "Popolo de Dio" sed kiel "socio", kaj krome kiel "socio hierarkie organizita". Se ni konsideras ke la sama Koncilio deklaras la Eklezion kiel "komunumo de egaluloj", "popolo unuigita kaj egaligita pere de la sakramentoj", decas pridemandi la kialon de tia kontraŭdiro. Ĉu ambaŭ difinoj de la Eklezio estis formulitaj en la Koncilio far malsamaj personoj? Nu, ni ne forgesu la manieron kiel estis ellaboritaj la dokumentoj de la Koncilio, de ĉiuj koncilioj: la fina rezulto de la konciliaj deklaroj, kutime, estas frukto de interakordoj, aranĝoj kaj kompromisoj inter la defendantoj de kontraŭstaraj kaj kontraŭdiraj pozicioj. La rezulto povas esti iu ajn afero, kaj oni devas ne atribui al ĝi pli da graveco ol ĝi vere havas. Do, restas klare ke la Dua Vatikana Koncilio ne donis respondon

al la demandoj: kiu havas la plejsuperan povon en la Eklezio?, el kie venas tiu povo?
Temante pri la karaktero kaj naturo de la episkopeco, la rolo kaj funkcioj de la episkoparo, la rilatoj de ĉi tiu kun la papo kaj la posedanto kaj deveno de la plejsupera povo en la Eklezio, la sinsekvaj koncilioj laŭlonge de la historio de la Eklezio, provizas pli kaj pli da konfuzo kaj kontraŭdiroj… la fakto mem ke tiuj aferoj estis nepre pritraktataj koncilio post koncilio montras ĝis kioma grado la temo estas komplika kaj malfacila. Kurioze kaj paradokse, post la precizigoj de ĉiu nova koncilio la afero restas tiel malklara kiel antaŭe, aŭ eĉ pli pridubinda. Ni vidu, ekzemple, tion kio okazis dum la procezo de la koncilioj okazintaj post la t. n. "Skismo de Okcidento", t. e. la Koncilioj de Konstanco, Bazelo kaj Florenco. La unua el tiuj koncilioj, okazinta dum la jaroj 1414 al 1418, fiksis doktrinon deklarantan ke "ĝenerala koncilio, reprezentante la aktivan Katolikan Eklezion, posedas la tujan povon de Kristo, al kiu ĉiu homa estaĵo, kiu ajn estus ties rango, eĉ la papo mem, devas obei". En la jaro 1431 la Konzilio de Bazelo konfirmis, eĉ pli draste, tiun saman kriterion. Ja, por la tiamaj telogoj, la koncilio reprezentadis la Eklezion kaj, tiusence, eĉ la papo estis submetita al la aŭtoritato de la ensemblo de la episkopoj partoprenantaj en la koncilio. Kaj tamen, ankaŭ ne tiam restis klara la afero, ĉar kiam la problemo de la ekzistado de tri samtempaj papoj, rezulte de la Skismo de Okcidento, estis finsolvita, oni revenis al la ideo de tio ke la papo havas pli da povo ol la episkoparo. Kaj tiel do, en la jaro 1439, en la Koncilio de Florenco oni dekretis: "La Sankta Apostola Sidejo de la Pontifiko de Romo posedas la unuarangan aŭtoritaton sur la Universala Eklezio".
Ĉu de tiam restis definitive solvita la problemo? Tute ne. Verdire, de tiam la problemo restis parkita kaj blokita en la Eklezio. La tri sekvintaj koncilioj: 5-a Laterana (jarojn 1512 al 1517), Trento (jarojn 1545 al 1563) kaj Unua Vatikana (jarojn 1869-1870) estis kvazaŭ memdefenda reago de la Eklezio. Memdefendo, kontraŭ kio? Kontraŭ la propra kristana civilizacio kiun ĝi, la Eklezio, estis gvidinta dum tuta jarmilo. La kristana socio naskiĝinta post la krizo de la Romia Imperio de Okcidento atingis ian maturecon (Renesanco) post kiu la gvida rolo de la Eklezio iom-post-iom malfortiĝis kaj defaladis. Protestanta Reformacio, Klerismo, Liberalismo, Laikismo, Modernismo… estis paŝoj kaj aspektoj de iu procezo en kiu la Romkatolika Eklezio jam ne plu estis la mastro kaj inspiranto kiun ĝi estis dum la longa Mezepoko. De tiam, la Eklezio kiu ankoraŭ ne estis solvinta siajn proprajn internajn kontraŭdirojn devis alfronti alitipajn eksterajn problemojn kies naturon la institucio neniam komprenis kaj kies solvon neniam ĝis nun ĝi trovis. De tiam la Eklezio gvidata de la papoj de Romo troviĝis ne-adaptita en mondo kiun ĝi mem estis kreinta. Tiurilate la Dua Vatikana Koncilio troviĝis en la sama linio de konfrontado kun la moderna socio, sed kontraŭe al la tri antaŭaj koncilioj, kiuj sin tenis agrese kaj kondamne kontraŭ la evoluinta socio, la koncilio kunvokita de Johano la 23-a volis sin teni optimisme kaj preta lerni el tiu nova mondo. Oni emfazis tiam pri la eklezia volo dialogi kun la mondo kaj moderniĝi ĝi mem. Kaj por serioze entrepreni tiun procezon estus necese ke la organizo de la institucio estu preta agadi laŭ la spirito kaj la teologio de tiu koncilio. Sed la problemo de la eklezia organizo restis kiel antaŭe, kaj post la finiĝo de la ekumena asembleo la institucio restis gvidata de la samaj fortoj kiuj estis balastintaj ĝin dum la kvin ataŭaj jarcentoj kaj regata laŭ la samaj kriterioj de papa kaj kuria aŭtoritato. Spite al la Dua Vatikana Koncilio kaj ĉi ties progresista doktrino, la duonjarcento pasinta de tiam estis en la Eklezio similaj al la kvin antaŭaj jarcentoj. La Romkatolika Eklezio daŭre estas socio hierarkie organizita en epoko kiam la situacio postulas alitipan organizon, kaj tia neeltenebla situacio fine eksplodas nuntempe.



**La tri koncilioj antaŭ la Dua Vatikana estis kvazaŭ memdefenda reago de la Eklezio kontraŭ la propra kristana civilizacio kiun tiu institucio estis gvidinta dum tuta jarmilo. Protestanta Reformacio, Klerismo, Liberalismo, Laikismo, Modernismo… estis paŝoj de procezo en kiu la Romkatolika Eklezio jam ne plu estis la mastro kaj inspiranto kiun ĝi estis dum la longa Mezepoko. De tiam la Eklezio gvidata de la papoj de Romo troviĝis ne-adaptita en mondo kiun ĝi mem estis kreinta.**

# Neprokrastigebla solvo




Ni memoru ke inter la celoj de la Dua Vatikana Koncilio, krom la alĝustiĝo de la Eklezio al la novaj tempoj ***(aggiornamento)***, estis ankaŭ tiu de la reunuiĝo de la kristanoj, t. e. antaŭenmarŝi direkte al vera ekumenismo. Rilate al tiu postulo, la problemo de la rilato –teorie kaj praktike– inter la papo kaj la Episkopara Kolegio, akiras plian gravecon kaj urĝon. Ja, en tiu tereno la Eklezio spertas la eble plej fortan kontraŭdiron el la ekzistantaj en ĝia sino. Laŭ la antaŭa koncilio, la Unua Vatikana, la celo kaj ekzistokialo de la papo estas agadi tiamaniere ke li estu "faktoro de komuneco kaj unueco inter ĉiuj episkopoj kaj ĉiuj kredantoj". Sed, fakte, tiel kiel estas nun organizita la rolo de la papo kaj ĉi ties regado sur la Eklezio, reale, la papo estas la ĉefa kaj plej forta baro nun ekzistanta por atingi tiun komunecon kaj tiun unuecon. Evidentas ke la teologiaj diferencoj kiuj estis kaŭzo, en la 16-a jarcento, de la rompiĝo de la protestantaj reformistoj kun la Eklezio, apenaŭ gravas nuntempe. Pruvas tion la fakto ke la ĉefa el tiuj diferencoj, tiu de la "praviĝo pere de la fido", tiam prezentita de Lutero, jam atingis interakordon inter katolikoj kaj protestantoj, tiamaniere ke oni subskribis komunan tekston, akceptitan de ambaŭ konfesioj. Do, kiu estas nun la obstaklo por la reunuiĝo de ambaŭ (kaj aliaj) kristanaj branĉoj disigitaj? Ŝajnas ke nuntempe la problemo por atingi tiun reunuiĝon estas ne teologia sed, ĝuste, tiu de la organizmaniero de la Romkatolika Eklezio. Dum plue oni ne solvos tiun problemon, daŭre estos neebla la unueco en la Eklezio kaj la reunuiĝo de ciuj kristanoj.

Ŝajnas ke por kelkaj el la ĉefaj protestantaj konfesioj la problemo ne estas la ekzistado de la papo en la Eklezio sed la formo laŭ kiu la papo efektivigas sian regadon en la institucio. Tiu formo ne estas teologia, t. e. ĝi ne devas nepre esti tia kia ĝi estas, sed estas rezulto de serio da historiaj, sociaj, politikaj, kulturaj kaj juraj cirkonstancoj kaj faktoj. Fakte, en la Eklezio okazis, ĉiunivele, iu deformiĝo: oni identigis la savon de la kristanoj kun la praktikado de la povo far la ekleziaj altranguloj: papo, episkopoj, pastroj… La sekvoj praktiki en la institucio tiun aŭtoritatoformon estis fatalaj por la reunuiĝo de la kristanaj eklezioj. Sed ne nur tio: Krome estas ankaŭ la sekvoj de tio interne de la Katolika Eklezio mem. Ene de la institucio la juraj aspektoj de la afero rangas super la teologio, kaj sekve de tio oni atribuas, laŭ la **Kodo de Kanonika Juro**, senliman aŭtoritaton al la papo. Laŭ tiu leĝaro eĉ koncilio aŭ episkopara kolegio ne povas kontraŭstari la papon nek nuligi iun el ĉi ties disponoj. En la nuna tempo ŝajnas ne imagebla ke la absoluta povo de la papoj konkretiĝu en despotismaj agoj kiel mortpuni iun personon, sed ne malproksimas la epoko kiam la Pontifiko de Romo havis politikan povon sur parto el Italio kaj tie li praktikis farojn similajn al ties de ĉiuj absolutismaj monarĥoj. Krome, kiel sciate, en la historio de la Eklezio ne mankis papoj herezaj. Almenaŭ teorie, la doktrino de la absoluta povo de la papoj pravigas tiutipajn farojn. En ĉi tiu epoko ŝajnas neeblaj tiaj situacioj, sed la plena povo de la papoj, tia kia ĝi estas difinita en la eklezia leĝaro, postulas ke ĉiuj katolikoj devas iri tra tiu vojo indikita de la reganta papo, t. e. la tuta Eklezio devas adaptiĝi kaj submetiĝi sian pensmanieron al la decidoj de la Pontifiko de Romo. Tiele, ekzistas la evidenta danĝero ke la Rom-Katolika Eklezio agu multfoje kaj pri tre gravaj aferoj, ne laŭ la instruo de Jesuo-Kristo kaj la plej urĝaj necesoj sed laŭ la vidpunktoj de la tiam reganta papo. Kaj tio tre gravas ĉar povas okazi ke homo kun tiel granda povo en iuj cirkonstancoj, ĉar tia estas la homa naturo, li ne kapablus alpreni tiel grandan respondecon, ekzemple, se lia sano aŭ aĝo malfortigus lin aŭ konfuzus lian menson.

Ĉu tio povas obei dian planon? Ĉu la ĉeesto de la Evangelio en la mondo devas dependi de la volo kaj la kapablo de unu sola homo, eĉ se li estus sankta, kio ofte ne okazas? Se la papaj decidoj, kiaj ajn ili estu, estas ne-apelacieblaj, kaj se nur la kurio povas roli nome de la pontifiko, tio signifas ke ĉiuj eklezianoj, eĉ la episkopoj, povas suferi, eĉ ne konante la kialon, kanonikajn punojn. Se la kanonika eklezia leĝaro disponas ke neniu povas apelacii kontraŭ la decidoj venintaj el Romo, neniu el la membroj de la

Eklezio havas ian ajn rajton nek defendo-eblecon kontraŭ disponoj kiuj povas esti maljustaj. Do, ĉiuj, kiuj pro siaj religiaj konvinkoj akceptas tiutipan regad-sistemon, devas nepre obei la papajn ordonojn kaj dekretojn. Kaj se iam ili ne konsentas kun iu el tiuj disponoj, ili devas travivi la malakordon nur sekrete, tiamaniere ke la malkonsento restu nekonata de la ekleziaj aŭtoritatuloj kiuj povas puni pri la afero. Tiele ofte en la ekleziaj medioj la etoso ne estas sana kaj provokas situaciojn de hipokriteco far personoj kiuj sentas iamaniere kaj devas agadi alimaniere. Oficiale oni akceptas tion venintan el Romo sed reale oni malkonsentas kaj oni kritikas tion ordonitan aŭ malpermesitan. La problemo kuŝas sur tio ke institucio kie nur la plejsupera reganto havas verajn rajtojn estas homa kolektivo en kiu la personaj interesoj plirangas super la valoroj kiujn tiuj homoj devas celi kaj defendi. Tial, en la Eklezio estas grandkvanto da klerikoj kiuj pli zorgas, en la ĉiutaga praktikado, pri tio kion la episkopo aŭ la papo pensas pri ili ol pri tio kion diras la Evangelio aŭ pri la suferado de la personoj. Institucio funkcianta tiamaniere kreas en sian sinon tiutipajn reagojn kaj kondutojn. Kaj la sekvo de ĉio-ĉi estas la limigo de la persona libero ĝis tioma grado kiun ne povas imagi la uloj mem kiuj suferas ĝin, ĉar tiukaze jam ne estas la institucio kaj ĉi ties normoj tiuj, kiuj metas limojn al la libero, sed la propraj uloj limigas sin mem kaj bremsas sian penso-kapablon pri aferoj cenzuritaj de la institucio. La uloj mem sin blokigas en sian malkapablon decidi ion ajn kio povus alporti neimageblajn problemojn.

Resume, la povo en la Eklezio kaj la maniero demarŝi ĝin estas ne-solvita afero en la Eklezio kaj kreas situacion kiu pli kaj pli fariĝas ne-eltenebla.



**Johano-Paŭlo la 2a**

Karol Józef Wojtyła, papo inter 1978 kaj 2005. Estante polo, li estis la unua slava papo en la historio kaj la unua ne-itala post 456 jaroj.

Li estis persone tre populara, sed en kredo kaj celo tre konservativa kaj nefleksebla, elektante por episkopoj similajn ulojn. Li staris kontraŭ la Teologio pri Liberigo, sacerdotiĝo de la virinoj kaj la edziĝintaj viroj, marksismo… Dum sia longa papregado, kiu koincidis kun la finiĝo de la t. n. "Malvarma Milito", li estis ĉefa obstaklo en la aplikado de la reformo-celaj ideoj de la Koncilio. En 1981 li suferis atencon el kiu rezultis grave vundita.

Eĉ se ege populara, li estis ankaŭ tre kritikata. Unu akuzo estis ke lia opono al komunismo igis lin subteni politike dekstrajn diktatorojn kiel Pinoĉeto. En 1992 la papo konfesis kaj bedaŭris, ke la Eklezio maljuste kondamnis Galileon. En 1995 li ekstaris kontraŭ mortpuno, finante la longdaŭran toleron de la Eklezio pri ĝi.



**Benedikto la 16a**

Joseph Aloisius Ratzinger, papo ekde 2005 al 2013. Germano. Kvankam dum la Dua Vatikana Koncilio li estis inter la plej progresistaj teologoj, kiel papo li daŭrigis la reakcian regadon de lia antaŭinto. Fakte dum la regado de ĉi lasta, Ratzinger rolis kiel Inkvizitoro de la Eklezio kaj gvidis la persekutadon kontraŭ la Teologio pri Liberigo.

Same kiel Johano-Paŭlo la 2a, li vojaĝis al multaj landoj, kaj tiuj vizitoj estis okazo de grandaj, amasaj spektakloj, kiuj, tamen ne sukcesis kaŝi la realaĵon de tio ke pli kaj pli katolikoj perdis la (kon)fidon je tiel reakcia Eklezio kaj forlasis ĝin favore al aliaj religioj, kristanaj aŭ ne, kaj ankaŭ al ateismo.

Lia pap-regado koincidis kun la malkovro de multaj kazoj de pederastio de katolikaj pastro kaj eksterleĝaj prifinancaj skandaloj en la Vatikano. Laca kaj nekapabla alfronti tiel egan problemaron, li demisiis kiel papo en februaro de la jaro 2003.



**Francisko la 1a**

Jorge Mario Bergoglio, papo ekde la 13-a de februaro de 2013. Li naskiĝis en Argentino, filo de italaj gepatroj. Li estis elektita papo post la rezigno de lia antaŭinto, io kio ne okazis en la Eklezio de antaŭ kelkaj jarcentoj.

En 1958 li decidis ekstudi teologion kaj aliĝis al la jezuitoj. Li estas pastro ekde 1969 kaj poste iĝis jezuita gvidanto. En la jaroj 1997–2013 li estis la ĉef-episkopo de Bonaero kaj en 2001 Johano Paŭlo la 2-a nomumis lin kardinalo. Li prezidis la Argentinan Episkoparon ekde 2005.

Oni atribuis al li konservativan tenigon, sed jam de la komenciĝo de lia pap-regado li surprizis ĉiujn per signoj je rompiĝo kun la stilo de la antaŭaj papoj. Fruas ankoraŭ por havi definitivan opinion pri li. Iuj metas je li grandan esperon pri la alpreno de la necesaj kaj urĝaj reformoj en la Eklezio. Dume aliaj, kun prudenta skeptikismo, atendas pli konkretajn agojn ol la ĝisnunaj gestoj.

# Kial fiaskis la 2-a Vatikana Koncilio?



La koncilia dokumento ***Dogma Konstitucio pri la Eklezio*** difinas la eklezian membraron kiel “Popolo de Dio” kaj diras ke tiu popolo karakteriziĝas pro tio ke ĝi havas la dignon kaj la liberon de la filoj de Dio… havas kiel leĝon la ordonon pri amo… kaj kiel celon ĝi havas la taskon de la disvastigado de la Dia Regno. Laŭ tiu-ĉi doktrino la Eklezio estas, devas esti, komunumo de personoj karakterizataj de tri trajtoj: libero, reciproka amo kaj sindediĉo al la tasko de la Regno. Estas klare ke tiu-ĉi difino de la eklezia membraro, reale, konstituas teologion pri la Eklezio mem, t. e. la difino asertas ke ekzistas Eklezio nur kiam ĝia membraro estas libera, reciproke sin amanta kaj laboras favore al la atingo aŭ starigo de la Ĉiela Regno sur la Tero. Aserti tion signifas agnoski ke la ĉefaĵo en la Eklezio ne estas la hierarkia strukturo sed la Dia Popolo kun la menciitaj karakteraĵoj. La esenco de la eklezia institucio, do, ne dependas de tio ke ĝi estu regata de sankta kaj klarvida papo, nek de tio ke la episkopoj estu spirite, teologie kaj persone altkvalitaj, kaj ankaŭ ne de tio ke la pastraro estu sankta kaj abunda. Kompreneble, gravas ke la eklezia hierarkio havu la menciitajn virtojn kaj kvalitojn. Sed kiam, kutime, oni analizas la problemojn de la Eklezio kaj oni kulpigas pri ili la pastraron kaj altan hierarkion, tio montras ke tiuj, kiuj tion faras, havas enmense la klerikalan modelon de Eklezio. Tiu mensa skemo forgesas ke la Eklezio estas la ensemblo de ĝia membraro, kaj la tuta membraro respondecas pri la situacio, ĉu bona aŭ malbona, de la institucio. La deformita mensa skemo formiĝis en la Eklezio ekde la 10-a jarcento. De tiam oni identigis la Eklezion kun ĉi ties klerikaron. Superi tiun klerikalismon estis, interalie, la celo de la Dua Vatikana Koncilio. **KIAL FIASKIS TIU REFORMO-PROVO?**

La Koncilio ne ellaboris teologion pri la modelo de papo kiun ĝi konsideris taŭgan por la regado de la Eklezio. Fakte, ĝi refirmigis la doktrinon kiun, pri ĉi tiu temo, estis difinita en la Unua Vatikana Koncilio, t. e. ĝi difinis la papon kiel sukcedanton de Petro, episkopon de Romo kaj posedanton de ne-erarebla instru-kapablo. Kaj la koncilia asembleo de Vatikano Dua konfirmis ke la rolo kaj la ekzistado de la papo en la Eklezio estas subteni la unuecon en la fido kaj en la komuneco. Sed, asertante tion oni volis indiki ke la bazo de la papeco ne estas jura sed teologia. Se la ekzistado de la papo havus juran bazon, lia rolo estus praktiki ian povon al kiu ĉiuj en la Eklezio devus submetiĝi. Sed se la ekzistado de la papo havus teologian bazon, la rolo de la pontifiko estus vivadi kaj agadi tiamaniere ke la ensemblo de la eklezianoj sin tenu en unueco kaj viv-komuneco. Direndas ke spite al la deklaroj, pri la papeco, de la du lastaj koncilioj, la bazigo de tiu koncepto sur la persono de la apostolo Petro estas nura mito kiu ne rezistas ian historian esploron. Petro neniam estis en Romo kaj ne estis episkopo de la tieaj kristanoj nek papo de ĉiuj kristanoj ĝenerale. Krome tio venigas nin al la polemika demando: Ĉu Kristo fondis iun eklezion? Nu, estas klare ke Jesuo estis la iniciatinto de la homaj klopodoj labori por la starigo de la Dia Regno en la mondo. Tiurilate, ĉiu ajn organizaĵo kiu pretas labori por atingi tiun altan celon rajtas sin konsideri “eklezio de Kristo”. En tiu kunteksto la termino “eklezio” havas teologian sencon, sed devas resti klare ke Jesuo neniam pensis pri la fondo de organizaĵo kun jura karaktero kiel la RomKatolika

Eklezio. Li dekretis nenion, fiksis nenian normon kaj difinis neniun povon por devigi la subulojn submetiĝi al ĝi. La fido kaj la komunieco ne ŝprucas el la jura tereno sed estas rezulto de eventoj kaj spertoj de nura teologia karaktero. Se la Koncilio volis klarigi tion oni povas akcepti ĝian doktrinon eĉ se la apostola historio sur kiun oni deziras bazi ĝin ne estus ĝusta. Ĉar estas evidenta ke la realaĵo de la Roma papeco ne alĝustiĝas al tiu teologia skemo –kaj la deformiĝo eble komenciĝis antaŭ la 10-a jarcento– oni povas aserti ke la Koncilio volis entrepreni reformon tiurilate. **KIAL FIASKIS TIU REFORMO-PROVO?**

Ankaŭ rilate al la episkopeco, la koncilia doktrino ne startis de nulo; ĝi baziĝis sur la tradicia teologia ellaborado de multaj jarcentoj, konkrete ekde la tria jarcento aŭ eble antaŭe, kiu estis definitive fiksita en la Unua Vatikana Koncilio. Tiam la ekzisto de la episkoparo baziĝis sur apostoleco (sukcedado ekde la Apostoloj), sakramenteco (ordina sakramento) kaj la oficoj (la povo instrui pri la Evangelio, la povo regadi kristanan komunumon kaj la povo sanktigi). Ĉar la praktikado de tiuj tri episkopaj oficoj, laŭ la sama eklezia doktrino, ne povas esti realigata sen la konsento de la papo, kaj eĉ la tuta episkoparo kune ne povas agadi sen la konsento de la la Pontifiko de Romo, kaj, tamen, ĉi tiu povas agadi kaj disponi sola, sen la kunhelpo kaj la konsento de la tuta episkoparo kaj la tuta eklezia membraro, rezultas klare ke la difino de la esenco kaj la rolo de la episkoparo estas temo ankoraŭ ne sufiĉe klarigita kaj ke la Dua Vatikana Koncilio lasis la aferon nedifinitan. Sed, se tiel, ĉu tiu koncilio faris ian ajn alportaĵon pri ĉi tiu temo? Nu, eĉ konsiderante la mankojn de doktrina difino pri la episkopaj roloj kadre de la hierarkia strukturo de la Eklezio, oni devas tamen atentigi pri la fakto ke la Koncilio klare valorigis la sakramentecan karakteron de la episkopeco super la juran karakteron de la episkopa posteno. Ne temas pri finsolvo de la problemo sed tamen oni malfermis la pordon al nova kaj estonta maniero kontempli la episkopajn funkciojn en la institucio. Eĉ se timide, temis pri iu provo je reformo. **KIAL FIASKIS TIU REFORMO-PROVO?**

Meritas atenton ankaŭ tio okazinta post la Dua Vatikana Koncilio ĉe la malaltaj gradoj de la klerikaro, t. e. la pastraro. Multaj pastroj aŭ sacerdotoj forlasis sian funkcion dum la du jardekoj post la koncilio. Krome tre ege malgrandiĝis de tiam la nombro da junuloj kiuj sentas alvokiĝon al la sacerdoteco. Inter la nun ekzistanta pastraro estas granda persona krizo kiu manifestiĝas per necerteco, dubeco, timo… ne sciante kiamaniere organizi la propran vivon kaj kiel orienti sian laboradon en la Eklezio kaj sian ĉeeston en la socio. Al tio oni devas aldoni ke la junaj pastroj pli similas al la antaŭkonciliaj sacerdotoj kvazaŭ neniam estus okazinta la Koncilio. Kaj tamen oni devas memori ke la Koncilio serioze okupiĝis pri la vivo kaj la agado de la presbiteroj en la Eklezio, sed, ja, la rezulto ne estis iu renoviĝo de tiu klerikaro sed la menciita granda krizo. Do, indas pristudi ĉi tiun aferon.

La Koncilio perfektigis kaj pliriĉigis la teologion pri la ordin-sakramento, superante la limigitan teorion kiu pri ĝi estis ellaborinta la teologoj de la 12-a kaj 13-a jarcentoj kaj validis ĝis la 20-a jarcento. Tiu mezepoka teologio interpretis la sacerdotecon kiel la povo konsekri la eŭkaristion. En la Koncilio de Trento (16-a jarcento) oni teologiis ankaŭ pri la povo de la pastroj aŭ presbiteroj pardoni la pekojn. Tiamaniere la ordin-sakramento restis limigita al la praktikado de sakralaj povoj, t. e, nuraj liturgiaj, sakramentaj povoj, kaj tiele de tiam la klerikoj estis viditaj kiel homoj de la kulto kaj la altaro. Tio generis situacion en kiu grandkvanto da pastroj sin dediĉis nur al la meso-celebrado kaj aliaj tiutipaj okupoj, ne sentante sin devigitaj alpreni aliajn rolojn, ekzemple, pri apostoleco, kaj eĉ malpli pri sociaj aferoj. Tiele, en la 16-a jarcento ekzistis en Eŭropo urboj kie dekono el la loĝantaro apartenis al la klerikaro (ĉu sekulara aŭ regul-submetita). Kaj dum jarcentoj la sacerdotoj apartenis al privilegiita klas-tavolo en la socio. T. e. temis pri situacio en kiu la presbiteroj ĝuis ekonomiajn avantaĝojn, kaj iĝi sacerdoto estis iu maniero fari karieron. Nu, la Koncilio volis meti finon al tiu modelo de sacerdoteco kaj tiucele gi difinis la doktrinon ke la presbiteroj estas unuigitaj al la episkopoj en la honoro de la sacerdoteco por tri celoj: prediki la Evangelion, gvidi la eklezianojn kaj celebri la sakralan kulton. T. e. laŭ tia teologio la pastro jam ne plu estas ligita nur al la kulto, sed oni starigas ankaŭ lian rilaton kun la eklezia komunumo. Tiu doktrino estis formulita en la koncilia dokumento: ***Dekreto pri la servo kaj vivo de la presbiteroj***, en kiu oni diras ke Kristo igis ilin partoprenantojn en lia konsekrado kaj lia misio.

Konsekrado kaj misio. Sendube ne multaj personoj konstatis tiam, kaj poste, ke en tiu formulo ekzistas iu kontraŭdiro, kiu eble estas rezulto, samkiel multaj deklaroj de ĉiuj koncilioj, el kompromisa interakordo de la defendantoj de reciproke kontraŭantaj pozicioj. Per la termino “konsekrado” oni deklaras ke la sacerdoto estas “konsekrita” homo, t. e. iu kiu estas “apartigita” el la ensemblo de la senrangaj eklezianoj. Tamen per la termino “misio” oni indikas ke la pastro estas “sendita” al la popolo. La sendito ne povas apartiĝi, sed tute male, li devas alproksimiĝi kaj unuiĝi al tiuj al kiuj li estis sendita. Tiu kontraŭdiro inter la esenco kaj la celo de la pastreco igis ke multaj presbiteroj ne sciis nek kapablis organizi sian vivon kaj sian eklezian laboron. Unuflanke estis/as tiuj kiuj daŭre vivadis sian sacerdotecan rolon kiel “konsekrado” al la diaj aferoj, do, apartigitaj el la homa zorgado, kaj aliflanke estis/as tiuj kiuj pretendis prezentadi sian rolon en la Eklezio kiel misio por la predikado de la Evangelio kaj, tiele, asimiliĝo al tiuj al kiuj estis destinita la evangelia mesaĝo. Ambaŭ teologiaj tendencoj konstituas du formojn tre mal-

similajn interpreti la vivon kaj situiĝi en la socio. Resume, la Koncilio volis koncepti alitipan sacerdotecon rilate al tiu formulita de la mezepoka teologio, do: **KIAL FIASKIS TIU REFORMO-PROVO?**

Kvarfoje estis farita tiu demando laŭlonge de ĉi tiu ĉapitro. Venas la momento respondi –aŭ intenci respondi– tiun demandon. En ĉiuj kvar kazoj la respondo, kiun ni intencas prezenti, estas la sama: la reformo-provoj de la Koncilio fiaskis pro tio ke en ties ellaborado kaj en ties plenumado estis deflankigita, ignorita la ĉefa protagonisto de la historio, la popolo, ĉi-kaze la kristana popolo, kiu estas, devas esti, la ĉefa destininto de ĉiuj ekleziaj disponoj. Same kiel la intelektuloj de la politika movado "Klerismo", de la 18-a jarcento, kies devizo estis: "ĉio por la popolo kaj favore al la popolo, sed sen la popolo", ankaŭ la kleruloj de la Eklezio (etimologie la vortoj "klera" kaj "kleriko" havis saman originon kaj signifon en epoko kiam nur la ekleziaj ranguloj sci-povis legi kaj skribi), jarcento post jarcento, kaj koncilio post koncilio, ignoradis la popolon kaj alprenis la taskon decidi kaj dekreti por la popolo sen ĉi ties konsento nek eĉ kono. Tial fiaskis la ĉefa reformo-provo entreprenita de interne en la Eklezio (la konciliismo de la 12-a jarcento) kaj tial fiaskis ankaŭ la Dua Vatikana Koncilio. La kristana popolo neniam sciis kion oni estis diskutante el la koncilia aŭlo. Ĝi neniam komprenis la gravecon de la decidoj tie alprenitaj, kaj neniam ĝi estis kunvokita por entrepreni la realigadon de tiuj konciliaj reformoj.



Proporcie malgranda amaso da eklezianoj akceptas sen-kritike kaj senpripense ĉion venintan el la eklezia hierarĥio.



Rezulte de la disdegno de la laikaro far la eklezia hierarĥio, iom-post-iom malpliiĝas la nombro da eklezianoj ĉeestantaj la liturgian kulton, inter kiuj ne abundas la gejunuloj.

Ĉiuj disponoj de ĉiuj koncilioj, ekde la dogmoj proklamitaj en la 4-a jarcento, estis ellaboraĵoj de la klera klerikaro dorse de la kristanpopolo. La hierarĥio aŭ klerikaro, kvankam ĝi inventis por si mem Kristan devenon, estis/as rezulto de kelkaj historiaj faktoroj, inter kiuj ne estas la plej malgrava la volo de iuj kleruloj por sin altrangigi kaj vivadi, pergajni sian vivon, koste de la popolo. Ja, la samon oni povas diri pri ĉiu aŭtoritato, eĉ la ŝtata aŭtoritato. Sendube tiuj institucioj estas necesaj, ankaŭ inter la kristanoj organizitaj en eklezioj, sed ne estas malpli vera ke tiuj altranguloj uzadas, ĝuste, tiun neceson de la popolo, por eltiri personan profiton el ĝi, same kiel la kuracistoj eltiras profiton el la homaj malsanoj. Do, en la religia tereno sendube estas necesa la ekzistado de ekleziaj organizaĵoj por aranĝi la plenumadon de la komuna celo de la kristanoj, kaj sendube tiuj ekleziaj organizaĵoj bezonas ian tipon je gvidantoj aŭ kunordigantojn. Ŝajnas ke la etimologia signifo de la vorto "episkopo" estas, ĝuste, "kunordiganto", kaj la etimologia signifo de la vorto "ecclesia" (eklezio) estis "asembleo". Nu, estas evidente ke la episkopoj –kaj ĉefe la episkopo de Romo– havas nun en la Eklezio ian povon kiu tre pretersuperas la signifon de la vorto "kunordiganto", kaj la Eklezio, almenaŭ la Rom-Katolika Eklezio, tute ne estas asembleo sed absolutisma monarkio.

Ja, sufiĉis la volo de la papoj regintaj la Eklezion post la Koncilio por nuligi la efikon de la ĉefaj konciliaj disponoj. La katolikoj povis fari nenion por eviti la perfidon al la koncilia spirito samkiel ili ankaŭ ne estis spertintaj –kaj eĉ ne konintaj– la influon de tiu spirito. En la koncilioj, kaj ĝenerale en ĉiuj ekleziaj sferoj, oni disponas por tiu popolo, sed sen la popolo. Oni ignoras kaj disdegnas la popolajn vidpunktojn, kaj rezulte de tiu teniĝo de la eklezia hierarĥio la popolo reagas dumaniere: estas proporcie malgranda kvanto da eklezianoj alkutimigitaj akcepti sendiskute kaj senpripense ĉion venintan el la eklezia aŭtoritato. Al tiu ne-kritika amaso apartenas la publiko kiu ĉeestas la spektaklan kaj spektaklecan papo-kulton: papaj vizitoj, aperoj ĉe la vatikana balkono sur la Placo de Sankta-Petro, la tieajn atendadojn de la elekto de nova papo… La publiko kiu ĉeestas la dimanĉajn meso-celebradojn. Sed estas alia katolikaro, proporcie pli granda, kiu iom-post-iom forlasas la menciitan kulton. Plu kaj plu, laŭ la pasado de la tempo, malpliiĝas la nombro da ĉeestantoj en la celebraĵoj de la Eklezio, kaj inter la personoj kiuj persistas ĉeesti la kulton malabundas la gejunuloj. La kreskiĝanta malpleno en la katolikaj temploj dum la religia celebrado respegulas la foreston de la (eks)katolikoj kiuj ne plu eltenas tion ke la eklezia altrangularo ignoris kaj disdegnis ilin kaj iliajn opiniojn.

Resume: la fiasko de la Koncilio, fakte, estas la fiasko de la Eklezio mem en mondo kiun ĝi ne komprenas kaj kiu ne komprenas ĝin.

# 50 jaroj da stagnado



Ni vidis, per la antaŭaj ĉapitroj de ĉi tiu raporto, ke la Roman-Katolika Eklezio ne kapapablis dece alfronti dum la Dua Vatikana Koncilio la kontraŭdirojn kiujn tiu institucio akumulis dum dek-sep jarcentoj de sia historio. La plej gravaj, niaopinie, estas la tri bedaŭrindaj –kaj ne-necesaj– aferoj kiuj karakterigas la Eklezion ekde la kvara jarcento kaj kiuj estas samsubstancaj al la institucio mem tiamaniere ke oni povas diri ke la Eklezio ekzistas ekde kiam ĉiuj-ĉi tri pestoj kontaĝis la kristanismon. Mi temas pri la dogmaro, la ritaro kaj la klerikaro.

Tamen, eĉ se la Koncilio ne sciis, ne povis aŭ ne volis entrepreni profundan prikonsideron de tiu problemaro kaj ties solvon, ĝi, ja, iome okupiĝis pri kelkaj urĝaj kaj interesaj temoj: la maniero kompreni la fidon, la graveco de la historia Jesuo, la rolo de la Eklezio, la rolo de la hierarĥio, la agado de la laikoj, la ekumenismo, la graveco de la lokaj eklezioj, la rilatoj de la Eklezio kun la politikaj povoj…

Iuj el tiuj temoj estas timidaj kaj periferiaj alproksimiĝoj al la grava problemaro supre menciita. Ŝajnas ke estis la papo Paŭlo la 6-a kiu ne permesis pli profundan okupiĝon pri la kerno de tiuj problemoj. Verdire, kvankam la papoj Johano-Paŭlo la 2-a kaj Benedikto la 16-a estas pritaksataj kiel la ĉefaj obstakloj por la aplikado de la disponoj kaj la reformoj de la Koncilio, niaopinie, la plej granda malamiko de la spirito de la Koncilio estis la papo Paŭlo la 6-a. Dekomence li estis kontraŭa al la celebrado de tiu ekumena asembleo kunvokita de lia antaŭanto Johano la 23-a. Kiam ĉi lasta mortis kaj kardinalo Montini estis elektita papo kun la nomo Paŭlo la 6-a, ĉi tiu povus, laŭ la kanonika leĝaro, ne permesi la daŭrigadon de la Koncilio. Sed li ne agis tiele; li sufiĉe ruze komprenis ke la ekumena asembleo vekis egan simpation kaj esperon ene kaj for de la Eklezio. Do, li konsentis la daŭrigadon de la koncilia laborado, sed la afero, tiam kaj poste, restis sub lia firma kontrolo. Ja, li deprenis el la koncilia diskutado kelkajn temojn, kiel tiu pri la ne-devigo de la fraŭleco de la religiuloj. Sed ĉefe, li alprenis la interpretadon kaj la aplikadon de la disponoj de la Koncilio.

Kiel sciate, oni aplikis de tiam la liturgiajn reformojn aprobitajn de la Koncilio aŭ inspiritajn de ĉi-ties doktrino. Estis aliaj signoj, kiel la forigo de la vatikana pompo, kiel la kronado de la papoj, sed la pontifiko daŭre konservadis sian tradician povon. Paŭlo la 6-a entreprenis politikon de alproksimiĝo al aliaj kristanaj eklezioj, kio povis estis interpretita kiel plenumado de la ekumenisma spirito de la Koncilio. Tamen, la realo estas obstina; ne ŝanĝiĝinte la naturon de la povo de la papo, ĉi tiu daŭre plu estis la ĉefa obstaklo por la reunuiĝo de la kristanaj eklezioj. Kaj kvankam la episkopaj sinodoj kaj la landaj episkopaj konferencoj regule kunvenadas, la afero estas organizita tiamaniere ke tiuj organoj restas sub la kontrolo kaj la aŭtoritato de la vatikana kurio kiu agadas nome de la papo. Cetere, la kulta ritaro daŭre estas alienanta ceremoniaro. La postkoncilia Eklezio daŭre estas tiel ritisma kiel la antaŭkoncilia. Antaŭe ĝi havis ceremonian latinlingvan ritaron kaj nuntempe havas simile sensencan ritaron en la diversaj naciaj lingvoj. Kaj por tiu institucio la ritismo estas celo per si mem, ne simbolo de io kio devas estas travivata en la reala ekzistado de la personoj.

Resume, la longdaŭra pap-regado de Paŭlo la 6-a estis epoko de sufokado de la koncilia spirito sed submaske de propagandeca emfazado de la Koncilio kaj ĉi-ties atingaĵoj (fera mano ene de silka ganto). Dum la regado de tiu pontifiko multaj presbiteroj forlasis sian pastrecon. Evidentiĝis ke ili ne kapablis harmoniigi la kontraŭdirajn ecojn de la sacerdoteco tia kia ĝi estis difinita de la Koncilio, sed ĉefe, multaj el ili ne plu eltenis sian fraŭlecon nek konsentis travivadi kaŝante sian seksecon. Al ili oni permesis, dum la regado de Paŭlo la 6-a, sakramente edziĝi laŭ la Eklezio. Sed post la forpaso de tiu pontifiko, kaj ties efemera sukcedinto Johano-Paŭlo la 1-a, la du sekv-

intaj papoj, Johano-Paŭlo la 2-a kaj Benedikto la 16-a, ne plu permesis la eklezian sakramentan leĝigon de la dizertintaj klerikoj.
Ambaŭ pontifikoj, la pola Karol Wojtyła kaj la germana Joseph Ratzinger, pli malkaŝe ol ilia antaŭinto kondutis kontraŭ la Koncilio. Ja, ili ne hezitis kondamni la latinamerikan movadon de la Teologio pri Liberigo, kiun Paŭlo la 6-a estis respektinta, almenaŭ formale. Okazis ke ili regadis la Eklezion en epoko kiam jam ne plu ekzistis la t. n. “Malvarma Milito”. La malapero de la socialista bloko de Orienta Eŭropo kuraĝigis la tutmondan reakciularon agadi malkaŝe kontraŭ la socialaj rajtoj de la civitanoj kaj la popoloj. Tiu malprogresa fluo efikis ankaŭ ĉe la Romkatolika Eklezio kies antaŭa progresista teniĝo tre estis rezulto de oportunista volo adaptiĝi al mondo en kiu la povrilato dum preskaŭ du jarcentoj, post la granda Franca Revolucio, estis evoluinta favore al pli justa kaj egaleca sociordo. Dum tiu dujarcenta periodo, kompreneble, ne mankis retroiroj kiel la eŭropaj faŝismoj de la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento kaj la dekstremaj diktaturoj en Latin-Ameriko en la dua duono de la sama jarcento. Estas altsignifa la fakto ke en tiuj kuntekstoj la Eklezio tre kunlaboris kun tiuj reakciaj reĝimoj. Kaj estas altsignifa ankaŭ la fakto ke la lasta el la t. n. “socialaj enciklikoj” estis la ***Centesimus Annus*** publikigita en la jaro 1991 memorante la unuan, la ***Rerun Novarum,*** kiu estis aperinte ĝuste antaŭ unu jarcento. De tiam, dum la lastaj du jardekoj kaj duono, tre malboniĝis la situacio de la malaltaj klasoj de la socio, malaperis multaj socialaj rajtoj (pri saneco, klerigado, fiksa laboro…) kaj pligrandiĝis la ekonomiaj diferencoj inter la riĉuloj kaj malriĉuloj. La longa regado de Johano-Paŭlo la 2-a koincidis kun la epoko de la nov-liberalismo kies ĉefaj politikaj referencoj estis la usona prezidento Reagan kaj la brita ĉefministrino Thatcher. Al la politiko de tiu gesinjoroj kontribuis la papo Wojtyła per sia ofensivo kontraŭ la Teologio pri Liberigo kaj kontraŭ la komunistaj reĝimoj.
Sed la ĉefa ofensivo de la pola papo estis kontraŭ la internaj grupoj de la Eklezio kiuj daŭre persistis en progresistaj pozicioj pri teologiaj kaj religiaj aferoj. Estas konate ke li estis tre rigora kun Pedro Arrupe, la Generalo de la jezuita kompanio, kaj la teologoj Hans Küng, Bernhard Häring, Leonardo Boff kaj aliaj pro ĉi ties reformistaj pozicioj rilate al pridogma kaj morala teologio kaj opozicio al la papeca instru-aŭtoritato. Krome tiu papo sin oponis al tio ke povu ricevis komunion la divorcint(in)oj kiuj denove edz(in)iĝis. Li kontraŭis ankaŭ la edziĝon de la ekspastroj kaj la ordinadon de la virinoj. Lia reakcia doktrino estis kompilita en la nova kateĥismo publikigita en la jaro 1992, kiu havas pli grandan rilaton kun la **Kodo de Kanonika Juro** ol kun la Evangelio de Jesuo de Nazaret.
Ĉar la papoj povas decidi en la nomumo de la episkopoj de la tuta mondo, ili elektadis por tiuj postenoj, dum la postkoncilia periodo, homojn fidelajn al la kontraŭkoncilia sento de la pontifikoj de Romo. Tiuj homoj aplikadas, en la respektivaj diocezoj, la reakcian politikon inspiritan de la vatikana povo. Tion sufiĉe perceptis kaj suferis la gekatolikoj de la progresistaj rondoj kaj grupoj kiaj “Kristanoj de Bazo” k. s. Ankaŭ sur la ensemblo de la katolikaro efikas la instrukcioj venintaj el Romo; post la Koncilio kaj laŭ ĉi ties vidpunkto pri la sakramentoj disvastiĝis, en multaj parokoj, la kutimo celebri la pentosakramenton kolektive, ne laŭ la tradicia maniero de persona konfesado; nu, laŭ premoj kaj ordonoj el Romo la episkopoj devis meti barojn kaj eĉ formale malpermesi tiutipan praktikadon.
Rezulte de tiu reakcia politiko kreskis malkontento inter ampleksaj sektoroj de la eklezia membraro; iom-post-iom malgrandiĝas la nombro da ĉeestantoj en la katolika kulto. Temante pri tiuj kultaj ceremonioj ni devas paroli pri “ĉeestantoj” kaj ne pri “partoprenantoj” ĉar en tiu liturgio estas unu sola partoprenanto: la celebranto. La pastro estas la sola kiu intervenas en la eŭkaristia konsekrado, nur li parolas en la homilio, li recitas plejparton el la ceremoniaj preĝoj. Al la ĉeestantaro oni asignas la rolon nur aŭdi kaj aŭskulti, kaj deklami “amen” kvar- aŭ kvinfoje dum la daŭro de la ceremonio. Pli kaj pli da personoj vidas neniun sencon ĉeesti tiajn solenaĵojn.
La pap-regado de Benedikto la 16-a estis pludaŭro de la politiko de lia antaŭinto. Tiu homo estis tipa produkto de la eklezia sistemo en kiu li formiĝis. Dum la Koncilio li apartenis al la aro da progresistaj teologoj kiuj antaŭenpuŝis la reformojn, sed lia teniĝo draste ŝanĝiĝis ekde la revolucio de Majo-1968. De tiam, kiel teologo, kiel episkopo, kardinalo kaj prefekto de la Kongregacio pri la Fido (nuntempa Inkvizicio) li kunlaboris en la reakcia regado de Wojtyła kaj helpis ĉi tiun en la subpremado de la Teologio pri Liberigo. Lia elektado kiel papo generis malkontenton en ampleksaj sektoroj de la katolikaro pro lia nov-konservema teniĝo. Oni identigis lin kun la reveno al la plej fiaj aspektoj de la organizado kaj doktrino de la antaŭkoncilia Eklezio. Estis altsignife ke dum la regado de la papo Ratzinger oni kanonizis en Hispanio amason da novaj sanktuloj kiuj estis, ĉiuj ili, mortigitaj dum la hispana civil-milito, viktimoj de la reprezalioj de la respublikanoj pro la publika apogo de la hispana episkoparo al la faŝismaj ribelintoj. Nu, tiaspecaj kanonizoj daŭre okazas nuntempe en Hispanio dum la pap-regado de Francisko la Unua kiam ankoraŭ, en ĉi tiu lando, oni ne agnoskas oficiale la masakradon de multaj ruĝuloj sub la povo de la diktatoro Franko.
Tiu papo Francisko regas la Eklezion de antaŭ malmultaj monatoj; en monato februaro de ĉi tiu jaro, 2013, Benedikto la 16-a abdikis el sia pontifika posteno. Malmultfoje en la historio de la Eklezio okazis tio ke iu papo rezignis sian altan seĝon, kaj la antaŭa el tiaj eventoj estis okazinte jam antaŭ kelkaj jarcentoj. Kompreneble, ĉiam, kiam tio okazis, la afero estis ligita al iutipa krizo aŭ problemaro. Foje la problemo estis de la eklezia institucio, sed plej ofte temis pri afero ne rilate al la Eklezio sed nur al la per-

sono de la papo kaj ĉi ties maniero demarŝi la gvidadon de la institucio. En la nuna kazo ŝajnas ke estis iom el ĉio-ĉi. Ĉefe, estis du problemoj kiuj maldolĉigis la pap-regadon de Ratzingero kaj pretersuperis ĉi-ties forton kaj kapablon.

La unua el tiuj aferoj estis la publika ekscio pri multaj kazoj de pederastio fare de sacerdotoj kaj aliaj religiuloj. Verdire, la ekzistado de tiaj faroj ne estis novaĵo en la Eklezio, samkiel ĝi ne estas novaĵo ankaŭ en aliaj institucioj kaj sociaj medioj. Sed okazis ke la Romkatolika Eklezio, subgvide de ĝia hierarkio, ĉiam klopodis kaŝi tiajn okazaĵojn por konservi la prestiĝon de la institucio. Foje oni eĉ efektivigis premon sur la viktimoj de tiuj ekscesoj por ke ili ne faru leĝan denuncon. Pli malpli efike, la afero funkciis dumtempe, sed subite granda skandalo eksplodis mondskale. En kelkaj landoj aperis publikaj denuncoj kaj informoj pri pederastiaj kazoj fare de katolikaj religiuloj, kaj tio provokis ke sekve oni publikigis multajn aliajn similajn farojn okazintajn en multaj lokoj dum la lastaj jardekoj. Pli grave estis tio ke, kiam oni entreprenis leĝajn esplorojn pri la afero oni malkovris ke la sekretigo de tiuj kazoj estis realigataj laŭ ekspresaj ordonoj de la eklezia altranguloj: la episkopoj kaj eĉ la papoj mem, inter ili la tiama papo Benedikto la 16-a. Tio estas, la silento estis normo kaj regulo de la institucio, kiu, ĝi mem, punis la okazintajn en sia sino seksperfortojn, sed foje eĉ oni kaŝis la aferon por ne apliki punon. Kompreneble, la publika skandalo estis enorma kaj la afero generis grandan informo-fluon pri ĝi en la tuta mondo dum plue oni eksciis pri novaj kazoj, nuntempaj kaj antikvaj. La papo devis alfronti tiun situacion ĉiel ajn. Li publike petis pardonon pro la ĝistiama teniĝo de la Eklezio pri ĉi tiu temo kaj promesis pli severe puni kaj denunci tiutipajn estontajn kazojn.


Eĉ se tiu promeso kaj intenco estis sinceraj, ni vidas ke per ili oni intencas solvi ne la problemon en ĉi ties radiko sed nur ĉi-ties simptomojn aŭ eksterajn aspektojn. Ja, la ĉefa kaŭzo de tiutipaj kaj aliaj seks-aferoj de la pastroj ne estis tuŝita. Ni temas pri la eklezia devigo de la fraŭleco de la religiuloj. Estas problemo kiun la Katolika Eklezio trenas de antaŭ pli ol jarmilo. Aliaj kristanaj eklezioj, kiel la Ordoksa, Luterana, Anglikana… ne altrudas tiun kontraŭnaturan devigon al siaj respektivaj pastraroj. La sekseco estas intima kaj esenca homa neceso kiun oni ne povas subpremadi senkoste. La Dua Vatikana Koncilio intencis revizii ĉi tiun eklezian normon de la deviga fraŭleco de la klerikoj sed la papo Paŭlo la 6-a, uzante sian kanonikan rajton limigi la koncilian temaron, demetis ĉi tiun aferon el la diskutado de la Asembleo kaj disponis ke la fraŭlec-devigo en la Eklezio restu same kiel ĝi estis dum multaj jarcentoj. Defendante la malpermesigon de la fraŭleco de la religiuloj, li asertis ke la fraŭleco estas altvalora karismo kiun indas konservi. Verdire, la seksumeco de la pastroj de aliaj kristanaj eklezioj kaj tiu de la judaj rabenoj kaj alireligiaj ranguloj ne igas ilin malpli prestiĝaj kaj karismaj, antaŭ siaj respektivaj samreligianoj, ol la katolikaj pastroj antaŭ la sia. La vera kialo de la fraŭleco de la katolika pastraro estas la celo provizi al la Eklezio malaltekostajn funkciulojn, sen familiaj devoj. Ĉi tiu estas alia el la internaj problemoj kiujn la Rom-Katolika Eklezio ne kapablas alfronti de antaŭlonge.

La dua afero kiu komplikis la pap-regadon de Ratzingero estis la prifinancaj aferoj de la Vatikano. Jam dum la epoko de lia antaŭinto, la papo Wojtila, eksplodis skandaloj pro kontraŭleĝa agado de la prifinancaj responsuloj de la Vatikano. Tiaj aferoj fariĝis pli gravaj kaj oftaj dum la lastaj jaroj, kaj spite al la sekretemo en la vatikanaj aferoj oni publike eksciis pri granda malakordo ene de la pov-strukturo de la Eklezio. Iu sekretario de la papo estis arestita kaj juĝita subakuze de spionado al la pontifiko favore al oni ne scias kiu(j) aŭ kio. Antaŭ kaj post la demisio de la papo Benedikto estis ŝanĝoj en la responsularo de la ekonomiaj aferoj de la vatikana ŝtato. Sed ŝajnas ke en la kerno de tiu problemaro estas malakordo inter la papo kaj la vatikana kurio. Paradokse, la rolo de la kurio estas helpi kaj servi la papon, kaj el ĉi tiu ĝi prenas sian rajton agadi, sed en la realo ĝi funkcias kiel aŭtonoma ento kiu povas agadi eĉ kontraŭ la pontifiko spite al ĉi ties laŭteorie absoluta povo en la Eklezio. Kiel dirite, la vatikana sekretismo malpermesas koni pli detale tiun internan konflikton, sed la abdiko de la papo Benedikto evidentigas ke li malvenkis en tiu interna batalo kontraŭ sia propra ministraro. En la daŭrigo de tiu batalo, la nova papo Francisko nomumis komisionon de ok kardinaloj fidelaj al li por reorganizi la kurion. Ĉi tiu ento evidentiĝis tre potenca fakta povo malfacile kontrolebla. Oni diras ke la nova papo survestas, sub sia religia kostumo, kugl-imunan veston, kaj ke li ne loĝas en la laŭkutima papa ĉambraro de la vatikana rezidejo sed en alia malpli danĝera loko, kaj ke ĉiutage li manĝas en malsama, neatendita loko. Eble tiuj sekurec-disponoj ne estas realaj, sed la fakto mem ke ili disvastiĝas montras ke la publiko konscias pri la graveco de la interfrontiĝo ene de la vatikana kaj eklezia pov-aparato.

Tiu kontraŭfrontiĝo estas problemo ne nur de la vatikana ŝtato sed ankaŭ de la eklezia institucio ĉar papo kaj kurio estas elementoj de la eklezia organizo kiuj influas en la regado de la institucio. Sed la singulareco de la nuntempa situacio en la Eklezio estas tio ke Francisko la 1-a havas reformistajn celojn –kies amplekson nun ne eblas pritaksi– kiuj koncernas al aliaj aspektoj de la eklezia realaĵo. Ĉu ni troviĝas antaŭ vera fino de la stagnado kiu jam daŭras duonjarcenton ekde la lasta Koncilio? Eble…, kaj dubinde. Eble, ĉar la estontecaj okazaĵoj estas skribitaj neniuloke. Kaj dubinde, ĉar la historio montras al ni la feblecon de la reformistaj kaj revoluciaj procezoj entreprenitaj desupre, sen la popola interveno. Kaj ĉio ĝis nun farita de la nova papo estas desupraj agoj kaj disponoj, sen la interveno nek eĉ la kompreno de la popolo kiu devas esti protagonisto kaj demarŝanto de sia propra destino.

Juan Antonio Estrada

# Iu eklezia reformo ankoraŭ ne finplenumita



Juan Antonio Estrada estas hispana filozofo, teologo, verkisto, instruisto kaj jezuito. Li estas aŭtoro de multaj prifilozofiaj kaj prireligiaj verkoj, inter ili ***Kiucele filozofio?, Dio en la filozofiaj tradicioj La neebla teodicieo. La krizo de la fido je Dio, Religiuloj en sekulara socio, La senco kaj sensenco de la vivo,*** kaj la eldonita ĉi-jare: ***De la savo al iu sensenca projekto. Por ia nuntempa kristologio***.
La artikolo, kies esperantan tradukon ni prezentas ĉi-tie estis publikigita, en la hispana lingvo, en kelkaj interretaj paĝoj. Ĝi estis verkita kiam ankoraŭ ne estis elektita la nova papo kiu estas vekanta esperon pri eblaj reformoj en la Eklezio. Tamen tiu teksto estas interesa tial ke ĝi trafe respegulas la postkoncilian problemaron de la Eklezio.

En oktobro de ĉi tiu jaro oni jubileos la kvindek-jaran datrevenon de la komenciĝo de la Dua Vatikana Koncilio. Ne mankos rememoroj kaj studoj analizante la plej gravan eventon de la Katolika Eklezio dum la 20-a jarcento. Tamen, sublume de la nuna situacio de la katolikismo, jam oni povas temi pri fiasko kaj iu historia ŝanco ne profitita.
La nuntempa situacio de la Eklezio tiel aŭ eĉ pli estas kriza kiel antaŭ 50 jarojn kaj la evangelizado celita de la Jubileo de la jaro 2000 postulas iun eklezian reformon kiu restis duon-plenumita. Jam oni parolas pri iu Tria Vatikana Koncilio kiam ankoraŭ ne estis realigita la programo de la Dua.
La Koncilio estis iu decido de la papo Johano la 23-a kiu vekis la kontraŭstaron de plejparto el la vatikana kurio. La Papo volis ke la Eklezio moderniĝu, tial la slogano "aggiornamento". La instituciaj strukturoj, la regad-formoj, la doktrinoj, la sakramentoj kaj la pastro-servado estis bezonantaj profundan renovigon.
La Koncilio ne timis paroli pri "reformo" (***la Eklezio, alvokita al konstanta reformo, kiun senĉese ĝi bezonas kiel homa institucio:*** UR 6), entreprenata de la Eklezio mem kaj ne kiel reago al la protestanta. Tiu reformo postulis tiun de la vatikana kurio kaj de la regado de la Eklezio. La Koncilio estis la unua sperto de tutmondiĝo de proksimume tri mil episkopoj kunvenantaj en Romo. La alvokoj ŝanĝi la centran strukturon de la Eklezio estis tre insistaj, kontraŭ la vatikana centralizismo, la magra aŭtonomeco de la lokaj eklezioj, la izoliĝo de ciu episkopo en siaj rektaj rilatoj kun la vatikanaj kongregacioj kaj la neceso adapti ilin al la 20-a jarcento.
Paŭlo la 6-a akceptis iujn petojn, li internaciigis la kurion malpliigante la influon de la italoj kaj eŭropanoj; metis limon al la aĝo de la episkopoj kaj la elektorajtaj kardinaloj; kaj establis episkopan sinodon regule kunvenanta kaj aŭtonoma rilate al la vatikana kurio. Sin oponis al ĉi tiuj iniciatoj iu grava sektoro de la vatikanaj kongregacioj, samkiel la koncilia malplimulto kiu fariĝis plimulto dum la papregado de Johano Paŭlo la 2-a. La proponoj de la Koncilio restis duonplenumitaj kaj fiaskis ĉar tiuj kiuj devus demarŝi ilin estis plejparto el tiuj kiuj kontraŭstaris la konciliajn iniciatojn.
Kvindek jarojn poste, persistas ankoraŭ la neceso je reformo de la kurio, de la kongregacioj kaj de la pap-registaro. Fiaskis la ege dezirita transformado de la strukturoj kaj regad-maniero, kaj akumuliĝis la skandaloj, la problemoj kaj la konfuzo de la katolikoj. Unue estis la skandalo de la pederastio: ne nur la miloj da malkovritaj kazoj, sed la konstanta silento kaj la protektado de la kaŭzantoj, domaĝe al la viktimoj. Nun la situacio komplikiĝas kaj oni publikigas leterojn kiuj temas pri koruptado kaj ekonomikaj trompoj, el kiuj estis aliaj okazaĵoj dum la lastaj jardekoj. Kaj aldoniĝas atakoj kontraŭ la ŝtat-Sekretario; anoncoj pri iu hipoteza plano por likvidi la papon, kio rememorigas Johano-Paŭlon la 2-an; tralikado de sekretaj dokumentoj far prelatoj; interfrontiĝoj kaj pov-bataloj. ***L'Osservatore Romano*** priskribis la papon kiel paŝtisto inter la lupoj.
Io odoras je putraĵo en la kupolo de la Eklezio. La povo koruptas la personojn en la institucioj, kaj la religiaj institucioj ne estas escepto. La reformo kiu estis necesa antaŭ 50 jarojn daŭre restas ne-farita kaj nun estas pli necesa ol ĉiam antaŭe. Eĉ la internaciigo ŝajnas bremsita kaj la ĵus okazinta kardinala konklavo estas rimarkeble eŭropa kaj itala (preskaŭ duono el la elektorajtaj kardinaloj apartenas al la vatikana kurio, kaj Afriko kaj Hispanameriko ne estas enkalkulitaj en ĝi). Demografie, la pezo de la katolikismo estas en Ameriko, sed estas la eŭropanoj tiuj kiuj prezidas la regadon de la Eklezio. Al tio aldoniĝas ke estas survoje iu procezo kiu celas minimumigi la Koncilion, maksimumigi la kontinuecon kun la Unua Vatikana Koncilio kaj silentigi ĉion kion signifis rompon kaj senkontinuecon. Ratzingero mem temis pri la Dua Vatikana Koncilio kvazaŭ ĝi estus iu kontraŭ-***Syllabus***, tio estas, kiel korekto de la kontraŭ-modernista direkto kiun havis la 19-a jarcento. Ĝuste ĉi tion rifuzis la plej konservemaj kaj kion oni impulsas hodiaŭ en iuj ekleziaj rondoj kiuj vidas la socion kvazaŭ ian minacon kaj sentas nostalgion je la modelo de Eklezio kaj de teologio antaŭe ekzistanta. Johano la 23-a nomis ilin "profetoj de misfortunoj", ĉar ili vidas nur erarojn kaj negativajn aferojn en la historia evoluado.
La fiasko evidentiĝas en tio ke la Dua Vatikana estas Koncilio ignorita de la junuloj kaj tre forgesita de la plenaĝuloj. Tamen, la reformo de la Eklezio, de la vatikana kurio kaj de la papa regad-maniero estas pli necesa ol ĉiam antaŭe, kiel jam avertis Paŭlo la 6-a, kiu serĉadis alian manieron praktiki la primason.
La postkoncilia involucio haltigis la reformistan dinamismon de tiu Asembleo kaj nun estas malfacile reimpulsi la renovigon. La stela figuro de la papo Johano-Paŭlo la 2-a kovris la problemojn kiuj akumuliĝis, sed la papoj pasas kaj la kurio restas.
La regado de la Eklezio bezonas instituciojn, sed tiuj nun ekzistantaj pli apartenas al la epoko de la papa monarkio ol al la 21-a jarcento.
La civila socio antaŭenmarŝis rapide dum la lastaj jardekoj, sed la Katolika Eklezio fariĝis senmova kaj alergia al la ŝanĝoj. Pli kaj pli fariĝas granda la distanco inter plejparto el la civitanaro kaj tiu kiu elstaras en la eklezia hierarkio.
La provoj de kolegieco, de plifortigo de la landaj episkoparaj konferencoj, de aliaj metodoj en la nomumo de episkopoj kaj promocii la laikojn en klerika eklezio ege fiaskis.
La problemo estas ke se la Eklezio ne renoviĝas profunde, povas aperi io pli malbona ol en la 16-a jarcento, la amasa dizertado de multaj katolikoj kiuj renkontas en la Eklezio pli baron ol helpon por sia kristana fido kaj sin-dediĉo.



Marc Vandepitte

# Jen kiamaniere Ratzinger detruis la popolan eklezion en Latin-Americo

Marc Vandepitte estas belga filozofo kaj ekonomikisto naskiĝinta en 1959, kaj studinta en la universitatoj de Gando kaj Lovajno, kie li studis ankaŭ teologion. Li estas aŭtoro de multenombraj libroj pri la inter-rilatoj Nordo-Sudo, Latin-Ameriko, Kubo kaj Ĉinio.

## La nov-konservativismo

En 1978, Karol Wojtila (papo Johano-Paŭlo la 2-a) estas elektita por lideri la religian komunumon pli multenombran en la mondo. Li troviĝas antaŭ postkoncilia eklezio en profunda krizo: meso-ĉeesto kaj pastro-alvokiĝo en stato de libera falo, grandnombro da eksedziĝoj inter gekatolikoj, rifuzo de la papa aŭtoritato pri la kontrolo de naskiĝ-kvanto; iu mondo plena je herezo.
Li volas radikalan ŝanĝon. Ne pluaj riskoj nek provoj, finiĝis la pripensado kaj la debatado. El la Koncilio eble oni konservos la tekstojn sed oni entombigas la rezonadon. La papo sin pretas por ia centralizita kaj ortodoksa eklezia politiko, kune kun ia spirita kaj morala rearmado.
Por tion atingi, li lerte profitas la etoson de la epoko, kiu tre similas al la nuntempa. Meze de la sepdekaj jaroj komenciĝas profunda ekonomia krizo. La optimisma spirita etoso de la sesdekaj jaroj oscilas kaj karakteriziĝas per aspiro al sekureco kaj protekto, emo je iu aŭtoritato –prefere karisma–, iu etika vekiĝo, la fuĝo al privata kaj ne-racia medio, ktp.
Estas sur ĉi tiu fono kie disvolviĝas la "konservativismo". Tiu-ĉi nova konservativismo jam ne plu limiĝas al la defensivo, sed sin ĵetas al iu politika kaj ideologia ofensivo. Ĉi tiu fluo estas apogata de fortaj personuloj, kiaj Ronald Reagan kaj Margaret Thatcher. Lerte uzante la amas-komunikilojn, interpretante ian tutmondan tendencon akcepti ian Savanton, prezentante tro-simpligan mondo-rigardon, disradiante memfidon kaj optimismon, ktp.

## La rotvejl-hundo de Dio

La ĉefa kap-doloro por la papo estas la avanco de iu progresista popola eklezio en Latin-Ameriko. Wojtila estas polo kaj ĝisosta kontraŭkomunisto; iu el la celoj de sia vivo estas energie kontraŭbatali la marksismon kaj la komunismon en la mondo. Tial ke la influo de la marksismo en la baz-eklezio kaj en la teologio pri liberigo estas evidenta, li tute obstine intencas restarigi la ordon en la kontinento.
Por tion fari, li kalkulas je Ratzinger kiu estas nomumita en 1981 Prefekto de la Kongregacio de la Doktrino de la Fido, t. e. kvazaŭ la Ministrejo de la ideologio kaj de la informado de la Vatikano. Li praktikas tiun taskon dum jarcent-kvarono kaj sukcesas stampi sian markon sur la tutmondaj aferoj.
Ratzinger fariĝas la arkitekto de iu ampleksa paŝtista kaj eklezia ofensivo kiun li nomas "Restarigo". La celo estas plifortigi la centran gvid-aparaton kaj dismembrigi ĉiun formon de disidentado ene de la Eklezio. Ratzinger baldaŭ pruvas esti iu vera kaj granda inkvizitoro, kio igas lin gajni la titolon je "rotvejl-hundo de Dio".
La tuta Katolika Eklezio troviĝas sub lia cel-kontrolo sed la sagoj ĉefe estas adresitaj al Latin-Ameriko; estas tie kie la politika kolizio estas pli granda. Tial ni dediĉos al ĉi tiu kontinento la atenton en ĉi-artikolo.

## La detruado de la popola eklezio kaj la teologio pri liberigo

La unua paŝo estas la kreado de daten-bazo de la episkoparaj konferencoj, la teologoj de la liberigo, la progresistaj religiuloj, la suspektindaj episkopaj projektoj ktp. En preskaŭ ĉiuj diocezoj oni nomumas episkopojn kaj kardinalojn ultrakonservativajn kaj klare dekstremajn. Nur en Brazilo oni nomumas kvindekon da konservativaj episkopoj. Fine de la okdekaj jaroj, kvin el la 51 perua episkopoj estas membroj de ***Opus Dei***. Ĉilio kaj Kolombio sekvas saman vojon. Los disidentaj episkopoj suferas premojn, iuj ricevas averto-leterojn; al aliaj oni malpermesas vojaĝi aŭ estas alvokataj por raporti pri siaj agoj.
Ĉi tiu politiko de nomumado estas eĉ pli grava ĉar la episkoparo ludas gravan rolon en tiu kontinento. En multaj kazoj ĝi estas la sola ebla opozicio kontraŭ la militista subpremado, torturo, ktp. Se la episkopoj de Brazilo kaj Ĉilio estus silente, kiel fakte faris tiuj de Argentino, la nombro da viktimoj de la subpremado povintus esti multe pli granda.
Ankaŭ en la malsupraj niveloj oni praktikas elpurigadon. Oni denove laboras en la edukado de sacerdotoj premante sur seminarioj kaj institutoj de teologio, reorientante aŭ fermante ilin. Oni intencas pli bone kontroli la religiulojn kiuj ofte estas protagonistoj de la eklezio de la liberigo. Oni speciale atentas pri la teologoj. De tiam oni limigas ilin devigante ilin fari la novan ĵuron de fideleco.
En 1984 Ratzinger redaktas la «Instrukcio de la Sakrala Kongregacio por la Doktrino de la Fido pri iuj aspektoj de la 'Teologio pri liberigo'» per kiu li fronte atakas la teologojn de la liberigo, ĉefe tiujn de Latin-Ameriko. Unu jaron poste, li malpermesas al Leonardo Boff, iu el la plej elstaraj figuroj de ĉi tiu movado, esprimi sin. Oni intensigas la kontrolon sur la katolikaj ĵurnaloj, ĉie kie oni taksus necese, oni cenzuradas ilin, oni anstataŭigas ties redakcian konsilion aŭ oni metas ĝin sub financan premon.
La progresistaj episkopaj instru-projektoj estas metitaj sub kontrolon aŭ eĉ oni metas finon al ili. Konsiderita tro progresista, en 1989 la Internacia Asocio de la katolika junularo, ĝi ĉesas esti agnokskita de la Vatikano kaj devas cedi sian lokon al la kontraŭ-maldekstrema kaj konfesia CIJOC.
Kune kun la detruado de ĉio kio estas progresista, oni entreprenas ambiciajn projektojn kies celo estas meti la fidelulojn sur la bonan vojon. Evangelizado 2000 kaj ***Lumen*** 2000 estas grandskalaj projektoj destinitaj al Latin-Ameriko, al kiuj oni disponigas

almenaŭ tri satelitojn. Tiuj projektoj estas preparataj de personoj kaj grupoj de ultrakonservativa dekstrularo: ***Comunione e Liberazione***, Mario-Agado, Karisma Katolika Renovigo, ktp. La kunlaborantoj de tiuj potencaj amasmedioj komparas lian agadon kun io kvazaŭ nova «lum-potenco».
Tiuj kiu scipovas legi estas inunditaj de religiaj libroj je malmultekosta eldonado. Oni demarŝas iujn emeritigojn por la sacerdotoj kaj la religiulinoj. Por ĉi tiuj projektoj la eklezia kupolo disponas je la financa apogo de la mastrara mondo.

## Kontraŭ-komunista kruc-milito

Estis neglektita nenio. Unu post alia, ĉiuj kolonoj de la popola eklezio de Latin-Ameriko estis eliminitaj. La kompetentuloj priskribas tion kiel la detruado de unu eklezio. Temas pri iu el la plej gravaj ideologiaj kaj politikaj kampanjoj de la postmilito.
Ĉi tiu kampanjo kongruas kun la kontraŭ-komunista kruc-milito de la Malvarma Milito. Ĝi povas ankaŭ esti interpretata kiel usona venĝo pro la perdo je povo dum la antaŭaj jaroj.
Dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj la landoj de la Tria Mondo plifortigis siajn poziciojn en la tut-monda merkato. Ili altrudis pli altan koston de la krud-materialoj plialtigante tiamaniere sian aĉet-kapablon en la tut-monda merkato. La kulmina punkto estis la krizo de la nafto de 1973. En 1975 Vjetnamio atingas kompletan venkon sur Usono. Post ne multe da tempo la Blanka Domo estis dufoje humiligita, unue pro la revolucio de la sandinistoj en la usona dom-korto (1979), kaj poste pro la dramo de la ostaĝoj en Irano (1980). Alveninte Reagan al la prezidanteco li sin sentis krome minacita pro la teniĝo de ekonomia sen-dependeco de statoj tiel gravaj kiel Meksiko kaj Brazilo.
La Blanka Domo ne kapitulacis kaj disvolvigis kontraŭofensivon en diversaj frontoj. La teologio de liberigo estis unu el la plej gravaj celoj. Fine de 1960 la teologio pri liberigo, ankoraŭ en embria stato, estis konsiderata kiel minaco por la geostrategiaj interesoj de Usono, kiel montras la informo Rockefeller.
En la sepdekaj jaroj oni kreis teologiajn centrojn kiuj devus entrepreni la batalon kontraŭ la teologio pri liberigo. Sed estis ĉefe ekde la okdekaj jaroj kiam tiu kontraŭofensivo atingis sian plej altan pinton. Usono pagis milojn da milionoj da dolaroj por apogi la kontraŭrevolucion en Latin-Ameriko. Ĉi tiu malpura milito okazigis dek-milojn da viktimoj. Mort-eskadronoj, kvazaŭarmeanoj, kaj ankaŭ la laŭregula armeo faris la malpuran laboron. En la vicoj de la kristanaj movadoj de liberigo falis multaj martiroj. La plej konataj estas Monsinjoro Romero kaj la ses jezuitoj de Salvadoro. Por batali kontraŭ la teologio de liberigo en ĉi-ties propra tereno, oni enkondukis protestantajn sektojn kiuj ricevadis amasan financan apogon de Usono. Pere de altiraj sloganoj kaj sentimentalaj mesaĝoj la menciitaj sektoj devis intenci altiri la kredantojn. Por apartigi ilin el la danĝera influo de la teologio pri liberigo, oni uzis altekostajn elektronikajn rimedojn. La religio aperis ĉi tie kiel popola opio en ĉi ties plej pura formo. Ankaŭ la armeo estis mobilizata en ĉi tiu religia milito. La altgradaj oficiroj de la latinamerikaj armitaj fortoj redaktis dokumenton por doni konsiston al la "teologia brako" de la armitaj fortoj.

## Plenumita misio

La kombinataj klopodoj de Ratzinger kaj la Blanka Domo donis ĝiajn fruktojn. En la naŭdekaj jaroj oni donis egan baton al la eklezio de bazo en Latin-Ameriko. Multenombraj bazaj grupoj ĉesis ekzisti aŭ malfacile funkcias pro manko de episkopa apogo, pro timo al la persekutado pro tio ke ili jam ne plu fidas pri la esperita progresado, aŭ simple ĉar ili estis fizike eliminitaj. La optimismo kaj la aktivismo de la jaroj 1979 kaj 1980 cedis lokon al la dubo kaj la pripenso. La analizo de la socio perdis terenon antaŭ la kulturo, la etiko kaj spiritualismo, tutfavorante la planojn de Ratzinger.
Ĝenerale la gravito-centro pasas de la liberigo al la devoteco, de la opozicio al la konsolo, de la analizo al la utopio, de la ribelo al la supervivado. La raporto de la Eliro cedas pason al la Apokalipso kaj la Apostoloj.
Je la fino de la jarcento la eklezio de bazo jam ne plu estas minaco por la sistemo. Tiel por la Vatikano kiel por la Pentagono kaj por la lokaj elitoj de Latin-Ameriko, provizore, malaperas unu el iliaj problemoj. Tiu milit-paŭzo baldaŭ ĉesas pro la elektado de Chávez por la prezidenteco de Venezuelo, sed ĉi tio estas alia historio.
En 2005 Ratzinger estas rekompencita pro sia sukcesa laboro de restarigo kaj elektita kapo de la Katolika Eklezio. Sed li estas malpli brila kiel gvidanto ol kiel inkvisitoro. Resume, li estas nekompetenta papo. Li lasas iun institucion malfortigitan, minacata pro la malabundo de sacerdotoj, pro la perdo de fideluloj en Okcidento kaj pro la senĉesaj skandaloj. Li ne sukcesis meti ordon en la aferoj de la Vatikano, eble ĉi tiu estas iu el la kialoj de lia abdiko.
Ratzinger restos en la historio ĉefe kiel la ulo kiu efektivigis la restarigon de la Katolika Eklezio kaj neŭtraligis la eklezion de la popolo en Latin-Ameriko. Estas sufiĉe rimarkindaj meritoj.



La kombinataj klopodoj de Ratzinger kaj la Blanka Domo donis ĝiajn fruktojn… Usono pagis milojn da milionoj da dolaroj por apogi la kontraŭrevolucion en Latin-Ameriko. Ĉi tiu malpura milito okazigis dek-milojn da viktimoj. Mort-eskadronoj, kavzaŭarmeanoj, kaj ankaŭ la laŭregula armeo faris la malpuran laboron. En la vicoj de la kristanaj movadoj de liberigo falis multaj martiroj. La plej konataj estas Monsinjoro Romero kaj la ses jezuitoj de Salvadoro.

# Lasta intervjuo al la kardinalo Martini




***Carlo Maria MARTINI**, itala episkopo kaj kardinalo. Aŭtoro de multaj teologiaj verkoj. En la konklavo en kiu estis elektita papo Ratzinger, Martini estis iu el la plej verŝajnaj kandidatoj. Li forpasis la 31-an de aŭgusto de 2012. El la lasta intervjuo kiun oni faris al li, ni prezentas ĉi tiu tiun parton kiu plej rilatas al la afero pri kiu temas ĉi tiu numero de nia revuo.*

**Kiel vi vidas la situacion de la Eklezio?**
«La Eklezio estas laca, en la komforta Eŭropo kaj en Ameriko. Nia kulturo estas maljuniĝinta, niaj temploj estas grandaj, niaj religiaj domoj estas malplenaj kaj la burokratara aparato de la Eklezio ŝveliĝas, niaj ritoj kaj niaj vestaĵoj estas tro pompaj. Tamen, ĉu ĉi tiuj aferoj esprimas tion kion ni estas nuntempe? (…) La komforto pezas. Ni estas kiel la juna riĉulo kiu triste apartiĝis kiam Jesuo alvokis lin por ke li fariĝu sia disĉiplo. Mi bone scias ke ni ne povas facile lasi ĉion. Almenaŭ ni povus serĉi homojn kiuj estu liberaj kaj sin tenu frateceme kun la proksimuloj, samkiel estis la episkopo Romero kaj la jezuitaj martiroj de Salvadoro. Kie troviĝas, inter ni, la herooj kiuj inspirus nin? Ni devas nenial limigi ilin per la ligiloj de la institucio».

**Kiu povas helpi hodiaŭ la Eklezion?**
«Karl Rahner uzis la ekzemplon de la braĝoj kaŝitaj sub la cindro. Ĉar mi vidas en la nuntempa Eklezio tiom da cindro sur la braĝoj, ofte venas al mi senton de febleco. Kiamaniere liberigi la braĝojn el la cindro cele revivigi la flamon de la amo? Unue ni devas serĉi ĉi tiujn braĝojn. Kie estas la personoj plenaj je sindonemo kiel la bona samariano? Tiuj kiuj havas fidon kiel la romia centestro? Tiuj kiuj estas fidelaj kiel Maria Magdalena? Mi konsilas al la papo kaj al la episkopoj serĉi dekdu personojn ekster la kutimaj normoj por la reg-postenoj. Viroj kaj virinoj kiuj troviĝus proksimaj al la malriĉuloj kaj kiuj estu ĉirkaŭataj de gejunuloj kaj kiuj eksperimentus novajn provojn. Ni bezonas alfrontiĝi kun ardaj viroj kaj virinoj tiamaniere ke la spirito povu disvastiĝi ĉien».

**Kiujn ilojn konsilas vi kontraŭ la laceco de la Eklezio?**
«Tiucele mi konsilas tri tre efikajn ilojn. La unua estas la konvertiĝo: la Eklezio devas agnoski siajn proprajn erarojn kaj trairi vojon de radikala ŝanĝo, komencante per la papo kaj la episkopoj. La skandaloj de la pedofilio impulsas nin entrepreni la vojon de la konvertiĝo. La demandoj pri la sekseco kaj pri ĉiuj temoj rilate al la korpo estas nur unu el la ekzemploj pri tio. Ili estas temoj gravaj por ĉiuj kaj foje ili eble estas ankaŭ tro gravaj. Ni devas demandi al ni ĉu la personoj ankoraŭ aŭskultas la konsilojn de la Eklezio pri seksaferoj. Ĉu la Eklezio ankoraŭ estas iu aŭtoritato pri tiu temo aŭ nur karikaturo en la medioj?
La dua ilo estas la Dia Vorto. La Dua Vatikana Koncilio redonis la Biblion a la katolikoj. (… ) Nur tiuj kiuj sentas siakore ĉi tiun Vorton povas troviĝi inter la helpantoj de la revigliĝo de la Eklezio kaj scios respondi la personajn demandojn per ĝusta elektado. La Dia Vorto estas simpla kaj ĝi serĉas kiel kunulon iun koron aŭskulteman. (…) Nek la klerikaro nek la eklezia Rajto povas anstataŭi la homan internecon. Ĉiuj eksteraj leĝoj, la leĝoj, la dogmoj, estis donitaj al ni por klarigi la internan voĉon kaj por la spirita kriterio.
Por kiuj estas la sakramentoj? Ĉi tiuj estas la tria ilo de rekuperiĝo. La sakramentoj ne estas ilo por la disciplino, sed helpo por la homoj en la vojirado kaj en la malfacilaĵoj de la vivo. Ĉu ni alportas la sakramentojn al la homoj kiuj bezonas novan forton? Mi pensas pri ĉiuj personoj eksedziĝintaj kaj ligitaj en novaj geparoj, pri la krom-familioj. Ĉi tiuj bezonas specialan protekton. La Eklezio defendas la nedissolveblon de la geedzeco. Ĉi tio estas iu graco kiam iu geparo kaj iu familio ĝin atingas (…).
La teniĝo kiun ni havos rilate al la krom-familioj determinos la alproksimiĝon al la Eklezio de unu generacio de la gefiloj. Iu virino estis forlasita de la edzo kaj trovis novan kunulon kiu okupiĝas pri ŝi kaj ŝiaj tri gefiloj. La dua amo sukcesas. Se ĉi tiu familio estas diskriminaciata, oni forigas el la Eklezio ne nur la patrinon sed ankaŭ la gefilojn. Se la gepatroj sin sentas for de la Eklezio aŭ ne sentas ĉi ties apogon, la Eklezio perdos la estontan generacion. Antaŭ la komuniiĝo ni diras: "Sinjoro mi ne estas inda…". Ni scias ke ni ne estas indaj (…). La amo estas graco. La amo estas donaco. La demando ĉu la eksedziĝintoj povas komuniiĝi devus esti formulita inverse: Kiamaniere povas la Eklezia alporti la forton de la sakramentoj al tiuj kiuj troviĝas en komplikaj familiaj situacioj?».




# Hans Küng kaj sia ampleksa teologia verkaro

**Hans KÜNG**, naskita la 19-an de marto 1928 en Sursee, kantono Lucerno, Svislando, estas katolika teologo kaj verkisto. De 1948 ĝis 1957 li studis filozofion kaj teologion en Romo, kie li doktoriĝis. Li estis profesoro pri katolika teologio en Tübingen.

En 1962 la papo Johano la 23-a oficiale nomumis lin konsil-fakulon de la Dua Vatikana Koncilio. En tiu tasko li ege kunlaboris kun Joseph Ratzinger kiu, en tiu epoko, enviciĝis en tre progresista teologio. Poste la pozicioj de ambaŭ teologoj diverĝis. Depost 1968 Ratzinger fariĝis konservema dum Küng verkadis teologiajn librojn pli kaj pli malakordajn kun la oficiala teniĝo de la Vatikano kies distanciĝo de la spirito de la Koncilio fariĝis evidenta. En sia libro ***Unfehlbar*** (Ĉu neerarebla?), de 1970, li pridubis la neerareblon de la papo. Rezulte de tiu ĉi libro la germana episkoparo anoncis la 18an de decembro 1979, ke lia eklezia instrurajto estos forprenata. Malgraŭ la perdo de la instrurajto li restis profesoro en la Universitato de Tübingen, kie li gvidis la Instituton pri Ekumenaj Esploroj, ĝis kiam en 1996 li emeritiĝis. Li daŭre estas romkatolika pastro. Ekde 1995 li prezidas la ***Stiftung Weltethos*** (Fondaĵo por Tutmonda Etiko).

La Kongregacio por la Doktrino de la Fido kunvokis lin en 1975 por respondi pri liaj opinioj sed li ne prezentiĝis. Per siaj libroj kaj artikoloj li tre kritikadis la Vatikanon kaj ĉefe la regadon de la papo Johano-Paŭlo la 2-a. En la jaro 2005 akceptis lin la papo Benedikto la 16-a –lia antikva kunulo Ratzinger– kaj estis amikeca dialogo inter ili, kiel estis agnoskite de ambaŭ. La vatikana inform-servo oficiale publikigis la renkontiĝon. En la komunikaĵo oni asertas ke en la renkontiĝo oni ne pritraktis la diskutitajn temojn de dogma teologio.

Küng estas aŭtoro de tre vasta verkaro, ĉefe pri teologiaj aferoj sed ankaŭ dediĉita al la stimulado de ia nova tutmonda etiko kiu ebligu la kunvivadon de la diversaj religioj. Liaj libroj estis tradukitaj al multaj lingvoj kaj iuj el ili estis plurfoje eldonitaj. La libro **Ĉu neerarebla?**, ja, ne estis lia unua teologia verko, sed ĝi signis la faktan rompiĝon de la teologiaj pozicioj de la aŭtoro kun la oficiala teniĝo de la katolika hierarkio kiu estis reagante kontraŭ la eklezia evoluo generita de la Koncilio: emo al sekulariĝo de ampleksa sektoro el la pastraro, apero de la Teologio pri Liberigo… Per tiu libro Küng pridubas la koncepton de neeraripovo kiun la katolika teologio atribuas al la Pontifiko de Romo. La verko startas de la prikonsidero de la senerareco de la ordinara instru-funkcio de la Eklezio, por analizi la formuladon de la seneraripovo de la papo, t. e. la eksterordinara instru-funkcio, kaj de la koncilioj, ankaŭ ili apartenantaj al la eklezia eksterordinara instruado kaj kelkaj el ili okazintaj eĉ sen la papa interveno. El sia analizo Küng konkludas ke la senerareco, interpretita kiel seneraraj propozicioj, estas sensenca kaj ke estas prefere interpreti la aferon kiel esenca situiĝo de la Eklezio sur la vojo de la Vero spite al la historiaj eraroj. Kiel antaŭe menciite, la Kongregacio por la Doktrino de la Fido (kiu tiam ankoraŭ ne estis prezidita de Ratzinger) kunvokis la aŭtoron de la libro por kunfronti ĉi ties doktrinon kun la dogma pozicio de la Eklezio. Tial ke Hans Küng –male ol aliaj procesatoj de tiu tribunalo, kiel Leonardo Boff– ne prezentiĝis al la juĝ-esploro kaj eĉ ne respondis al la inkvizitoroj, tiu Kongregacio diktis kaj dissendis sentencon per kiu oni kondamnis du teologiajn "erarojn" (laŭ la kriterio de tiu tribunalo) formulitajn en lia verko. La unua kondamnita propozicio de la libro estis tiu afero de la papa senerarebleco. Laŭ la doktrino de la Eklezio tiu koncepto estas dogma, t. e. deviga kredero, ekde la Unua Vatikana Koncilio (1869-1870). Oni devas klarigi ke la aprobo de tiu dogmo far la menciita koncilio estis trudita al multaj konciliaj episkopoj kiuj ne estis pretaj konsenti pri la afero. De tiam multaj katolikoj, eĉ altrangaj hierarkiuloj, akceptas tion nur formale, por sin teni ene de la eklezia komunumo, sed en sia interno ili tute ne kredas tiun dogmon. Tio kion faris Hans Küng, per tiu teologia verko, estis nur esprimi publike tion kion multaj katolikoj el ĉiuj rangoj opinias pri la afero.

La dua kondamnita "eraro" de la libro de Küng estis lia aserto ke, <u>se necese</u>, iu baptita homo, ne ordinita pastro, povas fari eŭkaristian konsekradon. Ankaŭ pri tio la Eklezio havas dogman pozicion, kaj same kiel pri la antaŭa temo, la pozicio de la eklezia hierarkio estas plifortigi kaj emfazi la gravecon kaj la rolon de la hierarkio mem. Tiuj doktoroj asertas ke tiel la instruo-povo de la hierarkio kiel la sacerdoteco de la klerikaro estas aferoj instituitaj de Jesuo-Kristo. Sufiĉas tralegi la Evangelion por kompreni ke ĉi tiuj assertoj ne veras. Pri la rangoj inter la sekvantoj de Jesuo ĉi tiu diris nur ke plej altrangas tiuj kiuj plej servas la ceterajn; li certigas nenian senerarecon al iu ajn. Cetere estas historie konate ke kelkaj papoj kaj kelkaj koncilioj donis instruon kiu poste estis deklarita erara far aliaj papoj kaj aliaj koncilioj. Kaj rilate al la pastraro, Jesuo kreis neniun sacerdotecon. Kiam li instituis la eŭkaristion li petis nur ke liaj sekvantoj faru tion multfoje je lia memoro. Tiun peton li faris al la samaj personoj kiuj estis komuniiĝante, do tiuj personoj estis reprezentantoj de ĉiuj komuniiĝontaj gekristanoj, ne nur de la pastroj. La pastreco aŭ sacerdoteco neniam estis en la menso de Jesuo. La verko de Küng ne esprimas ĉi tiun ideon tiel radikale kiel ĝi estas prezentata ĉi tie. Li nur kontemplas la eblecon de anstataŭo de la pastro <u>se necese</u>. Tamen li estis kongrua kun tiu penso rifuzante respondi antaŭ la eklezia tribunalo. Submetiĝi al la normoj de tiu inkvizicia aparato signifus agnoski la rajton de la institucia hierarkio sin trudi tiamaniere sur la kristana popolo, kaj ĝuste ĉi tion li volis kontraŭbatali per sia verko.

Aliaj gravaj libroj de tiu teologo, publikigitaj dum la lasta jaroj, estas:

- ***Konservi la esperon. Skribaĵoj por la reformo de la Eklezio***
- ***Tutmonda etiko por la ekonomio kaj la politiko***
- ***La virino en la kristanismo***
- ***Ĉu eterna vivo?***
- ***Konkerita libero. Memoraĵoj***
- ***Ĉu ekzistas Dio?***
- ***Esti kristano***
- ***La Katolika Eklezio***
- ***Projekto de iu tutmonda etiko***
- ***La judismo. Pasinto, nuntempo kaj estonteco***
- ***La islamismo. Historio, nuntempo kaj estonteco***
- ***La kristanismo. Esenco kaj historio***
- ***Kredo. La Simbolo de la Apostoloj eksplikata al la nuntempa homo***
- ***La komenciĝo de ĉio. Scienco kaj religio***
- ***Serĉante niajn spurojn***
- ***Ĉu ankoraŭ eblas savi la Eklezion?***

Oni povas konstati ke la temaro estas sufiĉe varia; krom aferoj rilate al la kristanismo –ĉefe la katolikismo- Küng okupiĝas en sia verkaro ankaŭ pri aliaj religioj: judismo, islamismo… kaj ankaŭ pri ne strikte religiaj aferoj, kiel la temo de la tutmonda etiko. Sed eĉ ĉi lastaj estas pritemataj de li ekde religia vidpunkto, do ĉiu lia tuta verkaro povas esti enkadrigata en la fako: "teologio".
La libro ***Ĉu ekzistas Dio?.*** eble tiu, el liaj verkoj, tradukita al pli da lingvoj kaj kiu estis plej ofte eldonita, pritraktas la temon kiu, en la nuna tempo, koncentras la debatadon kaj diskutadon pri la maniero koncepti la ekzistadon kaj la ĝeneralan realaĵon. En la landoj de la evoluinta socio oni pasie diskutadas pri la rolo de la religio en la laikaj ŝtatoj. Tiu demando vekas la demandon; ĉu klera kaj racia homo povas kredi je Dio?, kaj se tiel, kiamaniere li povus racie prezentadi la aferon al la klera kaj moderna mondo? La poziciiĝo de la aŭtoro estas pridubi tiel la fundamentan certecon en la religia fido, kiel ankaŭ la certecon pri la kapablo de la scienco doni definitivan respondon pri la afero. Resume, la konkludo de la ampleksega teksto de tiu verko estas ke estas neniu certeco, ĉu jesa aŭ nea, pri la ekzisto de la ento subkomprenata per la vorto "Dio". Ja, la homoj kredantaj ne nur je Dio sed ankaŭ je la homa transcendeco, la eterna vivo, k. c. ne posedas nek povas posedi certecon pri ĉio ĉi. Tiuj personoj, se kristanaj, povas bazigi siajn krederojn nur sur la fido je la vorto de Jesuo-Kristo. Alireligiaj kredantoj, kompreneble, havas aliajn referaĵojn, ĝenerale personajn referaĵojn (realaj aŭ fikciaj): profetoj, mesioj, avataroj… Tiutipa fido aŭ konfido estas subjektiva realaĵo. Ne eblas racie eksplikі ĝin, kaj ĝi ankaŭ ne estas kontaĝebla. Tio eksplikas ke la diskutadoj pri religiaj aferoj ĝenerale konkludas tiel kiel ili estis komenciĝintaj, t. e. neniu diskutanto konvinkas sian interparolanton, ju pli longa estus la diskutado kaj ju pli brilaj estus la esprimitaj argumentoj. Tiun fakton iuj teoriumas dirante ke la fido estas dia donaĵo, t. e. donaco kiun Dio faras al tiuj kiujn li volas.
Eble ĉar li estas katolika pastro, Küng dediĉis grandan parton el sia verkaro analizi la krizon de la RomanKatolika Eklezio. Ĝuste, la lasta el la verkoj de la teologo pritemas tiun aferon kaj montras la plej aktualan situacion de la eklezia krizo. Ja, la libro estis eldonita en la jaro 2011. Ĝia titolo estas ***Ĉu ankoraŭ eblas savi la Eklezion?*** En ĉi tiu verko la aŭtoro analizas la situacion de progresiva malboniĝo kiun la Katolika Eklezio spertis dum la regado de la lastaj papoj, ekde Paŭlo la 6-a ĝis la fino de tiu de la germana papo, situacio pri kiu li diras: ***Tio devas ne daŭri tiele en nia Eklezio, la vatikanaj altranguloj detruadas la institucion***. Li aldonis ke li estus preferanta ne verki ĉi tiun libron ĉar ne estas agrable dediĉi al la Eklezio, al kiu li daŭre apartenas, tiajn kritikojn, sed la restariga vojo sekvita dum la tri lastaj jardekoj far la papoj Karol Wojtila kaj Joseph Ratzinger estas fatala ne nur por la Katolika Eklezio sed ankaŭ por la tuta kristana ekumeno ĉar tiu institucio tre influas sur aliaj kristanaj eklezioj.
Laŭ li, spite al la spektakulareco de la amasaj akceptoj al la papoj en ĉi ties peregrinado kaj ŝtat-vizitoj, tio ne povas kaŝi la krizon, kiu manifestiĝas per la granda forlaso de la Eklezio fare de multa personoj. Konkrete, en Germanio, lia lando, dum la lastaj tri jaroj centoj da miloj da katolik(in)oj forlasis sian Eklezion. Li asertis ke dum la vizito kiun li faris al la papo Benedikto en la jaro 2005 vekiĝis ĉe li ia espero pri ŝanĝo-direkto far tiu papo, sed poste evidentiĝis ke ĉi tiu daŭrigis la restarigan vojon entreprenitan kune kun sia antaŭinto kaj distanciĝis el la Koncilio kaj grandaj sektoroj el la kristana popolo.
Tre seniluziigis lin la fakto ke, dum tiuj jardekoj, plejparto el la episkoparo, rezignante la teoriajn funkciojn de sia rango, obeeme submetiĝis al la povo de la paro Wojtila-Ratzinger kaj fidele plenumadis ĉi ties disponojn. Lin desapontis ankaŭ la teniĝo de multaj teologoj kiuj ne reagis vigle kunece kaj publike kontraŭ la nova vatikana subpremado. Speciale, li bedaŭras ke eĉ multaj protestantaj teologoj preferas konservi bonajn rilatojn kun la vatikana povo ol apogi la progresistajn poziciojn intrakatolikajn.
Iu ideo esprimita de Hans Küng en tiu-ĉi lasta libro estas ke la Katolika Eklezio estas grave malsana. La malsano, laŭ li, estas la vatikana regad-sistemo kiu plifirmiĝis en la 11-a jarcento kaj persistas ĝis la nuntempo. Tiu sistemo karakteriziĝas pro la monopolo de la povo kaj la vero, jurleĝismo, klerikalismo, abomeno de la sekseco kaj mizogineco. Tiu povos ne estis la sola sed, jes ja, estis la ĉefa kaŭzo de la tri grandaj skismoj de la kristanismo: la unua, inter la Orienta kaj la Okcidenta Eklezioj en la 11-a jarcento, la dua, en Okcidento, inter la Katolika Eklezio kaj la protestantismoj en la 16-a jarcento, kaj la tria, en la 18-a kaj 19-a jarcentoj, inter la katolikismo kaj la klerisma moderna mondo.
En alia ĉapitro de sia libro Küng asertas ke spite al la pompo kaj la lukso de la ekleziaj ceremonioj, kiuj impresas ankaŭ sur personoj sen religia inklino, rezultas evidenta la fiasko de la restariga politiko de Johano-Paŭlo la 2-a kaj

Benedikto la 16-a. Pli kaj pli da katolikoj malkonsentas pri gravaj aferoj kun tiutipa hierarĥio, kaj tiuj amasaj renkontiĝoj de la papoj kun la junularo ne atingas ke plialtiĝu la nombro de novaj sacerdotaj alvokiĝoj.

En la libro kiun ni prikomentas ne povis manki ankaŭ aludojn de la aŭtoro al tiu kiu estas unu el la plej gravaj problemoj de la Eklezio en la nuntempo: la multenombraj kazoj de pederastio far katolikaj pastroj. Küng diras ke oni devas ne forgesi ke la kaŝado de tiuj deliktoj dum multaj jaroj en la tuta mondo estis demarŝita de la vatikana Kongregacio por la Doktrino de la Fido, kiun la kardinalo Ratzinger prezidis inter 1981 kaj 2005. Ankoraŭ la 18an de majo de 2001 Ratzinger sendis al ĉiuj episkopoj leteron pri la gravaj deliktoj, ***Epistula de delictis gravioribus***, per kiu oni metis tiujn kazojn sub ***secretum pontificum***, sekreto kies rompo povus okazigi la aplikadon de severaj ekleziaj punoj.

En la kvina ĉapitro de la libro, la aŭtoro diras ke la reformo kaj la moderneco estis asimilitaj de la Eklezio tro malfrue kaj nur mezgrade. Li sin demandas kiamaniere savi la Eklezion kaj analizas la pap-regadojn ekde Leono la 13-a ĝis la nuntempo. En tiu analizo la Küng dediĉas specialan atenton al la regad-perido de Wojtila, la inflacio de sanktul(in)oj proklamitaj en tiu epoko, la groteska aklamo kiel subita sanktulo al tiu papo je ĉi ties forpaso… Nia teologo rememoras la respondecon kiun tiu pontifiko havis pri la kaŝado de skandalaj kazoj kiel tiu de Marcial Maciel, la lidero de la t. n. "legianoj de Kristo-Reĝo". Pri la graveco de la malsano de la Katolika Eklezio sufiĉe atestas la fakto ke tiu papo fine estis kanonizita.

Kiel konkludo de la libro, la teologo Küng, respondas sian propran demandon: ***Ĉu ankoraŭ eblas savi la Eklezion?***, tiele:

- ***Ne eblas savi Eklezion kiu, turnita al la pasinteco, daŭre emas al Mezepoko, la epoco de la Reformo aŭ eĉ la Klerismo. Sed Eklezio orientita al la kristana origino kaj concentrita en la nuntempaj taskoj, jes ja, povos supervivi.***
- ***Ne eblas savi Eklezion kiu troviĝus patriarkece kompromisita kun stereotipaj bildoj pri la virino, kun tute maskla lingvo-stilo kaj kun genraj roloj apriore difinitaj. Sed Eklezio egaleca kiu kunligu servadon kaj karismon kaj akceptu la virinojn en ĉiuj ekleziaj oficoj, jes ja, povos supervivi.***
- ***Ne eblas savi Eklezion kiu, ideologie memdevigita, sin tenu konfesie ekskluziviga, hierarkie aroganta kaj disdegna pri la komunumo. Sed, tamen, povus supervivi Eklezio ekumene malfermita, kiu praktiku la ekumenismon internen kaj kiu al la multenombraj vortoj pri ekumenismo metu, finfine, ekumenajn faktojn, kiel la agnosko de la aliekleziaj oficoj, la revokon de ĉiuj ekskomuniigoj kaj la plenan eŭkaristian komuniiĝon.***
- ***Ne eblas savi eŭrocentran Eklezion kiu defendas la kristanan eksklusivismon kaj la roman imperiismon. Kio, jes ja, povos supervivi, tamen, estas iu tolerema Eklezio kiu kultivu la respekton al la vero –pli kaj pli granda– kaj kiu, sekve, klopodu lerni el aliaj religioj kaj koncedu prudentan aŭtonomion al la naciaj, regionaj kaj lokaj eklezioj. Kaj kiu, sekve de ĉi tio, ankaŭ ĝi estu respektata de la homaj estaĵoj, tiel la kristanoj kiel la nekristanoj.***

En iu akto de prezentado de ĉi tiu libro oni faris al Hans Küng intervjuon el kiu ni ekstraktas kaj esperantigas kelkajn partojn kiuj povas pli ilustri nin pri la penso de tiu teologo.

**Demando: Vi diris ke ni troviĝas en la dua fazo de la krizo. Vi parolis pri manko je preteco dialogadi. Bonvolu klarigi al ni ĉi tiun aferon.**

Kung: Ni supozis ke la episkopoj komprenis ke ili ne plu povas agadi tiel aŭtoritatec-maniere kiel ĝis nun, ke de nun ili devas aŭskulti la popolon. Sed ne estas tiele, ili eĉ ne tion komprenis. Mi kredas ke: ni estas la popolo! Multaj diras: elĉerpiĝas nia pacienco, ni volas partopreni en la decidoj, ankaŭ en niaj parokoj. Ni volas elekti niajn episkopojn, ni volas vidi la virinojn en la diversaj ekleziaj oficoj, ni volas ke sufiĉe preparitaj viroj kaj virinoj estu ordinitaj sacerdotoj. Temas pri sloganoj kaj postuloj kiuj respegulas la malkontenton de la personoj. Fakte, okazis skismo ene de la Eklezio inter tiuj kiuj, en la eklezia supro, pensas ke ili povas daŭre agadi laŭ la ĉiama stilo kaj la popolo kaj grandparto el la liberala klerikaro.

**Demando: Kiuj estas, laŭ vi, la ĉefaj simptomoj de ĉi tiu krizo de la Katolika Eklezio kiun vi diagnozas en la libro?**

Küng: Esence, ke la parokoj iom-post-iom velkiĝas, iomgrade pro la dogma mesaĝo kiu insiste venas preskribita desupre. Kompreneble, ni havas ankaŭ la problemon de la ekleziaj postenoj. En la libro mi ilustras tion per la ekzemplo de mia propra komunumo en Svisio. Dum multe da tempo ni havis kvar sacerdotojn (la "kvar kavaliroj"); hodiaŭ restas neniu. Ni daŭre havas du emeritojn kaj unu diakono. La diakono, iu germano, fajne rolas. Tamen, li ne povas prezidi eŭkaristion ĉar li ne estis ordinita sacerdoto. Kaj li ne povas esti ordinata sacerdoto ĉar li estas edziĝinto. Ĉi tio estas tute absurda. Ni devas ektrakti serion da tre konkretaj aferoj; 1. la fraŭleco devas opcia; 2. la virinoj devas havi alirecon al la ekleziaj postenoj; 3. oni devas permesi ke la eksedziĝint(in)oj partoprenu en la eŭkaristio; 4. oni devas establi eŭkaristiajn komunumojn inter la divers-konfesiaj kredantoj sen atendi pluan 400 jarojn.

**Demando: Estas io kion mi ne bone komprenas. Si vi kritikas la nunan Papon kaj komparas lin kun aliaj pli liberalaj Papoj, tiukaze ne temas pri problemo de la strukturo de la Eklezio, sed de la personeco de la Papo.**

Küng: Gravas ankaŭ la personeco de la Papo. Joseph Ratzinger devenas de iu konservativa medio. Ankaŭ mi devenas de iu konservativa medio. Tio ĉi estas neniu honto, ĝi eĉ povus fariĝi avantaĝo. Sed li internigis tiun medion. Li vivis ĉefe en Germanio sen bona kono pri la mondo. Poste li translokiĝis al Romo kie li vivadis en iu artefarita geto kie oni ne perceptas tion okazantan en la cetero el la mondo. Legante iujn el liaj deklaracioj, kiel la dekreto kiun li publikigis pri la aliaj eklezioj kiam li ankoraŭ estis kardinalo, venas la sin-demando: kie loĝas reale ĉi tiu homo, ĉu en la luno? Nun li anoncas ian tute nekonvinkan kampanjon pri evangelizado. Kiel li volas evangelizi la mondon per iu katekismo kiu pezas

laŭlitere 1 kilogramon? Ĉu li volas torturi la personojn? Krome estas la afero de la Instruado de la Eklezio. Li ekspresе parolas pri la "instruado de la Papo". Ĉi tion, kompreneble, ne povas serioze akcepti iu klera persono. Kiu povas akcepti nuntempe ke unusola persono postulu por si mem la leĝ-dona, jura kaj ekzekutivaj povoj sur komunumo de pli ol mil milionoj da personoj? Krome, oni faras probleman impulson al ia tipo je popola tradicia religieco kiun oni intencas promocii. Okazas teruraj scenoj en kiu iu Papo kiŝas la sangon de sia antaŭinto en arĝenta relikvujo. Nu, kie ni troviĝas? Tio ĉi estas mezepoka obskurantismo.

**Demando: Sinjoro Küng, ĉu la sistemo de Romo ne baziĝas sur la Nova Testamento kaj la Eklezia historio?**

Küng: Ne. La vorto "hierakio" mem vi ne trovus en la Nova Testamento. Jes ja aperas sesfoje la vorto "diakoneco" kun la fama frazo: "tiu kiu volus esti plejranga, estu la servisto de ĉiuj". En tiu sama linio ni havas ankaŭ la scenon de la piedo-lavado. Sed la Papo volas esti sinjoro inter sinjoroj. Li aperas kiel ia moderna faraono. Se ni observas la ceremoniojn en Sankta-Petro, unu sola persono troviĝas en la centro, dum la episkopoj sin tenas distance, kvazaŭ figurantoj. Neniu devas diri ion, nur unu parolas, nur unu decidas ĉion. Tiu ĉi ne estas Eklezio de nia epoko. Kaj ĝi tute ne kongruas kun la Nova Testamento kaj ĉi ties epoko, kie regadis la frateco, kie ĉeestis virinoj kaj kie ekzistis karisma komunumo, kiel oni vidas en la paŭlaj komunumoj. Tute male de tio praktikata nuntempe. Hodiaŭ reĝas ia mezepoka strukturo kiun, principe, oni povas trovi nur en la arabaj landoj. Tio memorigas al ni la komunistajn reĝimojn, bazitaj sur la sekretario de unika partio kiu decidas ĉion. La ceteraj estis elektitaj surbaze de sia lojaleco al la idearo de la lidero. Same okazas kun la episkopoj. Tamen, pli kaj pli da personoj akceptas ĉi tian aŭtoritatecan sistemon. Eĉ ne en Arabio oni akceptas nun la aŭtokratojn. Mi asertas ke ankaŭ ne en la Katolika Eklezio estos brila estonteco por la aŭtokratoj.

**Demando: Hans Küng apelacias al Jesuo, la papo apelacias al Jesuo. Kion povas fariu iu laik(in)o antaŭ tiuj du intencoj je legitimado?**

Küng: Li/ŝi devus legi la Biblion, tiele li/ŝi konstatus kie estas Jesuo. Kiam Ratzinger kiel teologo, ankaŭ kiel Papo, verkas pri Jesuo (…) li tion faras pri la laŭdogma Jesuo (…). Li ne diras ke Jesuo kontraŭstaradis la religiajn instituciojn de sia epoko, ke fine li estis murdita far tiuj kiuj sin konsideradis ortodoksaj. Tute male, li parolas ĉiam pri la Kristo de la dogmoj, de la Eklezio kaj de la administracio.

**Demando: Ĝis ĉi tie la diagnozo de la krizo. En ĉi tiu kunteksto vi ofte uzas la metaforon de la malsano, ni pasu nun al la proponoj por la terapio. Vi havas konkretan bildon de la reformo de la Eklezio. El nia konversacio mi konkludas ke la reformo kiun Sinjoro Küng havas enmense postulas tute elimini la eklezian institucion.**

Küng: Ne, tute ne, tute male. Mi volus rekonstrui la institucion de la Eklezio ekde malsupre, kompreneble, surbaze de la Nova Testamento kaj la humanitarismo.

**Demando: Do, ĉu oni devas tute malaperigi la nunajn strukturojn aŭ ne?**

Küng: Oni devas aboli, kompreneble, la absolutismon de la Papo. Tamen oni povas konservi kaj apogi ian institucion kiu gvidu la instruadon, prezidata de iu episkopo en Romo, kondiĉe ke tion li faru en la linio de la Evangelio. Li eĉ povus havi ian ekumenan rolon. Tio, kion mi kritikas, estas ke unu sola persono volus decidi ĉion kaj, ekzemple, eksigus episkopon, kiel faris denove la Papo Ratzinger, unuafoje ekde la Koncilio. Ni havas la kazon de la episkopo Morris el Aŭstralio. Oni eksigis lin tial ke li diris ke ne restis al li pastroj kaj petis la abolicion de la deviga fraŭleco kaj ke oni akceptu virinojn al la sacerdoteco. Kiam oni eksigas al iu persono el sia ofico nur oni povas konkludi: ĉi tiu ne estas la Eklezio de Jesuo-Kristo, ĉi tiu estas sistemo kiu postulas kompletan identiĝon kaj eĉ ne al siaj episkopoj oni permesas la plej etan diverĝon.

**Demando: Ĉu kapablas la Katolika Eklezio entrepreni ĝi mem la reformon de interne?**

Küng: Nu, mi konas la sistemon de interne kaj batalas por ke oni enkonduku reformojn. Mi scias ke milionoj da personoj apogas min. Tiusence la afero dependas de la tempo-pasado. Simple, ni ne povas antaŭeniri surbaze de iu absoluta sinjoro kiu preskribas kion oni devas fari en la dorm-ĉambro (ŝlosila vorto: la pilolo…) kaj kiu establas ĉiujn normojn ekde sia limigita vidpunkto. Mi opinias ke la papa politiko jam evidentiĝis fiasko kaj devus ne plu tedi nin. La sola demando kiun oni faris ankaŭ en Sovetunio, la komunista partio, estas ĉi tiu: ĉu estas iu Gorvaĉov kiu povus eltiri nin el ĉi tiu domaĉo?

**Demando: Ĉu tio signifas ke vi deziras io simila al iu Perestrojko en la Eklezio? Tio postulas iun tre karisman personecon.**

Küng: Mi postulas ian Glastnost kaj ian Perestrojkon. Ĉefe por la ekleziaj financoj. Mi volus koni kiel oni reale pagadas ĉion en la vatikano, kiu(j) kondukas la dancon kaj reale havas ĉiujn fadenojn en sia mano.

Küng diris ke unu ekzemplero de sia libro estis sendita al la Papo Ratzinger. Se ĉi tiu legis ĝin, kaj al li, spite al sia limigita vidpunkto, restis iom da juĝ-kapablo por objektive pritaksi la aferojn, sendube li devis konsideri ke la plej konvena por la Eklezio estus ki li abdiku.







# LA EKLEZIO KIUN VOLIS LA KONCILIO

## José María Castillo

**Lingvo: hispana**

**Eldonejo: PPC        Kolekto: Cruce**

**Eldon-dato: 2002.  Tria eldono en marto de 2013**

**Paĝoj: 144**


Oni verkis multajn librojn pri la Dua Vatikana Koncilio, kaj lasttempe ĝia nombro pligrandiĝis tial ke ĉi-jare estas la 50-jara jubileo de la komenciĝo de tiu ekumena Asembleo. Tamen ĉi tiu verko kiun ni recenzas ne aperis ĉi-jare sed antaŭ unu jardeko, konkrete en la jaro 2002, kiam estis tre proksima la 40-jara datreveno de tiu evento. De tiam aperis kromaj du eldonoj de la libro –ĉiuj en la hispana lingvo– kaj en la tria, aperinta en marto de la nuna jaro, la verko, estas iome aktualigita.
La aŭtoro prezentas en ĉi tiu verko, laŭlonge de ĉi ties 17 ĉapitroj, ian kritikan priskribon de la eklezia strukturo kaj ties organizacio, kiu, tia kia ĝi estas, plejofte obstaklas la renkontiĝon kun Dio anstataŭ stimuli ĝin. Ja, en tiu Eklezio unuflanke oni parolas pri komunio kaj Dia Popolo sed dume, aliflanke, fakte, la instituicio konservas leĝan organizacion, kiu favoras la hierarkian povon kaj malebligas la spertadon de la plena komunio inter ĉiuj eklezianoj.
La libro insiste memorigas ke la Koncilio havis difinitan planon por la estonteco de la Eklezio kaj ke tiurilate ĝi ellaboris doktrinon pri temoj kiel la povo de la papoj, de la episkopoj, la rajtoj de la laikoj, la rilatoj inter hierarkio kaj la fideluloj, la dialogo kun la moderna mondo…
Sed Castillo ankaŭ pritemas en sia verko la ambiguecon de la Koncilia doktrino ĉar se, unuflanke, ĝi enkondukis konsiderindajn modifojn en la eklezia teologio, aliflanke ĝi tute ne tuŝis la organización de la institucio ebligante tiamaniere ke la vatikana kurio konservu sian ne klare konstitucian povon sur la ensemblo de la eklezia membraro inkluzivante la episkopojn kaj la kardinalojn.
En la verko oni priatentas ankaŭ la fakton ke, laŭ la pasado de la jaroj post la Koncilio, oni estis nuligante iom-post-iom la konciliajn atingaĵojn kaj klopodante forgesigi la renovigon celitan de tiu Asembleo.
La legado de ĉi tiu libro povas esti tre utila por tiuj personoj konsciigitaj pri la problemaro de la Eklezio kaj volas ricevi informon pri tiu afero for de la ordinaraj kanaloj de la propagando de la institucio. La aŭtoro de la verko spertis per si mem la sekvojn de la maltoleremo de eklezia hierarkio kiu monopoligas la povon en la institucio super ĉi ties tuta membraro kaj ŝajnas ne havi alian celon ol la konservado kaj ĝuado de tiu povo.



**José María Castillo** (Puebla de Don Fadrique, Granado, aŭgusto de 1929) estas hispana katolika pastro, membro de la jezuita societo ĝis la jaro 2007, verkisto kaj teologo en la penso-linio de la Teologio pri Liberigo.
Li estas magistro pri Filozofio kaj Teologio en la Fakultato de Teologio de Granado kaj doktoro pri Teologio en la Gregoria Universitato de Romo.
Ekde 1968 li estis profesoro de dogma Teologio en la Fakultato de Teologio de Granado. En 1980 li estis apartigita el la ordinara instruado kaj restis instruante nur en la kursoj de licencio. En 1988 li estis eksigita kiel profesoro de la Fakultato de Cartuja, samtempe kiel Juan Antonio Estrada kaj Benjamín Forcano pro iliaj teologiaj opinioj malakordaj kun la oficiala doktrino de la Eklezio.





# La Rejno enfluas en la Tiberon




## Ralph M. Wiltgen

**Lingvo: angla, tradukita al kelkaj aliaj lingvoj**

**Angle: The Rhine flows into the Tiber (1967)**
**France: La Rhin se jette dans le Tibre (1973)**
**Germane: Der Rheim fließt in den Tiber (1988)**
**Hispane: En Rin desemboca en el Tiber (1999)**
**Pole: Ren wpada do Tybru (2001)**



**Ralph M. Wiltgen** (Ĉikago 1921-Techny, Ilinojso 2007). Estis ordinita sacerdoto en la jaro 1943.

Dum la Dua Vatikana Koncilio li fondis kaj gvidis agentejon nomatan: ***Servo je Informado pri la Vatikana Koncilio***, kiu publikigis kaj distribuis inform-resumojn du-foje ĉiusemajne en naŭ lingvoj al pli ol 3000 abonantoj en 108 landoj.

Liaj intervjuoj al centoj da kardinaloj, episkopoj kaj teologoj dum la Koncilio provizis al li la materialon por la verkado de ***La Rejno enfluas en la Tiberon-***

Li estias aŭtoro ankaŭ de multenombraj artikoloj kaj kelkaj libroj pri religia temaro.


Ĉi tiu libro povas esti difinita kiel kolekto da informoj pri la disvolviĝo de la Koncilio. Ĝi estas ĝisfunda priskribo de la konciliaj sesioj kaj aliaj okazaĵoj en rilato kun la Asambleo. La titolo de la libro inspiriĝis en Juvenal. Antaŭ du mil jarojn la granda latina satiristo lamentis ke la siria kulturo plenigas tiun de Romo: ***La Orontes fluas en la Tiberon***. Ĉe la Koncilio, la kardinaloj, episkopoj, kaj teologoj de la landoj trans la Rejno havis egan influon: ***La rejno fluas en la Tiberon***.

Laŭ la aŭtoro, la Dua Vatikana Koncilio estis la luktejo kie dialektike interfrontiĝis du teologiaj skoloj, la tiel nomataj progresema kaj konservativa, kiuj, respektive, estis organizitaj en du grupoj, la ***Eŭropa Alianco*** kaj la ***Internacia Grupo de Patroj***. La du blokoj, krom konkurenci en la komisionoj kaj en la koncilia aŭlo, havis internajn kunvenojn, kaj gazetarajn konferencojn, kaj eldonadis dokumentojn kaj komunikaĵojn defendante iliajn respektivajn poziciojn.

La ***Eŭropa Alianco***, «La Rejno» pri kiu temas la aŭtoro, estis gvidata de la germana kardinalo Frings kaj la aŭstriano Köning, kaj ĝia membraro estis konstituita de plejparto el la episkopoj de Germanio, Aŭstrio, Belgio, Nederlando kaj Svisio. Ĉi tiu grupo, asistita de, inter aliaj, Karl Rahner, atingis privilegian pozicion, ĉar la kvar debatestraj kardinaloj de la plen-kunsidoj, elektitaj de Paŭlo la 6-a, estis membroj de la ***Alianco*** (Agagianian, Döpfner, Lercaro kaj Suenens) kaj konstituis plimulton en la komisionoj kiuj preparadis la tekstojn por la plenaj debatoj.

La aŭtoro de la libro pretendis esti verkinta objektivan kaj senpartian raporton, sed sufiĉas tralegi la tekston por konstati ke li bedaŭras la rezulton de la influo de la ***Eŭropa Alianco*** sur la decidoj de la Koncilio, ĉefe en kio koncernas al la kolegieco de la episkoparo, ekumenismo, religia libereco, liturgio kaj rifuzo kondamni la komunismon. Por Ralph M. Wiltgen, aŭtoro de la libro, tiuj konciliaj disponoj estis fatalaj, kaj atribuas al ili la fakton ke la eklezia krizo kiun la Koncilio celis solvi pliakriĝis post ties okazado. Kvankam li ne eksplicite deklaras tion, lia raporto estas redaktita tiamaniere ke la legantoj venu al la konkludo ke la solvo estus reveni al la tridentina tradicio. Ne eblas scii kion li opinius hodiaŭ kiam kvardek jaroj da restarigaj klopodoj de tiu tradicio, perfide al la Koncilio, eĉ pli akrigis la krizon.

Spite al la tendenca inspiro de la verko, ties legado povas utili al tiuj kiuj serĉus detalan konon de la disvolviĝo de la koncilia procezo.


iomete malrespekte
Pasintan nokton mi sonĝis ke post 70 jarojn denove regos la ruĝuloj, sed ili akurate subvencios nin koste de la ŝtata budĝeto.
Hispanio 1939
Tio signifas ke ili bone estus lernintaj la lecionon.
Konvenas ke ni modernigu la Eklezion.
Jes, almenaŭ ĝis la dek-oka jarcento.
Mi pensas ke estus konvene elekti hispanan papon. En tiu lando demisias neniu.
Mi havis du opciojn: aŭ mi ĉesus esti papo aŭ mi ĉesus vivadi en la 16-a jarcento
Eminenco, iuj pastroj de via diocezo kredas la Evangelion kaj predikas ĝin en sia parokejo de Vallekaso.
Sankta Dio! Kia skandalo! Oni tuj fermu tiun templon por eviti ke la mesaĝo disvastiĝu!
Oni devas enkonduki la religion en la lernejojn, la politikon, la juĝistejojn, la hospitalojn...! Kial?
Ĉar al la preĝejoj venas preskaŭ neniu
Ne idoligu la terajn posedaĵojn.
Ĉu nur la borsajn valor-paperojn?